




EL POPOLO CINESI



ĈPLA-anoj de la ĉefurbo kiuj ĉeestas la vesperan kunvenon de "Maj-festo" varme krias: "Vivu, vivu, longe vivu Prezidanto Maŭ!"



La granda gvidanto Prezidanto Maŭ ĝoje celebras la Internacian Laborantan Feston "La Unua de Majo" kune kun laboristoj, laboranta popolo kaj komandantoj kaj batalantoj de PLA.

Prezidanto Maŭ kaj Vicprezidanto Lin Ĝoje Celebris la Majan Feston Kune kun la Armeanoj kaj Popolanoj en Nia Ĉefurbo


Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj lia intima kunbatalanto Vicprezidanto Lin ĝoje celebris la Majan Feston kune kun la reprezentantoj, kiuj partoprenis la 9-an Kongreson de la Partio, kaj kvincent mil armeanoj kaj popolanoj en nia ĉefurbo.

La vesperon partoprenis ankaŭ kamaradoj Ĝoŭ Enlaj, Ĉen Boda, Kang Ŝeng kaj aliaj membroj kaj kandidataj membroj de la Politika Buroo kaj membroj de la Centra Komitato de la Partio.

Kiam Prezidanto Maŭ kaj Vicprezidanto Lin suriris la pordegon Tian-anmen, tuj ekbolis la tuta placo. Sonis tra la nokta ĉielo la ĝojkrioj: "Vivu Prezidanto Maŭ! Longe vivu Prezidanto Maŭ!" "Eternan vivon al Prezidanto Maŭ!" Prezidanto Maŭ estas tre sana kaj viglanima. Kune kun Vicprezidanto Lin, li tre ĝoje intervidiĝis kun la reprezentantoj de la 9-a Kongreso de la Partio kaj kamaradoj de diversaj rondoj. Li salutis kaj aplaŭdis al la ĉeestantoj kaj fojrefoje intime manpremis kaj interparolis kun apudaj kamaradoj. La revoluciaj amasoj kaj fremdlandaj amikoj, kiuj partoprenis la vesperon, estis en feliĉo kaj ĝojo.

La granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj lia intima kunbatalanto Vicprezidanto Lin rigardas festan artfajraĵon sur Tian-anmen-pordego.







La vastaj amasaj de armeanoj kaj popolanoj de la ĉefurbo ĝoje pasigas festan nokton.



Bolas cent miloj da popolanoj sur Tian-anmen-placo

Brave Antaŭen

sub la Favora Vento

de la 9-a

Kongreso de la Partio

—La ĉefurbaj armeanoj kaj popolanoj ĝoje celebris la internacian feston de laboruloj de “1-a de majo”

En la 1-a de majo, la laborista klaso, vasta laboranta popolo, komandantoj kaj batalantoj de PLA en nia ĉefurbo, plenaj de revolucia entuziasmo, ĝoje celebris la internacian feston de laboruloj de “1-a de majo” — feston de unuiĝo kaj batalo de la proletaro kaj laboranta popolo de la tuta mondo — kaj la grandan venkon de la 9-a Kongreso de la Partio. Ili decidis respondi per siaj praktikaj agadoj la batalan alvokon donitan de la 9-a Kongreso “akiri pli grandajn venkojn en la lando”, sub la gvido de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio kun Prezidanto Maŭ kiel estro kaj Vicprezidanto Lin kiel vicestro.

En la festotago, ĉie en nia ĉefurbo regis revolucia atmosfero plena de freŝa vigeleco. Aparte majeste kaj pompe aspektis la placo de Tiananmen. Granda portreto de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ alte pendas meze de la ruĝa muro de la pordego Tiananmen. En la orienta kaj okcidenta flankoj de la placo staris kolosaj portretoj de Marks, Engels, Lenin kaj Stalin. Antaŭ la Monumento de Popolaj Herooj kaj ĉe ĝiaj flankoj imponis du sloganoj el lamplumo: “Vivu la venko de la 9-a Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio!” kaj “Marnavigo dependas de stiristo, kaj revoluciado dependas de Maŭzedongpenso”.

Kiam leviĝis la ruĝa suno en oriento, la vastaj revoluciaj amasoj de la ĉefurbo, kun la ruĝa libro *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* en la mano, kolektiĝis de diversaj direktoj, tenante ruĝajn flagojn kaj sonigante tamburojn kaj tamtamojn, en la Kultura Palaco de Laboranta Popolo, Ĝongŝan-a Parko, Parko de Laboristoj, Kampanoj kaj Soldatoj, Hiangŝan-a Parko kaj aliaj sume dek lokoj, kie koncentriĝis la celebraj aktivadoj. La reprezentantoj el diversaj lokoj de la patrolando, kiuj partoprenis la 9-an Kongreson de la Partio, ĝoje pasigis la festan tagon kune kun la laborista klaso, malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj, komandantoj kaj batalantoj de PLA, ruĝgvardianoj, revoluciaj kadroj kaj revoluciaj intelektuloj de la ĉefurbo. La celebrajn aktivadojn partoprenis ankaŭ la revoluciaj amasoj de nacimalplimulto, revenintaj elmigrintoj kaj patriotaj demokratoj. Tio montris la senprecedence revolucion grandan unuiĝon de nia popolo sub la granda ruĝa standardo de Maŭzedongpenso.

Dum la celebra aktivado, la revolucia popolo de la ĉefurbo puŝis la amasan movadon de studo kaj propagando de la spirito de la 9-a Kongreso de la Partio al nova alta tajdo. En la diversloke okazigitaj celebraj, amuzaj kaj ĝardenaj kunvenoj en la urbo, la grandnombraj armeanoj kaj popolanoj ĝoje prezentis revoluciajn artajn kaj literaturajn programerojn memverkitajn por varme prikanti la grandajn meritojn de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, la grandajn venkojn de la ĉiamvenka Maŭzedongpenso kaj la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, la grandajn venkojn de la Granda Proletara Kultura Revolucio persone iniciatita kaj gvidata de Prezidanto Maŭ kaj la grandajn venkojn de la 9-a Kongreso, kiun persone prezidis Prezidanto Maŭ.

La granda gvidanto Prezidanto Maŭ instruas al ni: **“La proletaro estas la plej granda klaso en la historio de la homaro. Ĝi estas la revolucia klaso plej potenca en ideologio, politiko kaj forto; ĝi povas kaj nepre devas unuigi la plejparton de homoj ĉirkaŭ sin mem, kaj maksimume izoli kaj ataki plenmanon da malamikoj.”** Dum celebrado de la festo de venko, la grandnombraj ĉefurbaj armeanoj kaj popolanoj ripetade studis tiun instruon kaj decidis pli solide efektiviĝi diversajn proletarajn politikojn de Prezidanto Maŭ kaj serioze plenumi la batalon, kritikon kaj reformon por gajni novajn pli grandajn venkojn. Veterana laboristo de la Lokomotiva kaj Vagona Fabriko “7-a de Februaro” diris: Ni proletaro

havas plej grandan forton kaj plej altan revolucion. Ni nepre sekvos la instruon de Prezidanto Maŭ unuigi ĉiujn unuigeblajn fortojn, gajni ĉiujn gajneblajn homojn kaj maksimume izoli kaj ataki la plenmanon da malamikoj.

La ĉefurbaj laboristoj, malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj, armitaj per Maŭzedongpenso, partoprenis la celebran aktivadon de la internacia festo de laboruloj de “1-a de Majo” kun siaj elstaraj atingoj en tenado de revolucio kaj stimulado de produkto. Laboristoj de la Ligna Fabriko de Norda Antaŭurbo kaj Ligna Fabriko “Guanghua”, kiuj akiris grandajn atingojn en revolucio kaj produkto, interŝanĝis en la celebra kunveno en la Ĝongŝan-a Parko sian sperton en komando kaj stimulo de produkto per revolucio. Kaj ili esprimis la komunan volon serioze studi la dokumentojn de la 9-a Kongreso de la Partio kaj serĉi siajn mankojn laŭ la politika raporto de Vicprezidanto Lin por akiri novajn venkojn en revolucio kaj produkto. Antaŭ la festo, la laboristoj de la Dua Ilmaŝina Fabriko de Pekino sukcesis en provado fabriki koordinatan alezmaŝinon kun optika projekcia ekrano de progresinta nivelo. Ili diris, ke en la Granda Proletara Kultura Revolucio ili forte kritikis la kontraŭrevolucion linion de la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki kaj frakasis la fremdlandajn rutinajn regulojn kaj iris la vojon de **“sendependeco kaj memstareco, sinapogo sur propraj fortoj”**, tiel ke ili jam sukcesis fabriki precizan universalan frotummaŝinon kaj koordinatan alezmaŝinon kun optika projekcia ekrano. Ili decidis pli alte teni la grandan ruĝan standardon de Maŭzedongpenso, pli profunde kritiki la sklavecon antaŭ fremduloj kaj rampismon de Liu Ŝaŭki kaj krei pli da mirakloj per sia saĝo kaj manoj.

La vasta ĉefurba popolo, la en Pekino garnizonantaj teraj, maraj kaj aeraj trupoj de PLA, kiuj faris elstarajn kontribuojn en la Granda Proletara Kultura Revolucio, la komandantoj kaj batalantoj de PLA, kiuj plenumas la taskojn de subteno al industrio, agrikulturo kaj vastaj amasoj de maldekstruloj kaj la taskojn de milita kontrolo kaj milita kaj politika trejno en Pekino, la limgarda batalanto Sun Juguo, kiu venis de la areo de Ĝenbaŭinsulo, ĝoje celebris kune la internacian feston de laboruloj. La komandantoj kaj batalantoj de la 6-a roto de iu trupo de la Pekina Milita Regiono, kiu akiris la titolon “kuraĝa en atako kaj obstina en defendo” sur la batalkampoj de helpo al Koreio kontraŭ la usona imperiismo, restudis dum la celebrado de la Maja Festo la

instruon de Prezidanto Maŭ **“La Popola Liberiga Armeo estas ĉiam bataltrupo.”** Ili diris: “Ni absolute ne devas malstreĉi nian revolucion sin-gardemon en la bonega situacio kaj absolute ne devas neglekti la danĝeron de eksplodigo de agresa milito fare de la usona imperiismo kaj sovetunia reviziismo. Ni nepre devas plifortigi nian preparon al milito por ekstermi en ĉiu momento la malami-kojn, kiuj aŭdacos nin ataki.

La heroa limgarda batalanto Sun Juguo espris sian pretecon firme respondi per praktikaj agadoj la alvokon de la 9-a Kongreso de la Partio pri plifortigo de preparo kontraŭ milito. Li parolis pri la sovetunia reviziisma renegata kliko, kiu plurfoje ekspedis multnombrajn armitajn trupojn invadi nian teritorion Ĝenbaŭ-insulo kaj fabrikis treege seriozajn sangajn akcidentojn, kaj pri niaj limgardaj trupoj, kiuj en situacio plu netole-rebla donis fortan rebaton al la sovetunia reviziisma renegata kliko kaj venke defendis nian sanktan teritorion. Li diris: **“Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ diris lastatempe, ke pri la problemo de mondmilito, estas nur du eblecoj:**

aŭ milito kaŭzos revolucion, aŭ revolucio preventos militon, tiu aserto profunde eksplikas la grandan veron, ke la proletaro povas kapti regpotencon nur dank’ al pafilo, kaj montris revolucion vojon al la monda popolo. Nun, ruliĝas antaŭen la revolucia torento de la monda revolucio kaj ĉiam pli malfacilaj fariĝas la tagoj por la usona imperiismo kaj la sovetunia reviziismo, kiuj troviĝas en senelirejo embarasitaj de internaj kaj eksteraj malfaciloj. Sed, ili ne volantas akcepti sian fiaskon kaj nepre faros agonion. La malamikoj nun akriĝas sian glavon, do ankaŭ ni devas akriĝi la nian. Ni devas fari plenajn preparojn kontraŭ ilia grandskala milito aŭ frua milito, kontraŭ ilia konvencia milito aŭ nuklea milito. Ni nepre respondos firme al la granda alvoko de Prezidanto Maŭ intensigi la militpreparon kaj konstrui limgardan linion en ŝtalan Grandan Muron. Se imperiismo, reviziismo kaj reakciuloj kuraĝos trudi al ni militon, la ĉinaj limgardaj batalantoj armitaj per la granda Maŭzedongpenso akompanos ilin ĝis la fino kaj ekstermos ilin decideme, ĝisfunde, tute kaj komplete.

Diversnaciaj gejunuloj en Pekino dancas kaj kantas por celebri la internacian laboristan feston de la 1-a de majo.



Strikte Sekvi Prezidanton Maŭ por Akiri Ankoraŭ Pli Grandajn Venkojn

— La komandantoj kaj batalantoj de PLA fervore studas kaj propagandas la politikan raporton de Vicprezidanto Lin.

Post publikigo de la raporto farita de Vicprezidanto Lin, la intima kunbatalanto de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ, en la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Partio, ĉiuj komandantoj kaj batalantoj de la Popola Liberiga Armeo rapide komencis sian aktivadon en studado kaj propagandado. La grandnombraj komandantoj kaj batalantoj montris dum studado, ke la raporto de Vicprezidanto Lin alte tenas la grandan ruĝan standardon de Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso, profunde eksplikas la teorion de Prezidanto Maŭ pri daŭra revoluciado sub la diktaturo de la proletaro, sisteme resumas la spertojn de la Granda Proletara Kultura

Revolucio de nia lando, analizas en- kaj eksterlandajn situaciojn kaj elmetis estontajn batal-taskojn al la tuta Partio, tuta armeo kaj tuta popolo, kaj ke ĝi estas la granda programo, kiu direktas la socialisman revolucion kaj socialisman konstruadon de nia lando. Tiu raporto plene esprimas la deziron de ni revoluciaj batalantoj, kaj ni decidis kun plej granda politika entuziasmo serioze studi, profunde kompreni, fervore propagandi ĝin, efektiviĝi per praktikaj agadoj la batal-taskojn elmetitajn en la raporto kaj strikte sekvi la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ por iri de venko al pli granda venko.



Komandantoj kaj batalantoj de iu trupo de ĈPLA studas la politikan raporton de Vicprezidanto Lin al la 9-a Kongreso de la Partio.

GVIDAJ KADROJ IRIS EN ROTOJN POR PROPAGANDI

Kiam la ruĝa radio dissendis la raporton faritan de Vicprezidanto Lin en la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Partio, la membroj de la partia komitato de iu divizio de la pekina trupo tuj ekstudis ĝin kun emocio en la sama nokto kaj decidis starigi propagandan taĉmenton de Maŭzedongpenso kaj enprofundiĝi en bazajn unuojn por fari tie propagandon al la grandnombraj komandantoj kaj batalantoj.

La propaganda taĉmento jam estis preta foriri. Pro laborado dum sinsekvaj tagnoktoj, stomaka malsano denove turmentis diviziestron Li Baŭguj. Iuj komitatanoj konsilis al li ne iri, sed li diris: “Por studi kune kun batalantoj la politikan raporton de Vicprezidanto Lin kaj certigi la efektivigon de ĉiuj bataltaskoj elmetitaj de la Naŭa Kongreso,

mi ne devas ne iri.” Portante kun si la revolucionan trezoran libreton de Prezidanto Maŭ kaj la politikan raporton de Vicprezidanto Lin, Li Baŭguj venis al la kemia roto, kiu estas elektita kiel roto kun kvar bonoj dum ok sinsekvaj jaroj. Kune kun la kadroj kaj batalantoj de tiu roto li studis la raporton de Vicprezidanto Lin frazon post frazo. En studado li faris klarigojn al la batalantoj lige kun la historio de batalo inter la du linioj en la Partio kaj kun la historio de disvolviĝo kaj plifortiĝo de nia armeo. La batalantoj diris: “La kamaradoj de la partia komitato de la divizio ja pensas tion, kion ni pensas, urĝe prizorgas pri tio, kion ni urĝe bezonas, kaj ĉiam restas kun ni.” En la sama tempo, la politika komisaro de la divizio Vang Ĉijuan venis al riparejo de aŭtoj. Li iris en laborejojn,² kaj tie laboris kune kun batalantoj kaj propagandis la politikan raporton de Vicprezidanto Lin. Kaj vicdiviziestro Liu Ĉengĝaj, kiu devis

partopreni kunvenon aliloke, utiligis la tempon de duonhora antaŭ ekiro por fari propagandon al la batalantoj en iu subplotono.

En sia propagando pri la politika raporto de Vicprezidanto Lin, la nomita propaganda taĉmento de Maŭzedongpenso de la partia komitato de la divizio profundigis en bazajn unuojn, modeste lernis de batalantoj, resumis iliajn spertojn en studado de la politika raporto de Vicprezidanto Lin kaj tiel metis bonan bazon por gvidi kadrojn kaj batalantojn de la tuta divizio profunde studi kaj profunde kompreni tiun raporton.

VETERANO DE LA RUĜA ARMEO IRIS EN MONTARON POR FARI PROPAGANDON

Posttagmeze de la 28-a de aprilo en Guanĝuang-komunumo, kiu troviĝas en montregiono norde de Gihian-gubernio, Hebej-provinco, iu veterano de la Ruĝa Armeo kun vigla spirito propagandis kaj eksplikis al vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj la politikan raporton de Vicprezidanto Lin. Tiu veterana ruĝarmeano estis neniu alia ol Ĉen Ŝaŭking, vickoman-

danto de la milita subregiono de Tiangin de la Popola Liberiga Armeo.

Vespere de la 27-a publikigis la raporto de Vicprezidanto Lin en la Naŭa Kongreso, kiu estis longe atendita de tiu veterana ruĝarmeano. Fru-matene de la 28-a li havigis al si la tutan tekston de tiu raporto, studis ĝin frazon post frazo kaj serioze faris notojn. Post tagmanĝo, li profundigis en Guanĝuang-komunumon kaj eksplikis la raporton de Vicprezidanto Lin al vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj per siaj propraj revoluciaj travivaĵoj sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ: **“Historia sperto meritas atenton. Linio kaj vidpunkto devas esti preparolataj konstante kaj ripetade. Ili ne devas esti preparolataj nur al malmultaj homoj, sed devas esti konigataj al la vastaj revoluciaj amasoj.”** En sia propagando li varme laŭdis la grandan revolucionan praktikon de Prezidanto Maŭ, la ĉiamvenkan Maŭzedongpenson kaj la proletaran revolucion linion de Prezidanto Maŭ. Tion aŭskultinte, la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj pli profunde ekkonis la saĝecon kaj grandecon de Prezidanto Maŭ. Ili

Armeanoj kaj popoloj kune studas fervore la politikan raporton de Vicprezidanto Lin al la 9-a Kongreso de la Partio.



diris: Kun la saĝa gvido de Prezidanto Maŭ, la ĉina revolucio iras de venko al venko. Prezidanto Maŭ estas ruĝa suno en nia koro! Ni devas aŭskulti ĉiujn liajn vortojn, agi laŭ ĉiuj liaj instruoj kaj por ĉiam sekvi lin fari revolucion kaj rekte antaŭenmarŝi al komunismo.

ARMEANOJ KAJ POPOLANOJ KUNE STUDAS EN JURTOJ

Vespere de la 27-a de aprilo la propaganda taĉmento de Maŭzedongpenso formita de iu limgarda stacio sur la kontraŭreviziisma fronto en Interna Mongolio, galopante sur militaj ĉevaloj sub la gvido de la staciestro kontraŭ vento kaj sablo en Ejliuhaŭte fore de la stacio je pli ol 40 lioj, kun transistora radiofono sur la dorso kaj revolucia ruĝa trezora libreto en la sino disportis la ĝojigan informon pri publikigo de la politika raporto de Vicprezidanto Lin de unu jurto al alia.

Hele lumis lampoj en ĉiuj jurtoj en Ejliuhaŭte. Finaŭskultinte la disaŭdigon la armeanoj kaj popolanoj sidis ĉirkaŭe kaj komencis varman diskuton. Malriĉa paŝtisto, avo Gidinima, kiu antaŭe laboris por brutposedanto kiel sklavo dum duono de sia vivo, emocie prenis la manon de la staciestro kaj diris: “La politika raporto de Vicprezidanto Lin eldiris tion, kio estas en nia koro. Ni paŝtistoj firme subtenas ĝin. En la malnova socio, ni malriĉaj paŝtistoj estis subpremataj de la brutposedantoj kaj laboregis kiel bovoj kaj ĉevaloj; estas Prezidanto Maŭ, kiu nin savis el mizero; la Granda Proletara Kultura Revolucio persone iniciatita kaj gvidata de Prezidanto Maŭ frakasis la burĝaran komandejon estratan de la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki, multe plifortigis la proletaran diktaturon de nia lando kaj evitigis al ni malriĉaj paŝtistoj refojan suferadon. Ni por ĉiam tenos en la koro la bonfarojn de Prezidanto Maŭ.” Tagiĝis, tamen en la jurtoj ankoraŭ entuziasme diskutadis la armeanoj kaj popolanoj. Ili esprimis, ke ili nepre pli bone studos kaj aplikos vive Maŭzedongpenson, profunde kaj plene studos la politikan raporton de Vicprezidanto Lin, perfekte plenumos la diversajn batalajn taskojn elmetitajn de la Naŭa Kongreso kaj per praktikaj agadoj esprimos sian plej altan korsenton al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj la Centra

Komitato de la Partio kun Prezidanto Maŭ kiel la estro kaj kun Vicprezidanto Lin kiel la vicestro.

HEROAJ BATALANTOJ FIRME SUBTENAS LA RAPORTON KAJ NEPRE AGOS LAŬ ĜI

Radiofonoj alportis la politikan raporton de Vicprezidanto Lin. Kun nekomparebla ĝojekscitiĝo, ĝin atente aŭskultis frazon post frazo la komandantoj kaj batalantoj de iu trupo tagnokte gardstarantaj ĉe landlimaj antaŭpostenoj en Tibeto de nia lando.

Apenaŭ finiĝis la disaŭdigo, la komandantoj kaj batalantoj tuj komencis varman diskutadon. Ili diris, ke la raporto de Vicprezidanto Lin alte tenas la grandan ruĝan standardon de Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso, profunde eksplikas la teorion de Prezidanto Maŭ pri daŭra revolucio sub la diktaturo de la proletaro, sisteme resumas la spertojn de la granda kultura revolucio kaj elmetis la estontajn batalajn taskojn de la tuta Partio, tuta armeo kaj tuta popolo, kaj ke ili firme subtenas la raporton kaj nepre agos laŭ ĝi!

Antaŭ la radia elsendo de la raporto de Vicprezidanto Lin, la politika instruanto Ĝang Ŝaŭsong, kiu glorie faris militajn meritojn en la batalo de memdefenda rebato ĉe la landlimo inter Ĉinio kaj Hindio, kun emocio kuris al la disaŭdiga stacio fore je kelkaj lioj kaj alportis elektran fadenon por disetendi la disaŭdigan reton ĝis antaŭpostenoj, tiel ke la komandantoj kaj batalantoj ĉiuj aŭdis la politikan raporton de Vicprezidanto Lin. Al pli malproksimaj postenoj li piediris samnokte tra neĝo kaj trans montoj por propagandi mem la grandan signifon de la raporto de Vicprezidanto Lin.

Post studo de la politika raporto de Vicprezidanto Lin, la batalantoj de la “Subplotono de Jang Ting-an”, kiu glorie faris unuaklasan meriton en la batalo de memdefenda rebato ĉe la landlimo inter Ĉinio kaj Hindio, staris kun revolucia heroeco antaŭ la portreto de Prezidanto Maŭ kaj esprimis sian decidon: Plej ruĝaj estas la koroj de la limgardaj batalantoj, kaj la ruĝaj koroj ĉiam inklinas al Pekino. La instruo de Prezidanto Maŭ estas nia direkto kaj ni ĵuras esti nevelkonta pino sur neĝa monto.

La “Ŝtala Ruĝa 2-a Roto” en Antaŭenmarŝo

KIAM la armeanoj kaj popolanoj centmilione nombraj de nia lando varme jubilas la venkon de la Naŭa Kongreso de la Partio, la Ŝtala Ruĝa 2-a Roto de iu trupo de PLA en Kantono ankaŭ ekbolas en ĝojo. La komandantoj kaj batalantoj de tiu roto diris kun senkompara emocio: “Ni devas ĉiam preni Vicprezidanton Lin kiel brilan ekzemplon kaj senĉese antaŭenmarŝi kaj progresi laŭ la revolucia linio de Prezidanto Maŭ!”

Vicprezidanto Lin estis ĝia unua rotestro.

Ekde la unua tago de sia fondiĝo sur Gingga-montaro la Ŝtala Ruĝa 2-a Roto estas nutrata de la granda Maŭzedongpenso. Sub la rekta komando de Vicprezidanto Lin la kamaradoj de la ruĝa 2-a roto faris multajn meritojn por la proletara regpotenco; ili fulmorapide konkeris Ludingponton, triumfis en la pasejo Pinghingguan, militis en la okcidenta ebenejo de Liaŭning-provinco kaj ekspediciis suden ĝis Vuĝi-monto. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, Vicprezidanto Lin montris intiman zorgemon al la ruĝa 2-a roto. La 2-an de januaro, 1959, Vicprezidanto Lin inspektis la roton kaj donis al ĝi kuraĝigan surskribon “Senĉese antaŭenmarŝu kaj progresu”. Firme tenante ĉi tiun instrukcion de Vicprezidanto Lin en la memoro kaj prenante Vicprezidanton Lin kiel brilan ekzemplon, la kamaradoj de la ruĝa 2-a roto vive studas kaj vive aplikas Maŭzedongpenson, revolucias daŭre kaj ĝisfunde, plifortigas la revolucian konstruadon de la roto, kaj faris novajn meritojn en la Granda Proletara Kultura Revolucio.

Preni Vicprezidanton Lin kiel brilan ekzemplon, esti senlime fidelaj al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, al la granda Maŭzedongpenso kaj al la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ — tio estas la baza kaŭzo de ilia senĉesa antaŭenmarŝo kaj progreso sur la revolucia vojo en la pasinteco kaj ankaŭ ilia ĵuro por daŭre antaŭenmarŝi kaj progresi senĉese en la estonteco!

PRENI VICPREZIDANTON LIN KIEL BRILAN EKZEMPLON KAJ ESTI ĈIAM FIDELAJ AL PREZIDANTO MAŬ

Malnovaj batalantoj forlasis la ruĝan 2-an roton aron post aro kaj venis al ĝi novaj. La membroj ŝanĝiĝas ĉiujare. Tamen la glora tradicio de senlima fidelo al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ persone starigita de Vicprezidanto Lin en tiu ĉi roto daŭras de generacio al generacio kaj neniam ŝanĝiĝis.

La ĵus alvenintaj novaj batalantoj tre rapide ekkonis la gloran historion de la roto. En la periodo de fondo de armeo sur Gingga-montaro estis Prezidanto Maŭ, kiu persone sendis al la ruĝa 2-a roto partian reprezentanton kaj estis Vicprezidanto Lin, kiu persone kondukis la reprezentanton al la roto; kiam la tri disciplinoj kaj ok atentoj persone difinitaj de Prezidanto Maŭ estis prove praktikataj, estis Vicprezidanto Lin, kiu persone gvidis la tutan roton firme plenumi ilin, profundiĝi inter la popolamasojn kaj fari amasajn laborojn. Vicprezidanto Lin plej firme efektivigis la proletaran armeokonstruan linion de Prezidanto Maŭ kaj konstruis la ruĝan 2-an roton en heroan roton senlime fidelan al Prezidanto Maŭ. En la jaroj plenaj de bataloj, Vicprezidanto Lin plej fidele plenumis la revolucian linion de Prezidanto Maŭ, vive aplikis la penson de Prezidanto Maŭ pri militaj aferoj kaj strikte sekvis Prezidanton Maŭ komandante sian ruĝan 2-an roton militi sude kaj norde. La historio de la ruĝa 2-a roto estas brila historio, en kiu Vicprezidanto Lin gvidis la roton strikte sekvi Prezidanton Maŭ; la glora tradicio de la ruĝa 2-a roto estas glora tradicio de senlima fidelo al Prezidanto Maŭ, persone starigita de Vicprezidanto Lin. Pri tiu ĉi brila historio kaj tiu ĉi glora tradicio, la kamaradoj de la ruĝa 2-a roto parolas ĉiujare, ĉiumonate kaj ĉiutage. Ju pli ili parolas, des pli profunde ili komprenas la signifon de la brila ekzemplo de Vicprezidanto Lin en senlima fidelo al Prezidanto Maŭ. Ju pli ili parolas, des pli ruĝiĝas ilia koro fidela al Prezidanto Maŭ.



Sub la brilo de la venko de la 9-a Kongreso de la Partio, alte tenante la grandan ruĝan standardon de Maŭzedongpenso, la komandantoj kaj batalantoj de la Ŝtala Ruĝa 2-a Roto grandpaŝe kaj "senĉese antaŭenmarŝas kaj progresas".

Rekrutoj, kiuj armeaniĝis en februaro de la pasinta jaro, estis tuj infektitaj de la batala historio de la roto kaj la sento de senlima fideleco al Prezidanto Maŭ de la kamaradoj de la ruĝa 2-a roto, apenaŭ ili enpaŝis la kazernojn de la roto. Ili diris: Por esti revolucia batalanto de la Ŝtala Ruĝa 2-a Roto, oni nepre devas esti senlime fidelaj al Prezidanto Maŭ, same kiel Vicprezidanto Lin! Post kiam rekruto Huang Kjuangiu lernis la gloran historion pri la senlima fideleco al Prezidanto Maŭ de la ruĝa 2-a roto sub la direktado de Vicprezidanto Lin en la historia ĉambro de la roto, li faris solenan ĵuron alte tenante la ruĝan trezoran libron antaŭ la portreto de Prezidanto Maŭ: Mi prenos Vicprezidanton Lin kiel brillan ekzemplon kaj fariĝos bona posteulo de la ruĝa 2-a roto kaj bona batalanto fidela al Prezidanto Maŭ dum la tuta vivo!

Iun vesperon de marto ĉijare, ruĝa radio alsendis la plej novan instrukcion de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ: **"Estas necese serioze resumi sperton."** En tiu tempo, Huang Kjuangiu kaj du aliaj rekrutoj estis plenumantaj la taskon subteni maldekstrulojn en iu policstacio de loĝkvartaloj. Ili registris la plej novan instrukcion de Prezidanto Maŭ vorton post vorto. Poste ili

kune studis serioze la instrukcion. Kamarado Huang Kjuangiu pensis, ke en la nuna granda stadio de batalo, kritiko kaj reformo, tiu ĉi plej nova instrukcio de Prezidanto Maŭ estas tre ĝustatempa kaj tre grava, kiun ili devas ne nur efektivigi en la batalo, sed ankaŭ propagandi tuj al la vastaj amasoj. Sed, kiel propagandi? Pro manko de mimeografilo la instrukcio de Prezidanto Maŭ ne povis esti multoble reproduktita. Cetere ankaŭ ne eblis komuniki la instrukcion de Prezidanto Maŭ al ĉiuj loĝantoj lege, ĉar estis jam profunda nokto kaj ili troviĝis dise. Ĝuste en tiu tempo lin kuraĝigis la brila ekzemplo de Vicprezidanto Lin, kiu instigis la vastajn amasojn de laboristoj kaj kamparanoj vive studi kaj vive apliki la verkojn de Prezidanto Maŭ. Huang Kjuangiu kaj la du rekrutoj unuanime opiniis post konsiliĝo, ke ili devas esti senlime fidelaj al Prezidanto Maŭ same kiel Vicprezidanto Lin kaj nepre propagandi la plej novan instrukcion de Prezidanto Maŭ, eĉ se pli grandaj malfaciloj starus antaŭ ili. Tiel ili decidis kaj serioze komencis mane kopii la instrukcion vorton post vorto. Kiam nombro da kopiaĵoj estis farita, ili tuj distribuis ilin al loĝantoj. Post tio ili denove komencis kopii kaj distribui. Tion ili ripetadis fojon post fojo. Kiam ili dis-

donis la instrukcion, ili ankaŭ faris klarigon al la amasoj. Tiamaniere ili laboris de la deka de la nokto ĝis la antaŭtagmezo de la sekvinta tago, sume kopiis 900 ekzemplerojn kaj disdonis ilin de domo al domo al ĉiuj familioj. Tuj post tio ili funkciigis kursojn por ke la loĝantoj, junaj kaj maljunaj, ĉiuj studu la plej novan instrukcion de Prezidanto Maŭ. Iu avino kun la aĝo de 89 jaroj emocie diris: "Kamaradoj PLA-anoj estas plej fidelaj al Prezidanto Maŭ kaj plej amas la popolon. Ni nepre devas esti senlime fidelaj al Prezidanto Maŭ same kiel la batalantoj de la Liberiga Armeo."

DISVOLVI LA BONAN REVOLUCIAN LERNOSTILON KUN VICPREZIDANTO LIN KIEL BRILA EKZEMPLO

Vicprezidanto Lin instruas al ni: "En la lernado de la verkoj de Prezidanto Maŭ, oni devas studi kun demandoj, studi kaj apliki ilin vive, kombini studon kun apliko, studi unue kion oni urĝe bezonas por rikolti tujajn rezultojn, kaj peni plej energie pri aplikado de ĉio studita." La kadroj kaj batalantoj de la ruĝa 2-a roto sentas aparte intima tiun ĉi instrukcion de Vicprezidanto Lin kaj komprenas ĝin aparte profunde. Ili diris: "Tio estas la resumo de kelkdekjara sperto de Vicprezidanto Lin en sia penema studo de la verkoj de Prezidanto Maŭ. Ni devas ĉiam preni Vicprezidanton Lin kiel brilan ekzemplon kaj peni plej energie pri apliko en viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso.

Batalanto kun kvin bonoj Huang Ĵonggen venis en la ruĝan 2-an roton en septembro, 1964. Li

firme tenas en sia memoro la instrukcion de Vicprezidanto Lin, legis la ruĝan trezoran libreton ĉiutage kaj penis energie remuldi sian animon ĉie aplikante la lernitaĵojn. De kelkaj jaroj li estis elektita ĉiujare kiel aktivulo de viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso kaj batalanto kun kvin bonoj kaj estas glorie nomata de ĉiuj kamaradoj "bovo de la revolucio". La Tria Ponarda Subplotono direktata de li estis elektita kiel subplotono kun kvar bonoj ĉiujare.

En januaro ĉijare, Huang Ĵonggen venis al iu produkta brigado por plenumi taskon. Demetinte tornistran, li tuj iris al malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj, laboris kaj studis verkojn de Prezidanto Maŭ kune kun ili. Iutage, li subite aŭdis helpkrion pri incendio, kiam li ĵus eliris el la hejmo de iu vilaĝano. La fajrolumo estas ordono al batalo kaj la fajrokampo estas batalekampo. Huangĉjo tuj kuris rekte al la fajrokampo. Li vidis, ke la brullumo leviĝas ĝisĉiele, densaj fumo kaj sub la blovo de forta vento la flamoj jam atingis la tegmenton. La fajrego ja alportos grandan damaĝon al la posedaĵoj de la malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj. Li sentis doloron, kvazaŭ la fajro brulus en lia koro. Li pensis, ke same kiel Vicprezidanto Lin la batalantoj de la ruĝa 2-a roto ĉiam plenumas firme la instruon de Prezidanto Maŭ "tutkore kaj tutanime servi al la popolo". Nun estas por li tempo de provado. Rekte renkonte al la ruliĝanta fajrodrako li ĵetis sin sur la tegmenton. Brulanta trabo peze falis sur lian ŝultron, ĉio mallumiĝis antaŭ liaj okuloj kaj li falis de sur la tegmento. Kiam malriĉkam-

Sub la flegado de Maŭzedongpenso, nova generacio de la Ŝtala Ruĝa 2-a Roto rapide kreskas. Jen estas novaj partianoj aliĝintaj al la Partio dum la tempo de venka okazigo de la 9-a Kongreso de la Partio.





Kamarado Ĝan Ĝingvu, regimenta politika komisaro, rakontas al la komandantoj kaj batalantoj de la dua roto pri la brilaj modelaj agoj de Vicprezidanto Lin por helpi ilin serioze studi la politikan raporton de Vicprezidanto Lin al la 9-a Kongreso de la Partio.

paranoj kaj malsuperaj mezkampanoj alkuris por lin savi, li laŭte kriis: “Ne zorgu min, gravas estingi la fajron!” Tion dirinte li tuj svenis.

La fajro estis estingita. Kun vundoj Huang Ĵonggen organizis kurson de Maŭzedongpenso kune kun la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj, kiuj suferis perdojn pro la incendio. Ili kune lernis la grandajn instruojn de Prezidanto Maŭ kaj rememoris la pasintan amaron en komparo kun la nuna dolĉo por kuraĝigi ĉiujn venki la malfacilojn. Maŭzedongpenso prilumis la koron de malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj. Ili diris: “Havante la Partion, Prezidanton Maŭ kaj la ĉiamvenkan Maŭzedongpenso, ni timas nenian malfacilon, tute egale, kiom ajn granda ĝi estas.” Por helpi la malriĉkampanojn kaj malsuperajn mezkampanojn en solvado de la malfacilaĵoj, Huang Ĵonggen donis al ili 10 yuan, kiujn li ŝparis. Li diris: “Povi iom malpliigi la malfacilon al la

malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj estas por mi feliĉo!”

Same kiel Huang Ĵonggen la kadroj kaj batalantoj de la ruĝa 2-a roto ĉiuj vive studas kaj vive aplikas Maŭzedongpenso kaj klopodas grimpi sur la pinton de “kolektivismo”. Iun profundan nokton la roto informiĝis, ke estas necese fari transplanton de haŭto al iu klasa frato, kiu estis brulvundita en batalo por sekurigi posedajon de la ŝtato. Ĉiuj kamaradoj konkure sin anoncis por liveri sian haŭton. Tio embarasis la rototron kaj la politikan direktanton. Post malfacila admono ili fine decidis sendi nur 11 reprezentantojn. Sed, kiam tiuj venis al la hospitalo, la kuracisto diris, ke sufiĉas nur du kamaradoj por tio. Hu Joŭming, vicrotestro kiu kondukis la reprezentantojn, diris: “Necesas nur du reprezentantoj, do unu el soldatoj kaj alia el kadroj. Tiu el kadroj estas mi.” Tion dirinte li kuŝiĝis sin sur la operacian stablon kaj liveris la unuan

pecon da haŭto. Inter la soldatoj troviĝis nova batalanto Liang Gingpo. Li elpremiĝis antaŭen al la kuracisto kaj diris: "Mi estas la plej juna kaj mia haŭto estas plej bona; mi liveros definitive." La operacio komenciĝis. Tenante la ruĝan libreton *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* en la mano, malgranda Liang parkere legis mallaŭte la grandajn instruojn de Prezidanto Maŭ pri "ekskluziva" kaj "senrezerva" servado al popolo. La unua peco da haŭto estis deprenita, sed li ankoraŭ ne volis leviĝi kaj insiste petis kuraciston preni de li ankoraŭ unu pecon. Malgranda Liang kontente forlasis la operaciejon nur kiam li oferis alian pecon de sia haŭto.

En la studado de verkoj de Prezidanto Maŭ, la kadroj kaj batalantoj de la ruĝa 2-a roto tuj aplikas kion ili studis, kaj penas tiel en studado kiel en aplikado. Ili gravuris en sian cerbon la instrukcion de Vicprezidanto Lin "peni plej energie pri aplikado de ĉio studita", disvolvas la bonan revolucion stilon de lernado por sin hardi en revolucion batalanton servantan tutkore al la kolektivo dum la tuta vivo.

PRENANTE VICPREZIDANTON LIN KIEL BRILAN EKZEMPLON, LA GVIDAJ GRUPOJ ESTAS RUĜAJ DE GENERACIO AL GENERACIO

Vicprezidanto Lin estis la unua estro de la roto kaj lia brila ekzemplo ĉiam edukas kaj kuraĝigas la kadrojn de la ruĝa 2-a roto. Ili kreskas rapide kaj sane sub la sunbrilo de Maŭzedongpenso kaj estas plenaj de freŝa vigleco.

Rotestro Lej Juevej venis al la ruĝa 2-a roto en la jaro 1965. Forpasis jam kvar jaroj, de kiam li fariĝis la estro de la roto. En la komenco ĉijare li estis elektita kiel aktivulo de viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso kaj reprezentanto por partopreni la kongreson de rotoj kun kvar bonoj kaj batalantoj kun kvin bonoj de la Kantonaj trupoj de PLA. Kiam li revenis al la roto post la kongreso, oni ĝuste faris transpostenigon de kadroj de la roto. La nova politika direktanto de la roto Li Guocaj kaj la nova vicdirektanto Ĝaŭ Ping estis siatempe respektive la estro de la tria subplotono kaj batalanto de la roto, kiam li venis al ĝi. Ĉiuj novaj plotonestroj estis subplotonestroj de la roto. Tiu nova ŝanĝiĝo tre emociis lin. En tiuj novaj fortoj li vidis ke la revolucio antaŭenmarŝas kaj la afero de la Partio prospere disvolviĝas. Li rememoris la historion de la kreskado de la roto sub la sunbrilo de Maŭzedongpenso kaj la feliĉajn scenojn

de la inspektado al ĝi fare de Vicprezidanto Lin en januaro de 1959 kaj samtempe pensis pri la glora tasko ŝargita al sia roto. Pripensante ĉion ĉi tion, li sentis sian koron ondanta kvazaŭ ruliĝanta maro. En la sama vespero li kunvokis kunvenon de komitatanoj de la partia filio. Kamaradoj diris: "La Ŝtala Ruĝa 2-a Roto estas ruĝa pro tio, ke ĉiam restas senŝanĝaj la freŝa vigleco kaj la penso de ĝisfunda revolucio de ĝia gvida grupo, kvankam ties membroj de tempo al tempo ŝanĝiĝas." Ĉiuj komitatanoj unuanime esprimis, ke ili firme sekvos la grandan instruon de Prezidanto Maŭ "**formi revolucionan gvidan grupon, kiu ligiĝas kun la amaso**", la malnovaj kaj novaj kadroj unuiĝos inter si, respektos reciproke kaj lernos unu de alia, por ke la gvida grupo de la ruĝa 2-a roto por ĉiam konservu la ruĝan koloron. En la sekvinta tago kiel sekretario de la partia filio Lej Juevej esprimis al la tuta roto la decidon de la nova gvida grupo. Poste li surportis sian tornistran kaj iris loĝi en la kvara subplotono kaj tie ricevis varman bonvenigon de la batalantoj.

Politika direktanto Li Guocaj estas nova kadro, kiu armeaniĝis en la jaro 1963. Firme memorante la grandan instruon de Prezidanto Maŭ "**esti kaj estro kaj ordinara popolano**" kaj prenante Vicprezidanton Lin kiel brillan ekzemplon, li ĉiam konservas la bonan tradicion de profundiĝo inter la amasojn kaj en la praktikajn laborojn. Li tuj venis al la oka subplotono por tie loĝi kiam li komencis labori kiel politika direktanto de la roto. Iun fojon, kiam li revenis de la dividita sidejo post kunveno, estis jam dekdua horo nokte. Kaj post okazigo de kunsido de la komitato de la partia filio, estis jam la unua post la noktomezo, tamen li ankoraŭ ne forgesis la batalantojn, kiuj troviĝis dise en deĵorpunktoj, kaj tuj surportis sian tornistran por iri al tiuj deĵorpunktoj.

La kadroj de la ruĝa 2-a roto ĉiam kaj ĉie prenas Vicprezidanton Lin kiel brillan ekzemplon, vive studas kaj vive aplikas Maŭzedongpenson kaj laboras kun freŝa vigleco. Ili laboras kun senprecedenca entuziasmo kaj profundiĝas inter la amasojn. La batalantoj prenas ĉiujn iliajn agadojn en siajn okulojn kaj ĝoje diris: "Se la kadroj de nia roto ĉiam prenas Vicprezidanton Lin kiel brillan ekzemplon, vive studas kaj vive aplikas Maŭzedongpenson, ili certe povos gvidi la tutan roton senĉese antaŭenmarŝi kaj progresi sur la reloj de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ!"

Ju Ĉun — Bona Kadro de Prezidanto Maŭ

Ju Ĉun, la politika komisaro de la post-restanta oficejo de iu artileria trupo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo estas komunisto, kiu ĉiam konservas sian revolucionan junecon.

Ju Ĉun, filo de malriĉkamarano, surpaŝis la revolucionan vojon en la plej malfacilaj jaroj de la Kontraŭjapana Rezistmilito. Dum pli ol 20 jaroj, sub la nutrado de Maŭzedongpenso, Ju Ĉun kuraĝe batalis kaj diligente laboris, tiel ke li estis honore premiita kaj elektita kiel modelo multfoje. En la periodo de socialisma revolucio, Ju Ĉun sekvas la instruojn de Prezidanto Maŭ, ne fieras pro siaj meritoj sed grandpaŝe antaŭenmarŝas laŭ la vojo de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, ĉiam konservante al si plenan revolucionan vigecon. La grandnombraj revoluciaj amasoj kaj kadroj nomas lin “bona kadro de Prezidanto Maŭ” kaj “nia bona politika komisaro”.

EN HOSPITALOJ

En printempo de 1961 subite malsaniĝis Ju Ĉun, kaj lia korpa pezo abrupte falis de pli ol 65 kilogramoj ĝis malpli ol 45. Post diagnozo estis konstatite, ke li suferas kolonadenkanceron.

Ju Ĉun alfrontis rigoran provon inter vivo kaj morto.



Kamarado Ju Ĉun studas diligente la brilan verkon de Prezidanto Maŭ Servu al la Popolo.

Nelonge poste, la hospitalo faris por li kancerektomion. Lia intesto estis fortranĉita je pli ol du futoj, kaj la operacio sukcesis.

Pri fortranĉo de kancero tiam estis onidiroj, ke post operacio la paciento povas plu vivi maksimume nur 3-5 jarojn, kaj ke ĉiutempe estas la danĝero de disvastiĝo de la kancero. En la restanta mallonga vivo, Ju Ĉun pensis antaŭ ĉio pri la granda gvidanto

Prezidanto Maŭ kaj la revolucia afero. Li diris: “Kiel pasigi la ‘3-5 jarojn’ estas demando, kiu montras, ĉu oni fidelas al Prezidanto Maŭ aŭ ne. En la okuloj de la komunisto ‘tri aŭ kvin jaroj’ absolute ne estas signalo por negativa atendo de morto, sed povas esti nur signalo al batalo kaj al pli energia laboro por la Partio!”

Antaŭ la minaco de morto Ju Ĉun persistis en studado de verkoj de Prezidanto Maŭ kun profunda sento de la proletaro kaj mirinda energio. Kuraĝe sur lito li frazon post frazo tralegis la kvar volumojn de *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*. La brilajn “tri popularajn artikolojn” li bone studis kaj vive aplikis. Iutage, kiam li denove tralegis la artikolon *Servu al la Popolo* venis al li en la kapon la demando: “Kiel oni povas servi al la popolo ‘ekskluzive’ kaj ‘senrezerve’ en la kriza momento inter vivo kaj morto?” Pri tio li ripetade meditis kaj meditis.

Turmentata de la doloro kaŭzata de kancero, Ju Ĉun tutforte klopodis propagandi Maŭzedongpenson kun plej granda fideleco al Prezidanto Maŭ. Li estis transsendita al pluraj hospitaloj. En ĉiu malsanuleja distrikto, en kiu li enloĝis, tuj aperis fervora atmosfero de studo de verkoj de Prezidanto Maŭ; en ĉiu partia filio, kiun li eniris, tuj ekvigliĝis la politika kaj ideologia laboro. Ju Ĉun estis komitatano de partia filio de malsanuleja distrikto. Foje, kunvenis la komitatoj de la partia filio, oni ne sciigis lin pro la konsidero de lia alta febro. Sed kiam li informiĝis pri tio, li penis iri al la kunsido kun sia tuta forto. En ĝi li detale eldiris siajn ideojn pri studo de verkoj de Prezidanto Maŭ kaj zorgo pri la aktualaj pensoj de la laborantoj kaj pacientoj. Li revenis sian ĉambbron subtenate de aliaj, nur kiam li perdis eĉ sian forton por parolo.

Malgraŭ sia kancera doloro Ju Ĉun klopodis prizorgi aliajn malsanulojn. Eĉ kiam la kancera doloro forte turmentis lin, li volonte tion toleris por ne ĝeni aliajn. Iun profundan nokton, denove ekturmentis lin la kancero. Pensante pri la brila figuro de kamarado Bethune, kiu en sia lasta momento de la vivo insistis, ke la milita kuracisto faru operacion unue por savi aliajn vunditojn anstataŭ lin, li ne faris eĉ unu ĝemeton, kvankam li tutkorpe ŝvitis pro dolorego. Kiam la flegistino volis venigi kuraciston, li tuj diris: “La kuracistoj havas multajn laborojn tage, lasu ilin havi sufiĉan dormon.”

En tia maniero, Ju Ĉun ja praktikis per siaj agoj la instruon de Prezidanto Maŭ pri “**kompleta sindono al aliaj sen ajna konsidero pri si mem**”.

Dum la turmentado de la kancero, Ju Ĉun neniam malstreĉis la penadon pri remuldo de sia mondkoncepto. Uzante la “tri popularajn artikolojn” de Prezidanto Maŭ kiel spegulon, li senkompate batalis kontraŭ sia egoismo en la kapo.

Por kiel eble plej frue forlasi la hospitalon kaj daŭre servi al la popolo, Ju Ĉun intensigis sian korpokercadon kvazaŭ por batalo.

Nur kelkajn tagojn post la operacio, li jam ellitiĝis por ekzerci sin en piedirado ekster ĉies atendo. Premante la ventron per unu mano kaj apogante sin sur la muro per la alia, li sukcesis fari la unuan paŝon spirante malfacile kaj ŝvitante multe.

Du monatojn poste, Ju Ĉun venkis la kanceron kaj morton. Kaj kun plena entuziasmo, li suriris novan batalan postenon.

Portante kun si kvar volumojn da brilaj verkoj de Prezidanto Maŭ, Ju Ĉun venis al la postrestanta oficejo por labori kiel politika komisaro.

Alveninte al la oficejo, li tuj iris profunde inter la amasojn por fari enketojn kaj vizitojn por ekkoni la staton de la pensoj de la familianoj de la armeanoj, laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ ke “**politika laboro estas vivlinio de ĉiu ekonomia laboro**”. Li opiniis, ke armi la amasojn per Maŭzedongpenso estas la plej granda politiko kaj ankaŭ devo de gvidantoj. Li diris al la kadroj: “En la laboro inter familianoj same kiel en la laboro en trupoj, oni devas antaŭ ĉio okupiĝi pri la politika kaj ideologia laboro. Se oni zorgas nur la ĉiutagan vivon de la familianoj anstataŭ ilian pensadon, oni certe perdos sian direkton en la revolucio.” Liaj vortoj multe inspiris la kadrojn. Multe levante sian konon kaj havante klaran direkton de laboro, la kadroj energie klopodis en la politika kaj ideologia laboro. Komencante sian laboron per klasa eduko, konforme al la aktualaj pensoj de la familianoj ili organizis la familianojn por vive studi kaj vive apliki verkojn de Prezidanto Maŭ kaj partopreni kolektivajn produktajn laboron en kulturebligo de virga tero. Kaj la dommastrinoj ekkonsciis ke ankaŭ mastrumado de hejmaj aferoj estas revolucia laboro, kiun oni devas fari sub la plena gvido de Maŭzedongpenso, kaj ke en edukado de infanoj oni devas elkulturi ilin en daŭrigantojn de la revolucia afero de la proletaro.

Suferante malsanon, Ju Ĉun ĉiam kun plena fervoro propagandis Maŭzedongpenson al dommastrinoj kaj ties infanoj. Iufoje, li faris detalan preparon por doni al la armeanoj familianoj paroladon por helpi ilin en studo de verkoj de Prezidanto Maŭ. Sed ĝuste en la tago por fari la paroladon subite doloregis al li la ventro, kaj li sentis malvarmon tra la tuta korpo. La kadroj konsilis lin ripozi kaj proponis, ke iu paroladu anstataŭ li, sed li diris: “Vi ja ne faris preparon, preferu lasi min prelegi! La lernado ne devas esti influata de mia malsano.” En la prelegejo Ju Ĉun laŭte legis verkon de Prezidanto Maŭ kaj serioze eksplikis la grandajn instruojn de Prezidanto Maŭ. Nur kiam li finis sian paroladon la aŭskultantoj ekrimarkis, ke lia vizaĝo jen kaj jen paliĝas, kaj informiĝis ke li venis kun malsano por doni la prelegon. La dommastrinoj estis tre kortuŝitaj kaj diris: “Nia bona politika komisaro, kiom vi sindone klopodas por propagandi Maŭzedongpenson kaj por revoluciigo de nia ideologio!”



Kamarado Ju Ĉun (meze) intime interparolas kun familianoj de armeanoj.

Nelonge poste, la supera instanco decidis konstrui kazernon por la postrestanta oficejo. En tiu tempo Ju Ĉun estis malforta pro la farita operacio. Por trovi konvenan lokon por la konstruota kazerno, kies lokiteco devas ebligi ke la familianoj kaj infanoj de la armeanoj ne disiĝos de fizikaj laboroj kaj de la amasoj kaj ke ĝi ne okupos la kulturatan areon, li persone gvidis siajn subulojn surgrimpiti la montojn ĉirkaŭ la gubernia urbo, forgesante dormi kaj manĝi. Por multe, rapide, bone kaj ŝpareme konstrui la kazernon kaj por ke la familianoj sentu la varman prizorgemon de la Partio al ili kaj vekti ilian revolucionan fervoron, spite al la doloro kaŭzita de sia malsano, li detale informiĝis pri ĉio rilate al la ventforto kaj pluvkvanto de la loko, enketis la tiean erozian staton de la tero, observis la ruinaĵojn de cent jaroj por studi la rezistpovon de argila muro kontraŭ la vento kaj pluvo. Iufoje, pro tro granda laciĝo li svenis sur montdeklivo. Liaj kamaradoj portis lin al la kuraca taĉmento. La kuracistoj diris kun bedaŭro kaj plendo: “Komisaro Ju, vi scias prizorgi nur la amasojn, sed neniam vin mem. Ĉifoje vi devas bone ripozi!” Tamen du horojn poste, li nerimar-kite forlasis la kuracan taĉmenton kaj denove iradis por trovi lokon por la kazerno.....

Prizorgemo de Ju Ĉun al la vivo de amasoj estas tre detala kaj senpreterlasa. Iufoje, Vang Jiĝen estis vizitonta sian edzon en la garnizonejo. Antaŭvespere Ju Ĉun jam zorgis pri ŝi pensante ke ŝi devos kunporti siajn tri infanojn kaj ankaŭ pakaĵojn, kaj krome la aŭtobuso ekveturos tre frue.

Sen bona aranĝo ŝi ne sukcesos atingi ĝin ĝustatempe. Lia penso ĉiam kroĉiĝis al tiu afero, tiel ke li ne povis endormiĝi, ellitiĝis jam antaŭ krepuskiĝo, kaj iris por helpi ŝin porti pakaĵojn per biciklo kaj zorgi la infanojn. Kiam li atingis la loĝejon de Vang Jiĝen, lia brakhorloĝo montris, ke estas nur la 4-a horo. Pensante ke ŝi tre laciĝos morgaŭ de la tuttaga veturado, li decidis lasi ŝin dormi pli da tempo. Li do eksidis sur la perono kaj komencis atendi silente. Nur je la 5-a horo, li ekfrapis je la pordo. Vidante ke jam estas la 5-a horo, Vang Jiĝen iom maltrankviliĝis. Ju Ĉun ŝin konsolis: “Ne grave, mi jam antaŭkalkulis la tempon, ni certe atingos la aŭtobuson!” Tion dirinte li helpis ŝin fari aranĝadon kaj akompanis ŝin kaj ŝiajn infanojn kun la pakaĵoj ĝis la aŭtobusa stacio. Sidante en la aŭtobuso Vang Jiĝen neniel povis senti kvieton en sia koro. Ŝi pensadis ke komisaro Ju prizorgis ĉion por ŝi eĉ pli detale ol ŝi mem!

ĈIAM KONSERVI LA NATURON DE LA LABORANTA POPOLO

La granda gvidanto Prezidanto Maŭ diris: **“Ni komunistoj ne celas fariĝi estroj, sed fari revolucion; ni ĉiuj devas havi ĝisfundan revolucionan spiriton, sed ne devas disiĝi de la amasoj eĉ je momento. Se ni nur ne disiĝos de la amasoj, ni certe venkos.”**

Pri tiu ĉi granda instruo de Prezidanto Maŭ Ju Ĉun havas profundan komprenon. Li diris: “Nur ne disigante sian korpon de fizika laboro kaj sian koron de la amasoj, gvida kadro povas ĉiam



Kamarado Ju Ĉun (dekstre) ĉeestas la familian kunvenon pri studo kaj apliko de verkoj de Prezidanto Maŭ en la hejmo de iu armeano.

konservi al si la naturon de la laboranta popolo kaj la revolucion junecon.” De multaj jaroj Ju Ĉun vivas peneman kaj malluksan vivon, same kiel en la militaj jaroj. Lia moskitvualo estas flika fojo post fojo kaj ankaŭ sur lia littuko unu flikaĵo kuŝas sur alia, sed li uzadas ilin kiel multvaloraĵon ĝis nun. Vidante ke li estas korpe malforta, liaj kamaradoj ofte zorgeme konsilis al li: “Ho, kamarado komisaro, vi ja estas malsana, vi devas sufiĉe zorgi pri la nutrado!” Ĉikaze li ĉiam diris al ili: “La ĉiutagan vivon oni devas kompari kun tiu en la malnova socio, kun tiu de la malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkampanoj kaj kun tiu de la ankoraŭ ne liberigitaj laborantaj popoloj en la mondo. Ordinaraĵoj kaj manĝoj estas la plej bonaj nutraĵoj.” Li kun pacienco klarigis al aliaj: “Se iu gvida kadro prizorgas

nur sian nutrado, sed ne revolucion, konsiderante ke lia korpo fariĝas pli ‘altvalora’ kun la promociado de lia ofico, kaj ĉasas privilegion en la vivo, tiu certe disiĝos de la amasoj kaj fariĝos reviziisto.”

Por efike preventi la sintenon de mandareno Ju Ĉun persistas en partoprenado de fizikaj laboroj. Dum multaj jaroj la tempo de lia partopreno en fizika laboro estas nekalkulebla; ĉu en printempa plugado aŭ en aŭtuna rikoltado, ĉu en batalo kontraŭ sekeco aŭ en drenado de stagna akvo, ĉu en urĝa savo en akcidento aŭ en batalo kontraŭ katastrofo, ĉu en pontokonstruado aŭ en vojoriparado, en ĉio li senescepte partoprenas. Eĉ kiam li revenas al sia hejmvilaĝo por viziti sian familion, ankaŭ tie li partoprenas la kolektivajn produktajn laborojn kune kun la komunumanoj. Dum la konstruado de la kazerno, kvankam Ju Ĉun ne

estis forta, tamen ĉiutage li laboris inter la amasoj por transporti ŝtonojn, elakvigi sablon, ŝultropoti lignojn kaj transporti brikojn kaj tegolojn. Iun matenon, kiam oni iris al rivero por elakvigi ŝtonojn, Ju Ĉun la unua envadis en la malvarman akvon. Ĉe unu flanko apud li same laboris lia edzino kaj iliaj tri infanoj, ĉe la alia flanko lia maljuna patrino, kiu venis dume por lin viziti. Neniu povis esti ne kortuŝita, vidante la laborantajn tri generaciojn de tiu familio!

En la lastaj jaroj, kvankam plialtiĝis la ofico de Ju Ĉun kaj kun la kresko de la aĝo li fariĝis pli malforta, tamen neniom ŝanĝiĝis lia amo al fizika laboro kaj intima sento al la laboranta popolo.

FARI NOVAJN MERITOJN POR LA POPOLO

Ĉiun batalordonon donitan de la proletara komando kun Prezidanto Maŭ kiel la estro kaj Vicprezidanto Lin kiel la vicestro, Ju Ĉun ĉiam varme subtenas kaj firme efektivas. Strikte sekvante la grandajn strategiajn dispoziciojn de Prezidanto Maŭ, li kun plena fervoro sin ĵetis en la grandan proletaran kulturen revolucion movadon.

Ĵus kiam leviĝis la nomita senprecedenca amasa movado, Ju Ĉun, kiu tiam troviĝis en fora mont-regiono, jam observis la disvolviĝon de la movado kun senkompara ĝojo. Matene, li funkciigis la radioricevilon por aŭskulti la plej novajn instrukciojn de Prezidanto Maŭ el Pekino; profundan nokton, li kun sia tuta atento studis koncernajn verkojn de Prezidanto Maŭ por kapti la spiriton de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ.

Trovante ke Prezidanto Maŭ prizorgas kaj subtenas la movadon de la ruĝa gvardio, Ju Ĉun tuj strikte sekvis Prezidanton Maŭ, varme amante kaj subtenante la ruĝan gvardion per praktikaj agoj. Kiam ruĝaj gvardianoj preterpasis la sidejon de la postrestanta oficejo kaj tie ripozis dum sia longa marŝado por fari sperto-interŝanĝajn vizitojn, Ju Ĉun kunvokis la infanojn en la kazerno por kune kun si porti tornistrojn, lavi vestojn kaj boligi akvon por la gastoj kaj lerni de ili la revolucion spiriton.

Kiam la infanoj sub la zorgo de la postrestanta oficejo faris similajn longajn marŝadojn, antaŭ ilia ekiro Ju Ĉun foje-foje instruis al ili: "Vi devas sekvi la instruon de Prezidanto Maŭ iri en la revolucion amasan movadon por sperti ventojn kaj pluvojn kaj vidi la mondon, iri la vojon de la antaŭa Ruĝa Armeo por hardi vin kiel daŭrigantojn de

la revolucia afero de la proletaro."

Sub la direktado de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, Ju Ĉun gvidis la kadrojn de la tuta postrestanta oficejo kaj la familianojn de la armeanoj por formi sin en fortan batalan kolektivon kaj fari la postrestantan oficejon ruĝa, granda lernejo de Maŭzedongpenso.

En marto de 1968, dum la periodo de partopreno en la Kongreso de Aktivuloj de Studo de Verkoj de Prezidanto Maŭ en Artileriaj Trupoj, Ju Ĉun, bona kadro de Prezidanto Maŭ, dufoje vidis la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ!

Ju Ĉun neniam povos forgesi la plej feliĉan momenton, en kiu li, kun bolanta sango kaj granda emocio, rigardis la afablan mienon de Prezidanto Maŭ per okuloj plenaj de feliĉaj larmoj kaj milfoje plenfervore ĝojkriis: "Vivu, longe vivu Prezidanto Maŭ!"

Kamarado Ju Ĉun (maldekstre) laboras sur kampo.



GIANG VEN:

Vang Ĉaŭĝu

— Laboristo— Inĝeniero



La laboristo-inĝeniero kamarado Vang Ĉaŭĝu

EN la batalo de konstruado de la grandioza kaj impona Nankina Jangzi-pontego de nia lando, nia laborista klaso montris sian senkomparan saĝon kaj kreivon. Laboristo-inĝeniero Vang Ĉaŭĝu, kiu glorie partoprenis la Naŭan Tutlandan Kongreson de la Komunista Partio de Ĉinio kaj estis elektita kiel membro de la Centra Komitato, ja estas glora reprezentanto de nia laborista klaso. Li faris tre grandajn kontribuojn en la konstruado de tiu ĉi moderna Nankina Jangzi-pontego.

KREI NOVAĴON SINAPOGANTE SUR LA PROPRAJ FORTOJ

“La ĉina popolo havas fortan volon kaj grandan kapablon, kaj nepre atingos kaj superos la avan-

gardan mondan nivelon en proksima estonteco.” Tiu ĉi instruo de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ multe kuraĝigis la revoluciajn laboristojn kaj oficistojn konstruantajn la Nankinan Jangzi-pontegon. Apenaŭ formetinte sian pakajon, la laboristo-inĝeniero Vang Ĉaŭĝu, kiu venis de la konstruejo de Bajŝatuo-a Jangzi-pontego en Ĉongking kune kun la antaŭiranta pontkonstrua trupo al Pukoŭ de Nankino, tuj iris observi la terformon kaj fari hidrologiajn esplorojn kune kun la laboristoj, kaj li decidis en si akceli la fruan komenciĝon de la konstruado de Nankina Jangzi-pontego sub la direkto de la granda orientilo de Prezidanto Maŭ “sinapogi sur propraj fortoj”.

Sed, la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj burĝaraj teknikaj “aŭtoritatuloj” en la konstruejo de la pontego ekblovis malvarman venton al ili. Iu el burĝaraj teknikaj “aŭtoritatuloj” diris al Vang Ĉaŭĝu: “Konstrui Jangzi-pontegon en Nankino, maljuna

Vang, estas ne eble sen fremdlandaj specialistoj!” Kaj la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon ankaŭ malice atakis la grandan orientilon de Prezidanto Maŭ pri konstruado de socialismo, absurde dirante: “Sinapogo sur la propraj fortoj ja estas malfacila problemo, kiun oni mem trudas al si.”

Serio da demandoj ruliĝis en la kapo de Vang Ĉaŭĝu. Li rememoris la pasintecon. Siatempe li estis kaptita de la japana imperiismo kiel kulio por konstrui ponton. Por rabi la riĉaĵojn de la ĉina popolo, la imperiistoj tute ne zorgis la vivsekurecon de la pontlaboristoj. La konstruado de ponto estis farata de homoj subakve sur la fundo de rivero. Dekoj da laboristoj estis fermitaj en altprema kasono por elfosi teron kaj fari bazon sur la fundo de rivero. Foje, subite ĉesis funkcii la aerprema maŝino sur la bordo, tiam riverakvo kun tero kaj sablo invadis la kasonon, kaj pli ol kvardek klasaj fratoj ĉiuj mortis en ĝi. En tiu tempo, por konstrui unu ponton, oni ne sciis kiom da klasaj fratoj mortis pro ĝi. En tiuj mallumaj jaroj, la amaro de ni laborantaj popolanoj ne havis finon kiel la fluo de Jangzi-rivero. Nun, la ĉina popolo jam leviĝis. Ĉu ni ankoraŭ permesos imperiismon kaj reviziismon reveni al Ĉinio kaj daŭre tirane rajdi sur nia nuko? Ne, tion ni laboristoj neniel permesos, absolute ne permesos! Kun la ĉiamvenka Maŭzedongpenso kaj la granda orientilo de Prezidanto Maŭ “**sinapogi sur la propraj fortoj**”, ni povas venki ĉian ajn malfacilon antaŭ ni kaj krei ĉian ajn miraklon en la mondo!

En la solena ĵurado farita de Vang Ĉaŭĝu kaj la laboristoj “konstrui bone la pontegon nin glorigontan por morte ĉagreni la sovetuniajn reviziistojn kaj jankiojn”, venke komenciĝis la konstruado de la Nankina Jangzi-pontego. En 1960, kiam la subakvaj bazoj estis en la etapo de intensa konstruado, sovetuniaj reviziismaj “specialistoj” venis al la konstruejo de Nankina Jangzi-pontego por “pririgardi”. Apenaŭ ili atingis la konstruejon, ili malice kalumniis, ke nia projekto de pilieroj estas “neracia”, kaj arogante asertis ke okazos “nesavebla akcidento”, kiam enprofundiĝos la malofte videblaj en la mondo peztipaj betonaj kasonoj de ni konstruataj. Pro tiu provoko de la sovetuniaj reviziismaj “specialistoj”, Vang Ĉaŭĝu eksplodis de indigno. Kiam oni invitis lin al la kunsido kunvokita de la sovetuniaj reviziismaj “specialistoj”, li diris kun indigno: “Por kio ni aŭskultu ilin? Ni havas la verkon de Prezidanto Maŭ *Pri Praktiko* kiel brilan vojmontran

lampon kaj iros definitive la vojon de sinapogo sur la propraj fortoj por konstrui la ponton!” Li do rifuzis partopreni la kunsidon. Timigite de la sensencaĵoj de la sovetuniaj reviziistoj iuj burĝaraj teknikaj “aŭtoritatuloj” plenaj de sklaveco antaŭ fremduloj tremante volis ŝanĝi la originan projekton de konstruo kaj proponis ŝmiri la murojn de kasono per preskaŭ cent ĝinoj da vazelino, por ke danĝero ne okazu dum ĝia subakviĝo. Sed, kiam la kasono enakviĝis, la vazelino jam floris sur la akvon. Disvolvante la revolucian spiriton kuraĝi pensi, kuraĝi agi kaj kuraĝi sturmi, Vang Ĉaŭĝu kaj la laboristoj kune faris analizojn kaj studojn kaj konkeris teknikajn malfacilojn unu post alia. Anstataŭ vazelinon ili uzis flavan argilon por ŝmiri, tiel ke malpliĝis la interfrotado dum eniĝo de la kasono en la teron kaj ke ĝi firme enradikiĝis en la fundon de la rivero. Kvazaŭ grandiozaj ĉieltenaj kolonoj, la pilieroj alte ekstaris en la rivero, kaj komplete bankrotis la senhontaj babilaĵoj de la sovetuniaj reviziistoj.

MIRAKLO EN LA PONTOKONSTRUA

HISTORIO

En la tagoj kaj noktoj de konstruado de la Nankina Jangzi-pontego, Vang Ĉaŭĝu kaj la vastaj amasoj de pontokonstruaj laboristoj sin armis per Maŭzedongpenso, disvolvis persistan kaj senŝanceliĝan batalon kontraŭ la “filozofio de sklaveco antaŭ fremduloj” kaj “rampismo” disvastigitaj de la granda renegato Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj kaj firme defendis la proletaran revolucian linion de Prezidanto Maŭ.

La antaŭ-streĉitaj ferbetonaj traboj instalitaj sur la pilieroj de la alkondukaj pontoj sur ambaŭ bordoj havas longecon de pli ol tridek metroj kaj pezon de pli ol cent tunoj. Ĝia produkto estis unu el la ŝlosilaj problemoj de la konstruado de la pontego. Mekanike aplikante fremdlandan projekton, iuj burĝaraj teknikaj “aŭtoritatuloj” “volis arbitre fabriki tiajn trabojn dividitajn en tri partoj por poste ilin kunigi. En la kunsido por difini la produktan projekton, Vang Ĉaŭĝu la unua leviĝis kontraŭ ĝi: “Kial unu trabo devas esti fabrikita el tri partoj? Tio malŝparas laborfortojn kaj laborhorojn kaj ankaŭ malutile influas la kvaliton de la konstruo.” La burĝara teknika “aŭtoritatulo” diris: “Tio estas sperto sukcesinta eksterlande, kaj tiel faras multaj landoj.” Aŭskultinte tion, Vang Ĉaŭĝu respondis kun

indigno: “Ni ne kredas tian fremdlandan dogmon, kiu katenas la manojn de laboristoj, ni devas aŭskulti la vortojn de Prezidanto Maŭ kaj konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie!”

Kiam la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj burĝaraj teknikaj “aŭtoritatuloj” konstruigis fabrikan domon kaj sinokupis pri “produkta linio” de iliaj tripartaj antaŭ-streĉitaj ferbetonaj traboj, Vang Ĉaŭĝu kaj la laboristoj ĵuris: “Vi havas viajn fremdlandajn librojn, dum ni havas la brilan verkon de Prezidanto Maŭ *Pri Praktiko*. Ni aŭskultas la vortojn de Prezidanto Maŭ kaj certe elhakos al ni vojon por disvolvi industrion per niaj propraj fortoj.” Vang Ĉaŭĝu kaj la laboristoj mem faris projektojn kaj provojn, prenante la teron kiel labortablon kaj alprenante siajn proprajn rimedojn, komencis sian laboron en la batalo de scienca eksperimento konkure kun la burĝaraj teknikaj “aŭtoritatuloj”. Sen fabrika domo, ili produktis antaŭ-streĉitajn ferbetonajn trabojn en libera aero spite al ventoj kaj pluvoj. Ne havante laborsper-ton, ili ripetade studis la verkon *Pri Praktiko*, akumulis spertojn en praktikado kaj eltrovis la leĝojn por rekte fabrikigi antaŭ-streĉitan ferbetonan trabon sen procezo de divido en tri partoj.

Estis produktitaj la antaŭ-streĉitaj ferbetonaj traboj, tamen, ankoraŭ ne venis al la fino la intensa lukto inter la du linioj sur la konstruejo de la pontego. Dum enramado de fostoj sur la konstruejo de la alkondukaj pontoj, Vang Ĉaŭĝu kaj la laboristoj kuraĝe renovigis teknikon kaj kreis la mondajn rekordojn de nerompo de fosto dum daŭro de ramado de fostoj je pli ol 10,000 metroj kaj de profundeco de enterigo de fostoj. Sed, pro sia reakcia klasa naturo, la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon ĉiurimede ĉikanis la grandan kreon de la laborista klaso kaj plenforte subpremis la aktivecon de la laboristaj amasoj en konstruado de socialismo. Ili difinis, ke en unu deĵoro ĉiu laborgrupo enramu nur unu foston sed ne pli.

Foje, falis neĝo en grandaj flokoj kaj frosta vento penetris ĝis la ostoj. Laŭte kriante la sloganon: “Enrami plian foston signifas plian obuson kontraŭ imperiismo, reviziismo kaj reakciularo”, Vang Ĉaŭĝu kaj la laboristoj kune luktis pene apud la rivero kun alta batalvolo. Ju pli ili laboris, des pli kreskis al ili laborfervoro. La unuan foston ili glate enramis. Tiam la laboristoj demandis al Vang Ĉaŭĝu: “Ĉu ni povas rami

plu?” “Ramu!” kun decidemo respondis Vang Ĉaŭĝu. Kaj ankaŭ la dua tubfosto estis glate enramita en bona kvalito. Ĝuste kiam la laboristoj laboris kun granda entuziasmo, iu el la enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon vokis Vang Ĉaŭĝu kolere kaj riproĉis lin pri malobservo de la regularo pri funkciigo de maŝinoj. Vang Ĉaŭĝu diris kun sento de praveco: “Ni devas aŭskulti la vortojn de Prezidanto Maŭ. Prezidanto Maŭ alvokis nin konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie. Ni aŭskultas liajn vortojn kaj agas prave!” Senŝanceliĝe li senĉese renovigis kune kun la laboristoj novajn rekordojn de fostramado kaj kreis la plej altajn rekordojn de enramado de kvar grandtipaj tubfostoj en unu deĵortempo kaj de kontinua bonkvalita kaj sekura ramado de fostoj kun longeco de 60,000 metroj. Tio estis mirinda miraklo en la pontkonstrua historio de la mondo.

FOR LA FREMDLANDAJN RUTINOJN DE “AŬTORITATULOJ”

La proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ estas fidi amasojn, sinapogi sur ili kaj respekti ilian iniciatemon. Sed, la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon sur la konstruejo de la Nankina Jangzi-pontego, male, forte antaŭenpuŝis la kontraŭ-revolucian reviziisman nigran varon de Liu Ŝaŭki — “administradon de fabrikoj per specialistoj”, energie oponis kontraŭ la kuraĝa iniciato de la laboristaj amasoj en teknikaj renovigoj kaj ĉiurimede bojkotis la okupadon de la laborista klaso en la scienc-teknika sfero de konstruado de pontoj. Ili ja tute ne prenis laborist-devenajn inĝenier-teknikistojn kia Vang Ĉaŭĝu en siajn okulojn, absurde dirante, ke Vang Ĉaŭĝu mal-multe scipovas legi, cetere jam maljuniĝis kaj nenian gravan rolon povos ludi, kaj eĉ pretis forĵeti lin kiel “balaston”.

Vang Ĉaŭĝu diligente studis Maŭzedongpenson, elĉerpis el la verkoj de Prezidanto Maŭ grandan forton por grimpi sur altajn pintojn de scienco, kaj firme sin apogis sur la saĝeco de la laboristaj amasoj; per tio li foje-refoje fiaskigis la subfosadon kaj ĉikanojn de la enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj burĝaraj teknikaj “aŭtoritatuloj”.

La nubskrapa portala movebla argano sur la konstruejo estis uzata por levi de sur la tero antaŭ-streĉitajn ferbetonajn trabojn kun pezo de pli ol cent tunoj sur pilierojn altajn je dekoj da metroj. En la pasinteco, sekvante la fremdlandajn rutinojn, burĝaraj teknikaj “aŭtoritatuloj” instalas tian arganon en tri ŝtupoj t. e., en la unua ŝtupo kunmunti la apogilojn ĝis la alteco de 20 metroj kaj kunigi ilin per almeto de horizontala trabo, kaj poste en la dua ŝtupo plialtigi ilin ĝis nova alteco kaj formeti la antaŭan horizontalan trabon kaj kunigi ilin per almeto de nova. Tiel la almeto kaj formeto de horizontala trabo devis alterni trifoje. Tia procedo estas ne sekura kaj malŝparas multajn laborfortojn. Cetere, ĉiu ŝtupo bezonas minimume 2-3 monatojn. Vidante ke la multaj stakoj da jam produktitaj antaŭ-streĉitaj ferbetonaj traboj kuŝas sur la konstruejo kaj ne povas esti rapide instalitaj sur la pilierojn, ĉiuj laboristoj sentis en si maltrankvilon. Por plirapidigi la konstruadon de la pontego, Vang Ĉaŭĝu firme oponis kontraŭ la malnova triŝtupa instalprojekto, kiu estis proponita de la burĝaraj teknikaj “aŭtoritatuloj” kaj iris kvazaŭ “maljuna bovo tirantan kadukan ĉaron”. Tage, li cerbumis kune kun la laboristoj, kaj, nokte, li venis al la laboristoj por daŭre kaj ripetate pristudi la problemon. Post multfoja eksperimentado, li kuraĝe elmetis instalprojekton de unufoja kunigo, kiu multe mallongigas la tempon, simpligas la procedon kaj sekurigas la laboron. Sed tiu ĉi revolucia projekto ofendis la leĝon de la burĝaraj teknikaj “aŭtoritatuloj”. Kolerante pro honto ili diris: “La projekto de triŝtupa instalado estas sankciita de la supera projekta departemento, plene bazita sur scienca teorio kaj konfirmita de fremdlandaj spertoj. Kiu kuraĝas ĝin libere ŝanĝi, tiu devas respondeci ĉiujn sekvojn!” Krome, ili ankaŭ faris agitojn kaj incitojn inter la laboristaj amasoj por ĉikani Vang



Kamarado Vang Ĉaŭĝu kaj laboristoj sur la konstruejo de la ponto

Ĉaŭĝu, absurde dirante: “Ne kredu malkleran Vang Ĉaŭĝu, se malsukcesos la unuŝtupa procedo kaj pro falo la argano mortigos almenaŭ dekojn da homoj, tiam neniu el vi povos eskapi!”

Vang Ĉaŭĝu pensis, ke efektiviĝi aŭ ne efektiviĝi la projekton de unufoja kunigo ne estas problemo de tekniko, sed estas politika batalo kontraŭ la burĝaraj teknikaj “aŭtoritatuloj” kaj grava problemo, ĉu oni plenumas aŭ ne plenumas la revolucion linion de Prezidanto Maŭ. Prezidanto Maŭ alte taksas nin laboristojn kaj elkulturis min la pasintan almozulon en laboriston-inĝenieron, mi nepre

gajnos gloron por Prezidanto Maŭ. Pensante pri tio, li kun plena fido sentis sin energiplena. Li venigis pli ol dek laboristojn, faris modelon de la argano per maizaj trunkoj, kaŭrante sur la maiza kampo apud la konstruejo, kaj per tio eksplikis la eblecon de unufoja kunigo. Li diris decideme: "Pli frua finkonstruo de la Jangzi-pontego signifas ke ni pli kontribuas al la socialisma konstruado kaj al la batalo kontraŭ imperiismo kaj reviziismo." La laboristoj firme esprimis: "Ni laboros laŭ via projekto kaj elmontru la forton de ni laboristoj al la burĝaraj teknikaj 'aŭtoritatuloj'."

"Oni instalos la portalan moveblan arganon laŭ la procedo de unufoja kunigo!" Ekbolis la tuta konstruejo tuj ĉe aŭdo de tiu informo. La laboristaj amasoj venis por lin kuraĝigi, kaj ankaŭ la burĝaraj teknikaj "aŭtoritatuloj" pretis veni sed por vidi la "fiaskon" de Vang Ĉaŭĝu. En la tago de kunigo, Vang Ĉaŭĝu ripetade kontrolis la ekipaĵojn kaj maŝinojn kaj diversajn preparajn laborojn kaj gvidis la laboristojn studi la vortojn de Prezidanto Maŭ: "**Faru firman decidon, timu nenian oferon kaj venku ĉiujn malfacilojn por akiri venkon.**" Poste, li persone direktis la kunigan laboron. Kiam eksonis la fajfilo, ok vinĉoj samtempe ekfunkciis. La horizontala trabo peza je pli ol 70 tunoj de la portala movebla argano leviĝis milde de sur la tero kaj baldaŭ stabile leviĝis ĝis la antaŭfiksita alteco de pli ol 50 metroj. "La procedo de unufoja kunigo de la argano sukcesis!" Eksonis huraado ĉie sur la konstruejo: "Vivu, vivu, longe vivu Prezidanto Maŭ!" Restis nur al la burĝaraj teknikaj "aŭtoritatuloj" foriri en senbrila humoro.

La portala movebla argano estis plene instalita nur en kelkaj semajnoj, multoble pli rapide ol kiel fiksita en la projekto de la burĝaraj teknikaj "aŭtoritatuloj". Per ĝi la antaŭ-streĉitaj ferbetonaj traboj estis rapide almetitaj sur la pilierojn kaj multe progresis la konstruado de la pontego.

NEDEVOJĜO EN FURIOZAJ ONDEGOJ

La ŝtormo de la Granda Proletara Kultura Revolucio envolvis la konstruejon de la Nankina Jangzi-pontego. Sekvante la instruon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ "**Pravas ribelo kontraŭ la reakciuloj**", Vang Ĉaŭĝu kaj multaj laboristoj aktive sin ĵetis kune en tiun ĉi batalon. Ili "deĉevaligis" la plenmanon da enpartiaj potenc-tenantoj irantaj la kapitalisman vojon uzurpintaj

la gvidantecon de la konstruado de la pontego kaj reakciajn burĝarajn teknikajn "aŭtoritatulojn", reprenis el iliaj manoj la de ili uzurpitan potencon, kaj faris la konstruejon batalejo de amasa revolucia kritiko. En la ventego kaj ondegoj de klasbatalo kaj batalo inter la du linioj, la koro de Vang Ĉaŭĝu, komunisto plena de vigleco, pli ruĝiĝis kaj lia proletara sentimento fidela al Prezidanto Maŭ pli kreskis.

Somere de 1967, en la ŝlosila momento, kiam la ŝtaltraboj de la Nankina Jangzi-pontego estis baldaŭ kunigitaj, ne volontante pereji, plenmano da klasaj malamikoj sinkaŝintaj inter la amasoj refoje blovis reakcian diablan venton de verdiktorenverso el la dekstra kaj ekstreme "maldekstra" flankoj kaj fabrikis laborĉesigan eventon. Vidante ke la ŝtalaj traboj de la pontego pezaj je milo da tunoj etendas en la aero super la rivero, Vang Ĉaŭĝu pensis, ke estos granda danĝero, kiam venos tajfuno, se ili ne estos tuj kunigitaj. Li elpaŝis kaj kunvokis kelkajn laboristojn al la ŝtalaj traboj super la rivero. Vang Ĉaŭĝu kondukis ĉiujn legi la vortojn de Prezidanto Maŭ: **Kio estas laboro? Laboro estas batalo. En tiuj lokoj estas malfaciloj kaj problemoj, kiuj bezonas esti solvataj de ni. Ni iras tien labori kaj batali por solvi la malfacilojn. Bona kamarado estas tiu, kiu pli deziras iri tien, kie la malfaciloj estas pli grandaj.**" Kiam ĉiuj finlegis la vortojn, li montris la etenditajn trabojn kaj diris al la maljunaj laboristoj: "Vidu, kamaradoj, de la pilieroj kiom malproksime etendiĝas la brakoj de la ŝtaltraboj? Ĉu ne estas danĝere?" Ĉiuj unuvoĉe diris: "Se ili ne estos tuj kunigitaj, ili fleksiĝos, kiam venos tajfuno." Vang Ĉaŭĝu stariĝis kaj diris kun decidemo: "Prezidanto Maŭ alvokas nin teni revolucion kaj stimuli produkton. Sed plenmano da klasaj malamikoj vane provas fabriki eventon de laborĉesigo por detruji la konstruadon de la pontego, kaj ni neniel devas lasi ilian intrigon sukcesi. Kiom ajn granda estu la risko kaj kiom ajn grandaj estu la malfaciloj, ni nepre kunigos la ŝtalajn trabojn antaŭ la veno de tajfuno!" Sub la iniciato de Vang Ĉaŭĝu kaj maljunaj laboristoj, la vastaj amasoj de laboristoj frakasis la intrigon de plenmano da klasaj malamikoj detruji la konstruadon de la pontego kaj fine gajnis la grandan venkon de kunigo de la ŝtalaj traboj.

Vang Ĉaŭĝu, armita per Maŭzedongpenso kaj plena de vigleco, kuraĝas iri de neniuj iritan vojon kaj surgrimpi de neniuj surgrimptan kulminon kaj per tio manifestis la bonan kvaliton kaj altan saĝon de la ĉina laborista klaso.



La malgranda heroino Daj Bijong (meze), kiu savis aliajn oferante sin, rakontas pri sia kompreno en viva studo kaj viva apliko de verkoj de Prezidanto Maŭ.

Dekjara Heroino Daj Biĵong

SUB la nutrado de la granda Maŭzedongpenso, sane kreskas la nova generacio. Inter la reprezentantoj de la kongreso de aktivuloj de viva studo kaj viva apliko de verkoj de Prezidanto Maŭ en Hunan-provinco estas heroineto, kiu riskis sian vivon por savi tri infanojn el sub vagonaj radoj. Ŝi estas lernantino de la Tria Elementa Lernejo de Fervojo en Ĝuĝoŭ, nomata Daj Biĵong. El la heroaĵo de Daj Biĵong oni povas vidi la brilon de la granda Maŭzedongpenso radiantan el la korpo de la juna generacio de Ĉinio.

La afero okazis je la unua horo posttagmeze de la 14-a de septembro 1968. En la manovrejo de vagonoj de Ĝuĝoŭ-a Fervoja Stacio navede kuris trajnoj fajfante al diversaj lokoj de la patrolando.

Sur unu trako ja dekkelkaj metroj distance de la loko, kie glitas vagonoj, tri malpli ol 6-jaraj

infanetoj sidante ludis kun la klinita kapo. Subite alglitis rapide vagonaro, kaj la vivo de la tri infanoj estis en granda danĝero. Ĝuste en tiu kriza momento, la 10-jara Daj Biĵong venis al la loko. Kiam ŝi je kaplevo vidis la danĝeran scenon, ŝi tre maltrankviliĝis. Kion fari? Kion fari?! **“La morto por la intereso de la popolo estas pli peza ol la monto Tajŝan,”** tiu instruo de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ tuj venis al ŝia kapo. Ŝi tuj faris decidon kaj senhezite sturmis en la direkto al la alkuranta vagono al la infanetoj. Ŝi unue brakprenis de la trako unu malpli ol 6-jaran knabon, kaj returne provis savi la du aliajn.

La glitanta vagonaro fluge alkuris al la du infanojn en proksimeco de nur 10 metroj. **“Ni mortas indan morton, se ni mortas por la popolo,”** la instruo de Prezidanto Maŭ instigis Daj Biĵong al plua batalo. Vizaĝe al la alglitanta vagonaro, ŝi denove

Ruĝaj Koroj Speguliĝas en Blua Maro

— Pri heroaĵoj de la milica bataliono de Vuŝi

La milica bataliono de la fiŝkapta brigado de Vuŝi-haveno de nia Lejĝoŭ-duoninsulo estas heroo kolektivo armita per Maŭzedongpenso. Kunagante kun trupoj de la granda Ĉina Popola Liberiga Armeo tiu ĉi milica bataliono viglanime gardas la mardefendan linion de la patrujo, frakasis

militajn provokojn de la usona imperiismo kaj subfosadon de plenmano da klasaj malamikoj kaj ĉiam persistas en sia fiŝproduktado en Bakbo-golfo. Rakontoj pri iliaj heroaĵoj cirkuladas inter fiŝistoj.

surkuris sentime la trakon, tute ne zorgante sin mem, kaj sukcesis forporti 4-jaran knabinon. Tiam la alkuranta vagonaro distancis nur 2-3 metrojn de la lasta infano, kiu troviĝis en la mezo de la trako.

La sinsekvaj penadoj lacigis la malgrandan Daj Bijong. Sed, spite de ĉio ŝi forpuŝis de la trako la trian knabon per sia tuta forto

Kaj tiam la radoj de la glitanta vagonaro traruliĝis sur la maldekstran brakon kaj maldekstran kruron de nia malgranda heroino. La 3 savitaj infanoj ploregis pro timo. Tiam Daj Bijong pripensis ne sin mem, sed la sekurecon de la infanoj. Ŝi baraktis en sango kaj laŭte kriis: “Rapide for, ne zorgu min!”

Daj Bijong estis alsendita al fervoja hospitalo. Ŝvitgutoj grandaj kiel sojfaboj eliĝis el ŝia kapo pro la dolorego. Iu flegistino demandis ŝin: “Kies vortojn vi plej aŭskultas, Daj Bijong?” “La vortojn de Prezidanto Maŭ!” ŝi respondis. Kamaradoj de la laborista propaganda taĉmento de Maŭzedongpenso kaj kuracaj laborantoj studis kune kun ŝi la plej altan instrukcion: “**Faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilojn por akiri venkon.**” Dank’ al la granda instruo de Prezidanto Maŭ, aperis rideto sur la vizaĝo de malgranda Bijong. Ŝi pensis en

si, kiam la cerbo de onklo Maj Hiande tralikiĝis pro vundiĝo, li ankoraŭ persistis en la batalo tri horojn. Mi devas lerni de li kaj absolute ne kribi pro doloro. Post kiam ŝi rekonsciiĝis post ĥirurgio kaj trovis ke ŝi ankoraŭ havas dekstran manon, ŝi levis la maneton, ĝin daŭre rigardadis kaj diris decideme: “Mi ankoraŭ havas la dekstran manon kaj povas noti per ĝi vortojn de Prezidanto Maŭ kaj servi al la popolo.”

La heroo agado de Daj Bijong oferi sin por savi aliajn rapide disvastiĝis tra la tuta urbo Ĝuĝoŭ. Dum ŝia restado en la hospitalo, multaj homoj vizitis ŝin. Ĉiuj vizitantoj diris kun estimo kaj fiero: “Bijong ja estas heroineto de la tipo de Oŭjang Haj kaj meritas la nomon de bona knabino de Prezidanto Maŭ.” Daj Bijong rigardis tiujn laŭdojn de la onkloj aŭ onkloj kiel movforton por instigi sin senĉese progresadi. Ŝi diris: “Mi agas laŭ la instruoj de nia amata Prezidanto Maŭ. Kompare kun onklo Maj Hiande, mi ankoraŭ restas malproksime post li, mi nepre bone lernos de li. Kvankam mi kripliĝis, mi tamen ankoraŭ havas paron da klaraj okuloj kaj per ili mi povos vidi nian amatan Prezidanton Maŭ. Tio estas mia plej granda feliĉo. Mi nepre aŭskultos ĉiam la vortojn de Prezidanto Maŭ por fariĝi ruĝa daŭriganto de la revolucia afero.


La heroa milica bataliono de Vuŝi naskiĝis en ŝtormo de klasbatalo kaj plenkreskiĝis sub nutrado de Maŭzedongpenso.

En 1958, alte tenante la tri ruĝajn standardojn de la ĝenerala linio, antaŭensaltego kaj popola komunumo sub la gvido de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, la ĉina popolo akiris brilajn sukcesojn en la granda socialisma revolucio kaj socialisma konstruado. Veraj marksist-leninistoj, revoluciaj popolanoj kaj amikoj en la tuta mondo ĝojis kaj hurais pro nia venko. Sed la usona imperiismo, sovetunia reviziisma renegata kliko kaj diverslandaj reakciularoj ekstreme malamamis kaj maltranquviliĝis pro niaj sukcesoj. Ĝuste en tiu tempo, la usona imperiismo kun agresiva naturo senĉese invadis nian maran kaj aeran teritorion, por detru nian fiŝproduktadon. Fronte al la frenezaj provokoj de la usona imperiismo, la revoluciaj fiŝistoj de Vuŝi starigis milican batalionon kaj decidis defendi per batalo la socialisman revolucion kaj socialisman konstruadon, laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ: **“La imperiistoj tiel nin tiranas, ke ni devas trakti ilin serioze. Ni devas ne nur havi potencon regulan armeon, sed ankaŭ organizi diviziojn de la popola milico en granda skalo.”**

Kun senlima fideleco al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, la membroj de la milica bataliono sin ĵetis en batalon por mardefendo kaj protekto de fiŝproduktado.

En 1964, la usona imperiismo fabrikis la kriman Incidenton de Bakbo-golfo, kaj ekde tiam, precipe de la Granda Proletara Kultura Revolucio de nia lando ĝi senĉese ekspedis aviadilojn kaj militŝipojn por fari sovaĝajn militajn provokojn al niaj fiŝistoj, kiuj kaptis fiŝojn sur publika maro de Bakbo-golfo kaj eĉ freneze bombis kaj bombardis, neglektante la severajn avertojn de nia registaro kaj riproĉojn de la justa publika opinio de la mondo. Por protekti la sekurecon de klasaj fratoj kaj la produktadon, la milicanoj de Vuŝi kun glora revolucia tradicio faris bravan bataladon kontraŭ la barbaraj militaj provokoj de la usona imperiismo, disvolvante revolucionan spiriton kuraĝi batali kaj kuraĝi venki.

La malamikoj ne nur alsendis aviadilojn por surprizatakoj, sed ankaŭ ofte ekspedis militŝipojn por ĝenado. Iufoje, kiam pluraj fiŝkaptaj boatoj de Vuŝi-brigado regule navigis en la publika maro, subite tri usonaj militŝipoj feroce alsturmis kaj



Milicanino gardanta la marbordon de la patrolando

minace direktis grandajn kaj malgrandajn kanojn al niaj fiŝboatoj. Tiutempe, la milica batalionestro Gaŭ Fuhua diris al la milicanoj: **“Kamaradoj, Prezidanto Maŭ instruas al ni ‘neniel esti timigita de aroganteco de reakciularo’.**” La instruo de Prezidanto Maŭ multege kuraĝigis ĉiujn milicanojn, ili firme staris sur la pruo kaj pretis fari sindefendan batalon. La stiristo de la boato tenis la direktilon tiel ke la boato konservis la antaŭan navigdirekton, kaj antaŭenpuŝiĝis per sia plena rapideco. La malamikoj konfuziĝis antaŭ niaj heroaj milicanoj kaj tuj turnis la stirilon

por cedi vojon al niaj fiŝboatoj. Ankoraŭfoje malkovriĝis la papertigra naturo de la usona imperiismo. Milicanoj diris humore: “Ankaŭ la granda militŝipo de la usona imperiismo timas malgrandan fiŝboaton de ni milicanoj!”

La malamikoj ne volonte rezignis pri siaj malvenkoj. Post la fiaskoj de iliaj aviadiloj kaj militŝipoj ili faris novan manovron: senĉese fotografi niajn fiŝboatojn per helikopteroj. Sed niaj milicanoj diris: “Kian ajn manovron la malamikoj ludos, ni nepre vanigos ilian esperon!” Ili pendigis slogan-rubandojn sur siaj mastoj kaj skribis sloganon sur ferdekoj “For la usonan imperiismon!” “La usona imperiismo estas papera tigro!” Tenante en manoj la ruĝan libreton *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* la milicanoj de la tuta ŝipo firme staris sur la pruo kaj laŭte kriis: “Vivu Prezidanto Maŭ!” La usonaj piratoj ĉiufoje rikoltis nur malagrablajojn kaj forflugis en griza humoro.

La milicanoj de Vuŝi armitaj per Maŭzedongpensso estas plej saĝaj kaj plej kuraĝaj, ili decidis superi ĉiujn malamikojn, sed neniam esti subigitaj de la malamikoj. Dum lastaj jaroj, ili frakasis pli ol 300 sovaĝajn provokojn fare de aviadiloj kaj militŝipoj de la usona imperiismo, persistis en produktado kaj akiris grandan rikolton de fiŝproduktado.

(2)

La Granda Proletara Kultura Revolucio persone iniciatita kaj gvidata de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaŭzis profundan ŝanĝiĝon en Vuŝi. Tamen la milicanoj diris: “El la sennombraj ŝanĝiĝoj la plej granda estas tio, ke pliruĝiĝis post hardado la ruĝaj koroj de la milicanoj fidelaj al Prezidanto Maŭ.” La ruĝaj koroj de la milicanoj estas elharditaj en la ŝtormo de la batalo inter la du linioj.

Komence de la Granda Proletara Kultura Revolucio, la milicanoj kaj vastaj revoluciaj amasoj de Vuŝi jam leviĝis por ribeli kontraŭ la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj eltiris plenmanon da klasaj malamikoj, kiuj enŝteliĝis en la revolucion vicaron. Sekve de tio, la milicanoj gvidis la komunumanojn de la tuta brigado disvolvi ardan revolucion amasan kritikon, por komplete likvidi la kontraŭrevolucion reviziisman linion antaŭenpuŝitan de la granda renegato Liu Ŝaŭki.

En la malnova socio, la vasta amaso de revoluciaj fiŝistoj de Vuŝi profunde suferis subpremon kaj ekspluaton de fiŝtiranoj kaj bienuloj. Estas la

granda gvidanto Prezidanto Maŭ, kiu ilin savis el la maro de mizeroj. Ili firme suriris la socialisman Ŝoseon de kooperigo kaj komunumigo sekvan- te Prezidanton Maŭ kaj ekvivis feliĉan vivon. Sed Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj plenforte disvastigis en Vuŝi la kontraŭrevoluciajn reviziismajn varojn kiaj “tri pliigoj kaj unu fikso”, “laborpoento en komando”, kun la vana espero detru- i la kolektivan ekonomion kaj konduki la komunumanojn sur la eraran vojon de kapitalismo. En revolucia amasa kritikado milicanoj malkovris kaj kritikis la kontraŭrevoluciajn krimojn de Liu Ŝaŭki per siaj propraj travivaĵoj. La familio de milicano Maj Jagin suferis grandajn mizerojn kaj sangatan subpremon en la malnova socio. Nur post la Liberiĝo ili turniĝis supren. Sed la “tri pliigoj kaj unu fikso” disvastigita de Liu Ŝaŭki venenis lian familion. En la kunveno de revolucia amasa kritikado li alportis la kadukan boaton en kiu lia familio loĝis en la malnova socio kaj la tiam uzatajn ĉifonajn litkovrilojn kaj vestojn, dolore kondamnis la krimon de la malnova socio, forte kritikis la nigran koron de Liu Ŝaŭki kiu intencis restaŭri kapitalismon kaj denove suferigi la laborantan popolon. Li diris: “En la malnova socio, kiel ajn vasta estis la tero, sed sur ĝi ne estis loko por ni fiŝistoj stari sur la piedoj, kaj kiel ajn granda estis la maro, sed sur ĝi ne estis spaco por ni enĵeti reton. Sen Prezidanto Maŭ ne estus nia hodiaŭo. Neŝancebla estas nia decido iri socialisman vojon sekvan- te Prezidanton Maŭ!” La vortoj de Maj Jagin eldiris la decidemon de ĉiuj milicanoj de Vuŝi. Ĉu sur tero aŭ sur maro, ili aranĝis batalejojn de revolucia amasa kritiko, ĉiuj en la batalo hardis sian senliman fidelecon al Prezidanto Maŭ, kaj senĉese aperis inter ili novaj homoj kaj novaj aferoj.

Iufoje en la pasinta jaro, ekbruliĝis la holdo de motora fiŝboato n-ro 6, kaj la arda flamo rapide disetendiĝis. En tiu tempo 17-jara milicano Liang Jagiu ekmemoris ke en la holdo pendis portreto de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj tuj rapide kuris al ĝi. La densa fumo forte sufokis lin, tamen li recitis en la kapo la vortojn de Prezidanto Maŭ: “**Faru firman decidon, timu nenian oferon, superu ĉiujn malfacilojn por akiri venkon.**” Kiam li bonorde elprenis la portreton de Prezidanto Maŭ, li ricevis multajn brulvundojn sur la korpo. Rigardante la bonkore ridantan vizaĝon de Prezidanto Maŭ sur la portreto, li sentis ke li havas neelĉerpeblan forton. Spite al forta doloro en la tuta korpo, li denove sin ĵetis en la flamon por savi objektojn. Fine estingiĝis la fajrego, sekur-



Riĉa rikolto akirita en fiŝado sub la protekto de milicianoj

iĝis ŝtataj posedaĵoj kaj la vivo de pli ol 10 klasaj fratoj sur la ŝipo, sed li estis brulvundita. En hospitalo, li ne povis sidi nek kuŝi pro doloro, sed li neniam plendis de doloro. Kiam li ankoraŭ ne resaniĝis, li jam revenis al la fiŝkapta haveno kaj aktive partoprenis batalon, kritikon kaj reformon, responde al la alvoko de Prezidanto Maŭ.

En la revolucia amasa kritikado, la milicianoj kaj komunumanoj de Vuŝi-brigado rapide altigis sian konscion pri klasbatalo kaj batalo inter la du linioj kaj estigis prosperan situacion de revolucio kaj produktado de la tuta brigado.

(3)

La milica bataliono de Vuŝi estas ankaŭ produktbrigado varme laŭdata de la komunumanoj.

Dum la lastaj dekelkaj jaroj, precipe en la senprecedence Granda Proletara Kultura Revolucio la milicianoj de Vuŝi kun senkompare profunda klasa amo al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj heroa revolucia spirito faris batalon kontraŭ

la plenmano da klasaj malamikoj, persistis en fiŝkaptado por revolucio luktante kun furiozaj ventoj kaj ondoj kaj faris kontribuojn al la socialisma konstruado.

Tutjare fiŝkaptante sur la maro, la milicianoj ofte renkontis furiozajn ventojn kaj terurajn ondojn, kaj krome, dum lastaj kelkaj jaroj la usona imperismo faris sovaĝajn militajn provokojn, sed la heroaj milicianoj de Vuŝi timis nenion. Kun la brilaj “tri popularaj artikoloj” kiel armilo ili batalis kontraŭ egoismo, kritikis reviziismon kaj paŝo-post-paŝe starigis penson de kompleta kaj senrezerva servado al la popolo. La brilaj figuroj de Ĝang Side, Bethune kaj la Malsaĝa Avo kuraĝigis ilin venki malfacilojn unun post alia.

Iufoje, kiam la motora fiŝboato n-ro 1 estis laboranta sur maro, subite ekmuĝis ventego kaj ekruĝigis ondegoj, iu grandega ondo traruis la pruon kaj en ĝin enŝprucis marakvo kaj la pruo rapide sinkis. En tiu kriza momento, la milica plotonestro Jang Hjuĝi elpaŝis kaj saltis en la maron kriante: “Malsaĝa Avo povis translokigi

montojn, do la revoluciaj fiŝistoj povas konkeri la maron." Li estis jetita de ondego kontraŭ la boaton kaj kapturigiĝis pro kunfrapiĝo, sed tio ne timigis lin. Sub la helpo de aliaj milicianoj li batalis 7 horojn kontraŭ la ventego kaj ondoj kun senkompara persisteco kaj fine ŝtopis la breĉon. La milicianoj de la boato daŭre persistis en produktado kaj revenis kun sia boato plenŝarĝita de rikoltaĵo de pli ol 50,000 kilogramoj da fiŝoj.

Alifoje, iu boato de la vuŝi-aj milicianoj kun kapacito de 1,000 kilogramoj renkontis grandan ŝarkon pezan je pli ol 4,000 kilogramoj. La milicianoj, kiuj fiŝkaptas por la revolucio kaj timas nenion, faris firman decidon kapti tiun ŝarkon. La milicianoj sur la boato unuanime luktis kun la ŝarko. Trafite de lanco la ŝarko ne mortis eĉ post kiam ĝi kuris 3-4 horojn trenante la malgrandan boaton. Estis videble, ke la ŝarko sin liberigos de la lanco kaj forfuĝos. Tiam milicianoj Liang Gujfang kaj Liang Kilin brave saltis en la maron, kelkfoje naĝis subakve sub la abdomenon de la ŝarko kaj ligis per ŝnuro ĝian naĝilon kaj tiamaniere sub la helpo de aliaj boatoj kaptis la ŝarkon kvaroble tiom grandan kiom la boato mem.

La milicianoj de Vuŝi rigardas bonan tenadon de produktado kiel subtenon al la socialisma konstruado de la patrujo, subtenon al la revolucio de la monda popolo kaj fortan rebaton al la freneza kontraŭĉina agado fare de imperiismo, reviziismo kaj la reakciularo. La 2-an de marto de la kuranta jaro, la sovetunia reviziisma renegata kliko senbride invadis nian teritorion Ĝenbaŭ-insulo per armitaj fortoj, mortigis kaj vundis multajn el niaj limgardaj batalantoj, kaj tio vekis ekstreme grandan indignon de ĉiuj milicianoj kaj fiŝistoj de Vuŝi. En la sama nokto, ili okazigis mitingon por indigne kondamni la krimegon de la sovetunia reviziisma renegata kliko kaj post tio, 15 fiŝkaptaj ŝipoj, kiuj revenis en havenon pro vento, tuj eknavigis kontraŭ vento al la vasta maro por kapti fiŝojn. Por rebati la sovetunian reviziisman renegatan klikon per atingo de produkto tiu boata trupo laboris kvar tagojn sur la maro malgraŭ frosta vento kaj furiozaj ondoj kaj kaptis pli ol 25,000 kilogramojn da fiŝoj kaj tiel kreis la plej altan rekordon de produkto de senmotora boato en la historio de Vuŝi.

Sub la kuraĝigo de la triumfo de la Naŭa Kongreso, la heroo vuŝi-a milica bataliono nun viglanime gardas la mardefendan linion, protektas la fiŝproduktadon kaj klopodas batalakiri ankoraŭ pli grandajn venkojn.

NOVTIPA PORTEBLA KINEMATOGRAFO

En la periodo de la Granda Proletara Kultura Revolucio, la laboristoj de nia lando kreive elfaris novtipan porteblan kinematografon por 8.75-milimetraj filmoj, kiu estas malgranda, simpla, malkara kaj taŭga por servado al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj en kamparo kaj montaro. Tia aparato estas varme bonvenigata de la amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.

La sukcesa elfaro de tia aparato malfermis vojon por malpezigo de filmoprojekciiloj por nia lando kaj havas grandan signifon por popularigo de la proletara kino de nia lando. Dank' al vasta apliko de tia malpeza kinematografo, oni povas rapide prezenti filmojn propagandantajn Maŭzedongpenson en la vastaj kamparo, paŝtejoj, maraj kaj teraj limgardejoj, tiel ke la vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj povos ofte vidi sur la ekranoj la brilan figuron de nia tage kaj nokte sopirata granda gvidanto Prezidanto Maŭ.

La kinematografoj por 8.75-milimetraj filmoj prove fabrikitaj de diversaj lokoj en nia lando plejparte estas tiel aranĝitaj, ke ili povas esti uzataj ankaŭ kiel magilanternoj, laŭparoliloj kaj radioriceviloj. La pezo kaj grandeco de tia aparato similas al tiuj de kvarvalva radiofono. Inkluzive de la akcesoraĵoj, ĝi pezas ĉirkaŭ 15 kilogramojn, kaj kune kun portebla pedala aŭ benzina generatoro, bezonata por film-prezentado en lokoj kie ne estas elektrofonto, ĝi pezas ĉirkaŭ 30 kilogramojn. Por transporti la ilaron sufiĉas unu aŭ du personoj, do ĝi estas tre oportuna por uzado en kamparo aŭ montregiono; kaj krome ĝia manipulado estas simpla kaj facila. Kvantkam la kinematografo estas malgranda, tamen la bildoj projekciataj de ĝi estas klaraj kaj stabilaj, la sono estas granda kaj klara sen granda ĝena bruo. Ĝi povas kontentigi rigardantaron de pli ol kvincent personoj. Tiu aparato estas farita el partoj enlande produktitaj, malkara, solida kaj facile riparebla. Kaj la 8.75-milimetra filmo por ĝia projekciado estas tre malmultkosta.

Granda Muro ĉe Suda Maro

—“Heroa Milica Roto” de Gangkoŭ en Hujdong-gubernio,
Guangdong-provinco

La milica roto studas la Novaj-komunikon de la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio kaj decidas gajni novajn venkojn en la “tenado de revolucio, stimulado de produkto, aliaj laboroj kaj preteco kontraŭ milito”.





Antaŭ la monumento por martiroj, la milica roto aŭskultas la rakonton pri la revoluciaj martiroj, kiuj brave ekstermis malamikojn.

Miloj kaj dekmiloj da armeanoj kaj popoloj de nia lando, unuiĝintaj kiel unu homo, vigle gardas la longan marbordan linion tagnokte kaj tiel formas nedetruoblan mardefendan grandan muron.

La milica roto de Gangkoŭ en Hujdong-gubernio de Guangdong-provinco glorie ricevis la honoran titolon de "Heroa Milica Roto" en sia batalo por defendi la maron de la patrolando. En 1962, tiu ĉi roto komplete ekstermis grupon da spionoj plene armitaj per usonaj armiloj, senditan de Ĉiang Kajŝek-banditaro. De pluraj jaroj, la "Heroa Milica Roto" alte tenas la grandan ruĝan standardon de Maŭzedongpenso, garde staras tagnokte sur la plejfronto de mardefendo, kunagante kun la Ĉina Popola Liberiga Armeo, firme plenumas la strategian principon de Prezidanto Maŭ "teni la revolucion, stimuli la produkton, aliajn laborojn kaj pretecon kontraŭ milito", kaj per tio senĉese faris novajn kontribuojn por la popolo.

Vigleplenaj milicaninoj




La batalantoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo helpas en trejnado de milicanoj.





Tuj post eksono de klariono, la milicanoj rapide kolektiĝas.

Reveno post ekzercado



Lin Biaŭ

Vivu la Venko de Popola Milito

—Memore al la 20-a Datreveno de la Venko de la
Kontraŭjapana Rezistmilito de la Ĉina Popolo

(La 3-an de septembro, 1965)

(En Esperanto)

La libro konsistas el jenaj 9 partoj:

1. La ĉefa kontraŭdiro en la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito kaj la linio de la Partio
2. Ĝuste plenumi la linion kaj politikon de la unuecfronto
3. Sinapogi sur la kampanoj, fondi kamparajn bazlokojn
4. Konstrui popolan armeon de nova tipo
5. Praktiki la strategion kaj taktikojn de popola milito
6. Persisti pri la politiko de sinapogo sur la propraj fortoj
7. La internacia signifo de la teorio de kamarado Maŭ Zedong pri popola milito
8. Venki la usonan imperiismon kaj ĝiajn lakeojn per popola milito
9. La Ĥruŝĉov-reviziistoj estas perfiduloj de popola milito

64 p. formato: 18.5 x 13 cm.

Eldonita ankaŭ en la lingvoj araba, angla, birma, franca, germana, hindia, hispana, indonezia, itala, japana, rusa, ŝuahilia, urdua kaj vjetnama.

Eldonita de la Fremdlingva Eldonejo, Pekino, Ĉinio

Distribuas: Guozi Shudian (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj), Pekino, Ĉinio

Havebla ĉe lokaj librovendejoj aŭ rekte ĉe Sekcio por Poŝta Mendo, Guozi

Shudian, P. O. Kesto 399, Pekino, Ĉinio



La komandantoj kaj batalantoj de la armea papera fabriko "7-a de Majo" grandpaŝe marŝas antaŭen sur la brila vojo montrita de la instrukcio de "7-a de majo" donita de Prezidanto Maŭ.

Armea Papera Fabriko

"7-a de Majo"

VEJ ĈANGĜENG

ARMEA Papera Fabriko "7-a de Majo" estas mem projektita kaj ekipita de komandantoj kaj batalantoj de iu trupo de ĈPLA dank' al iliaj propraj fortoj kaj energia subtenado de la revoluciaj oficistoj kaj laboristoj de lokaj fabrikoj post dekmonata peniga batalo. Ĝi jam regule produktas paperon por reliefa preso uzatan por presi brilajn verkojn de Prezidanto Maŭ. Kaj ĝiaj produktaĵoj estas transportataj al diversaj lokoj de la lando por subteni la Grandan Proletaran Kulturelan Revolucion.

En la 7-a de majo 1966, Prezidanto Maŭ faris la grandan alvokon: "La Popola Liberiga Armeo devas esti granda lernejo". Li diris: "En tiu lernejo oni lernas politikajn kaj militajn aferojn kaj akiras klerecon, krome, oni povas ankaŭ entrepreni agrikulturelan produkton kaj produkton de flankaj okupoj aŭ funkciigi fabrikojn mezajn aŭ malgrandajn por produkti mem bezonatajn objektojn aŭ varojn por egalpreze interŝanĝi kun la ŝtato." La partia komitato de tiu trupo tuj ekagis post aŭdo de tiu instrukcio kaj senprokraste ĝin

studis serioze. La komitatanoj profunde ekkonis ke tiu brila instrukcio de la 7-a de majo estas nova disvolviĝo de la penso de Prezidanto Maŭ pri armea konstruado en la periodo de socialisma revolucio kaj socialisma konstruado, estas ĝenerala programo por konstruado de la Popola Liberiga Armeo kaj fundamenta rimedo por firmigi la diktaturon de la proletaro kaj preventi restaŭron de kapitalismo. Serioze studinte ĝin, ili vizitis iujn fabrikojn, inkluzive tiujn de cemento, kalko kaj papero. Ili kaj enketis kaj pristudis. Post analizo kaj komparo, laŭ la karaktero de la loko kaj la stato de la trupo, precipe laŭ la urĝaj bezonoj de la vastaj revoluciaj amasoj, kiuj soifas grandkvantan eldonon de verkoj de Prezidanto Maŭ, ili decidis funkciigi paperan fabrikon por produkti paperon por reliefa preso taŭgan por presi verkojn de Prezidanto Maŭ kaj tiel kontribui sian forton en disvastigado de Maŭzedongpenso.

La decido de fondo de fabriko estis farita, sed la afero ne iris glate dum la preparado de la konstruado. Vidinte, ke ili havas nek specialistojn, nek teknikajn fortojn kaj kompletan ekipaĵon, iuj ekverŝis malvarman akvon: "La fako de la armeo estas milito, sed ne funkciigo de fabrikoj. Eĉ se la fabriko estos starigita, tamen restos demando, ĉu ĝi certe sukcesos produkti paperon." La partia komitato de la trupo ĝustatempe kaptis tiujn pensojn, faris analizon kaj esploron kaj venis al la kono ke tiaj pensoj fakte spegulas la demandon, al kiu oni apogas sin por funkciigi fabrikon, al burĝaraj "specialistoj" kaj "aŭtoritatuloj" aŭ al la batalantoj kaj laboristoj armitaj per Maŭzedongpenso, la gravan demandon, ĉu oni sekvu en funkciigado de fabrikoj la reviziisman linion de la granda renegato Liu Ŝaŭki aŭ la proletaran revolucion linion de Prezidanto Maŭ, nome: sinapogi sur la propraj fortoj. Tiam la membroj de la partia komitato pli profunde studis la instrukcion faritan de Prezidanto Maŭ je la 7-a de majo kaj liajn aliajn eksplikojn pri la batalo inter la du linioj kune kun la amasoj, kaj lige kun la realo ili kritikis la tutan reviziisman linion en konstruado de la armeo antaŭenpuŝitan de la granda renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki, tiel ke ĉiuj ekkonis ke dank' al Maŭzedongpenso ni venkis la japanan imperiismon kaj ekstermis okmilionan armeon de la kuomintangaj reakciuloj per milio plus fusiloj en la militaj jaroj, kaj ke dank' al Maŭzedongpenso ni venkis la agresan armeon de la usona imperiismo per milio plus fusiloj sur la batalkampo en Koreio. Hodiaŭ, ni pli devas multe, rapide, bone kaj ekonomie starigi

paperan fabrikon per niaj propraj manoj dank' al Maŭzedongpenso. Kaj ili decidis starigi kaj ekfunkciigi la fabrikon en la sama jaro.

Trovinte klaran direkton, la komandantoj kaj batalantoj ekposedis multoble kreskintan memfidon kaj ardan laborfervoron. De supre ĝis malsupre ĉiuj ekagis plenvapore.

Por konstrui la fabrikon estis bezonataj centoj da planoj, kompleto da ekipaĵo kaj milo da specoj de materialoj kaj instrumentoj . . . , sed ili siatempe posedis nur ses malnovajn elektrajn maŝinojn, tri kubmetrojn da ligno kaj ses tunojn da ŝtalo. Kiel starigi la fabrikon kaj ekfunkciigi ĝin en la sama jaro kun tiuj rimedoj? Vicoj da malfaciloj kaj obstakloj staris antaŭ ili.

Kion fari? Ĉu apogi sin sur la propraj fortoj aŭ etendi la manojn al la ŝtato? Du malsamaj opinioj aperis inter la komandantoj kaj batalantoj. Iuj opiniis ke oni devas apogi sin sur la propraj fortoj kaj iri la vojon de multeco, rapideco, boneco kaj ekonomieco, kaj aliaj opiniis ke oni ne devas agi "arbitre". La du opinioj spegulis batalon inter la du linioj. Ne eblis bone efektiviĝi la instrukcion de la 7-a de majo de Prezidanto Maŭ sen solvo de tiu ĉi problemo. La partia komitato de la trupo unue studigis la instruojn de Prezidanto Maŭ pri sinapogo sur la propraj fortoj, penema luktado en malfaciloj, frakaso de superstiĉoj kaj liberigo de la pensoj. Ju pli la komandantoj kaj batalantoj studis, des pli ili trovis, ke la instruoj respondas al iliaj bezonoj kaj klariĝis al ili la menso. Ili venis al sama kono, ke atendo kaj dependeco ne konformas al la instruoj de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Antaŭe, la granda renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki lakee dependis de eksteraj helpoj kaj interne distrumpetis "sklavecon antaŭ fremduloj" kaj "likvidismon", fakte kapitulacismon, kiu kontraŭstaris komplete al la revolucia linio de Prezidanto Maŭ.

La vastaj amasoj de komandantoj kaj batalantoj decidis komandi ĉion per Maŭzedongpenso, esti kuraĝaj en penso kaj ago, kaj elimini per praktikaj agadoj la venenajn influojn de la reviziismo de Liu Ŝaŭki, tiel ke la prepara kaj konstrua laboro de la fabriko grandpaŝe progresis.

La rapideco de pretigo de la konstruaj planoj koncernis la progreson de la tuta konstrua laboro. Kamarado Li Jing, estro de la kazerna fako, kiu aĝis pli ol 50 jarojn kaj antaŭe planis nur por ordinaraĵoj unuetaĝaj domoj, planado de fabrikaj domoj al li estis vere nova tasko. Li lernis, enketis



Instalo de ekipaĵo per la propraj manoj

kaj ripetade studis kaj planis kune kun batalantoj, laboristoj kaj teknikistoj. Iatempе por solvi malfacilan problemon, li maldormis tutan nokton. Li diris kun profunda kompreno: "Ni ne nur lernas desegni kaj plani, sed plej grave estas ke ni defendas la proletaran revolucion linion de Prezidanto Maŭ. Mi estas komunisto kaj revolucia batalanto, kaj absolute ne klinos mian kapon antaŭ malfaciloj." Tiel li intense batalis kune kun la batalantoj, laboristoj kaj teknikistoj dum pli ol unu monato kaj plenumis la ĉefan parton de la tasko de planado, tiel ebligante antaŭdatan komencon de la konstrua laboro.

La fabrika domo estis konstruita. Nun venis la problemo kiel instali la sferan kaldronon kun volumeno de 25 kubmetroj kaj pezo de 8 tunoj. La malfacilo estis nesufiĉo de spaco por uzi arganon. La vastaj amasoj de komandantoj kaj batalantoj komencis turniĝi ĉirkaŭ la komuna centro por elpensi bonajn ideojn kaj metodojn por solvi tiun problemon. Ili metis lignostangojn sub la kaldronon,

ĝin puŝis per traktoro, levis supren per takelo kaj kriko . . . , jen tiel ili fine sukcesis instali la sferan kaldronon!

Maŝinoj estas la koro de la fabriko, sed multo mankis por formi kompletan ekipaĵon. Ili sendis riparistojn de armiloj por lerni konstrui maŝinojn ĉe alia paperfabriko en la loko. La revoluciaj oficistoj kaj laboristoj de la fabriko treege ĝojiĝis, informiĝinte pri la intenco de tiu trupo de PLA, kaj prenis helpadon al ĝi kiel efektivan agadon por plenumi la instrukcion de la 7-a de majo de Prezidanto Maŭ. Ili varme subtenis la trupon en fabrikado de maŝinoj, edukado de personaro kaj provizado de materialoj. En la gisejo estis 54-jara laboristo majstro Gin, kiu tiam ripozis hejme pro alta sangpremo. Informiĝinte pri tio ke la gisejo helpas la trupon por fandi sekigajn cilindrojn, li meminciate proponadis sian helpon ĉe la trupo. Konsiderante lian malbonan farton, la kamaradoj de la trupo rifuzis lian proponon kaj konsilis lin ripozi hejme, sed majstro Gin

tute ne volis cedi. Rememorante siajn amarajn tagojn en la pasinteco, kiam li laboregis kiel bruto por kapitalistoj, en komparo kun la nuna feliĉa vivo, li diris kun emocio: “Sen Prezidanto Maŭ ne estus mia hodiaŭa feliĉa vivo! Se mi ne povas plenumi pezajn laborojn pro mia malsano, mi almenaŭ povas doni iajn konsilojn en la laboro, por ke mi povu iel kontribui en efektivigado de la instrukcio de la 7-a de majo de Prezidanto Maŭ!” Kion la maljuna laboristo diris, li tion plenumis. Dum la fandado de la cilindroj, li venis al la gisejo kaj donis laŭbezone konsilojn, plene manifestante sian fidelecon al Prezidanto Maŭ. Sub lia direktado, la du cilindroj estis fanditaj en kvalito superinta la postulon de la projekto. Oni trovis neniun veziketon en la cilindroj. Laŭdate li diris modeste: “Tio estas frukto de Maŭzedongpenso, kiu armis mian kapon, kaj mi distancas de doktoro Bethune ja ankoraŭ tre malproksime!”


.....


Nun venas la tempo por instali kaldronegon. Tio estas la lasta punkto de la tuta konstrua laboro de la fabriko, de kiu dependis la problemo, ĉu la fabriko povos ekfunkcii en la sama jaro. La malfaciloj estis: manko de sufiĉa tempo kaj komplikeco de la tekniko. Se oni farus laŭ kutima

ritmo aŭ pere de laboristoj el lokaj fabrikoj, necesus 40-50 tagoj kaj tiam ne eblus al la fabriko komencian funkciadon en la sama jaro. La vastaj amasoj de komandantoj kaj batalantoj diris: La revoluciaj popoloj de la lando kaj de la tuta mondo urĝe bezonas la ruĝajn trezorajn librojn; ni devas gajni tempon por kiel eble plej frue komenci la produktadon! Ili streĉis plene sian energion por gajni ĉiun minuton kaj sekundon. Iuj laboris en sinsekvaj deĵoroj kaj aliaj persistis en laboro malgraŭ sia malsano. Revoluciaj oficistoj kaj laboristoj de multaj fabrikoj de la loko meminitate sendis helpantojn al la trupo, informiginte pri ĝiaj malfaciloj en instalo de kaldronego. Iuj laboristoj venis helpi post sia deĵortempo fore de loko kelkajn liojn fora. La ferioj fariĝis kvazaŭ tagoj de volontaj laboroj. Dank’ al kuna klopodado de armeanoj kaj popolanoj, la instala laboro estis finita per 19 tagoj en kvalito konforma al la postulo de la projekto.

Per la praktikado de la konstruado de la fabriko, la vastaj amasoj de komandantoj kaj batalantoj trapasis tre bonan hardon en politiko kaj tekniko. Kun la produktado de neĝe blanka papero en la fabriko funkciigata de armeanoj, rapide kreskas ankaŭ generacio de novaj homoj.

Blanka papero estas amase produktata dank’ al disvolvo de la spirito de “sinapogo sur la propraj fortoj”.





La akvokondukujo super Manghe-rivero

Nuntempaj Malsaĝaj Avoj sub Vangvu-monto

HE NAN

*Maŭzedongpens' malsaĝajn avojn de nuntempo
elkulturas,*

*Per propraj fortoj ĉielarkon en la mondo ni
konstruas.*

Jen versduo gravurita sur la “Akvokondukujo de Nuntempaj Malsaĝaj Avoj” de kanalo kiu kondukas akvon de Kinŝuj-rivero al Manghe-rivero, de Gijuan-gubernio, Henan-provinco. Ĝi prezentas la heroecon de la Gijuan-a popolo konkeri la naturon per spirito de montotranslokigo fare de la Malsaĝa Avo kaj venki la klasajn malamikojn intencantajn subfosi la konstruadon de la kanalo, dank’ al la ĉiamvenka Maŭzedongpenso.

LA DEZIRO DE MULTAJ GENERACIOJ

Gijuan-gubernio estas montregiono, ĉirkaŭata triflanke de montoj Tajhang kaj Vangvu. En ĝi ĉie zigzagas ondaj montetoj kaj tumultas senlima flava tero. Ĉi tie kvankam troviĝas Manghe-rivero en la okcidento kaj Kinŝuj-rivero en la oriento, tamen ili suden torentis preter montpiedoj al Flava Rivero kaj neniam irigaciis la kampojn. Pro manko de akvo pomua produktkvanto nur estis ĉirkaŭ 100 ĝinoj aŭ kelkdek ĝinoj. Tial la trosekeco

serioze minacis la popolanojn tie loĝantajn. Ĉir-kulis popolkanto en multaj generacioj, kiu montras la suferon de la laboranta popolo en la malnova socio:

La montoj estas kalvaj.

Forestas akv’ en valoj.

Neniam donas grenon

Plugad’ en ĉiuj jaroj.

Malsato dispelas homojn.

Senfinas la amaroj.

Kiel la laboranta popolo sopiris al la akvo! Sed, en la malnova socio regata de la ekspluata klaso, oni nur povis turni sian deziron en miton, revante ke iutage “la drako de Kinŝuj-rivero ascendas la montojn kaj donos akvon”.

Nia granda patrolando estis liberigita. Sub la gvido de Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio la popolo de la montregiono sin libergigis kaj suriris la vojon de kooperigo. Tio kreis kondiĉojn por amasa entreprenado de akvoutiligo — efektivigo de la deziro de multaj generacioj.

La akvoutiligo estis komencita per jungado de Manghe-rivero. Oni plantis arbojn por preventi grundan erozion, konstruis malgrandajn akvore-

zervejojn por superregi inundegon. En 1957, en la talio de montoj oni konstruis kanalon 4 kilometrojn longan, kiu alkondukis la akvon de Manghe-rivero, kaj tiel turnis parton de seka sabloza tero en irigaciatan kampon.

Konstruado de tiu ĉi kanalo estas la unua paŝego kiun faris la Gijuan-anoj en siatempa batalo kontraŭ la naturo. Tio plifortigis ilian fidon en transformo de naturo. Ili pensis: Se la akvo de Manghe-rivero en la okcidento povas esti sukcese kondukita al montoj, kial oni ne povas alkonduki la akvon de Kinŝuj-rivero en la oriento por subteni Manghe-riveron? Ekde tiam, oni komencis batali por efektiviĝi la idealon.

RIPETADA KLASA LUKTADO

La voĉo de la amaso venis en la malnovan gubernian partian komitaton, sed en ĝi aperis du plene kontraŭstaraj vidpunktoj:

Unu el ili estis ne kredi, ke ĉe la amasoj latentas treege granda socialisma entuziasmo; kaj ne zorgi pri la amasa produktado kaj interesoj de la amaso kun la diro: “Estas malfacile haki montojn kaj fosi kavojn! Kiel la kamparanoj povas fari tiel grandan konstruadon!”

La alia estis kredi, ke **la amaso estas vera heroo**, kaj ke **la popolamasoj posedas senliman krean povon**.

Ili diris: “Se per unu jaro ni ne finas la konstruadon, do per tri aŭ kvin jaroj; se ne sufiĉas tri aŭ kvin jaroj, do ni laboras ok aŭ dek jarojn. Se nur ni apogas nin sur Maŭzedongpenso kaj la popolamaso, ni certe kondukos la akvon de Kinŝuj-rivero al Tajhang-monto.”

La du vidpunktoj fakte spegulas du liniojn. De tiam komenciĝis la akra batalo inter la du linioj.

Ekde 1958, kun forta deziro de transformo de la montregiona fizionomio la popolo de Gijuan-gubernio kelkfoje venis al Tajhang-monto. Spite la vintran froston, ili disrompis la glacieron, iris en la akvon por labori, konstruis vojojn kaj pontojn, mezuris irliniojn de kanalo per loka metodo kaj atendis la sankcion al ekkonstruado.

Sed la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon de la malnova gubernia partia komitato foje kaj refoje donis al ili la nigran ordonon: La konstruado estas nepermesata!

En 1960, okazis granda sekeco en Gijuan-gubernio. Ju pli intensiĝis la sekeco, des pli urĝis la postulo de la amaso pri akvoutiliga konstruado. La plano de konduko de Kinŝuj-rivero al

Manghe-rivero denove estis elmetita. Tiam, Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj tamen diris: “Ne konstrui pro la sinsekvaj katastrofoj kaj la malriĉeco de la amaso; ne konstrui pro manko de investo de la ŝtato; ne konstrui pro la malforta tekniko.” Pli kaj pli klare malkovriĝis la vizaĝoj de la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kontraŭ la revoluciaj amasoj.

Kun flamanta indigno la vastaj popolamasoj rigore refutis tiun ĉi reviziisman absurdaĵon.

Sonis la klariono de la Granda Proletara Kultura Revolucio persone iniciatita kaj gvidata de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ, kiam la vastaj revoluciaj amasoj kaj revoluciaj kadroj faris intensan batalon kontraŭ la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon. Sub la direktado de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ, sub la kuraĝigo de la revolucia spirito de montotranslokigo de Malsaĝa Avo la heroaj gefiloj ĉe Vangvu-monto ribelis kontraŭ la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon de la malnova gubernia partia komitato kaj refoje faris heroan decidon transformi la naturon. Kun la trezora libreto en la manoj ili solene ĵuris al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ: “Ni faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilojn por akiri venkon. Ni nepre kondukos surmonten la akvon de Kinŝuj-rivero!” Grandioza armeo por konduki la akvon de Kinŝuj-rivero ekmarŝis sur montojn.

HIMNOJ VERKITAJ DE NUNTEMPAJ MALSAĜAJ AVOJ

Apenaŭ komenciĝis la kondukado de Kinŝuj-rivero al Manghe-rivero, tuj venis nova provo antaŭ la Gijuan-a popolo.

Por konstrui kanalon de Kinŝuj-rivero al Manghe-rivero oni devis trapasi pli ol 80 danĝerajn krutaĵojn. En ĉiu antaŭenmarŝo oni renkontos malfacilojn kaj danĝerojn.


Profitante la okazon por subfosado la plenmano da klasaj malamikoj disvastigis onidiron: “Sur montoj gardas koboldo, en la akvo regas drako. Se oni la feojn ofendas, oni do plagon renkontos.”

Alfrontante malfacilojn de la naturo kaj la subfosadon de la klasaj malamikoj, la popolanoj partoprenantaj la akvokondukadon organiziĝis kaj ripetade studis la brilajn “tri popularajn artikolojn”, forte kritikis la “filozofion de vivkonservo” kaj aliajn absurdaĵojn de Liu Ŝaŭki. Ju pli oni lin kritikis, des pli oni estis plenaj de energio kaj kuraĝo.

En procezo de trahakado de Jinvu-kavego iu mino ne eksplodis. Jen tio malhelpos la laboron.



La serpentumanta kanalo alkondukas akvon sur monton ĉirkaŭ krutaĵo.



Realigis la longe aspirata revo de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj ĉe ambaŭ bordoj de Manghe, kaj la maljunaj malriĉkamparanoj ridas de ĝojego.

Kunportante lanternon kadro Vang Guoding de la fako de la popola armita forto de la gubernio penetris la unua en la fumplenan tunelon.

Apenaŭ Vang Guoding proksimiĝis al la eksplodaĵo, li subite trovis meĉon sible fumantan. Li tuj konsciis, ke ĝi ĝuste estas la neeksplozinta.

Baldaŭ estis eksplodonta la dinamitaĵo, sed post li sekvis pluraj konstruantoj. Kion fari? En tiu ĉi kriza momento, pensante pri la granda instruo **“La morto por la interesoj de la popolo estas pli peza ol la monto Tajŝan”**, Vang Guoding senhezite sturmis al la eksplodaĵo, fortiris la meĉon kaj per tio preventis gravan akcidenton.

La heroaĵo de Vang Guoding estas la plej forta kritiko al la “filozofio de vivkonservo”! Tio rapide disvastiĝis tra la tuta konstruejo, kortuŝis kaj edifis la vastajn amasojn de konstruantoj tiel profunde, ke ili laboris kun ankoraŭ pli granda entuziasmo.

Ne troviĝis vojo sur krutaj montoj. La konstruantoj pendigis de sur montpinto ŝnuregon, helpe de kiu ili grimpis tien por labori kaj reen por ripozi trifoje en ĉiu tago.

Troviĝis neniu starejo sur rokmuro, ili laboris en alta loko, liginte sian lumbon per ŝnuro.

Estis malfacile transporti la materialojn. Ili do iom post iom ĉirkaŭvolvis sian talion per ŝnuro kun ili aŭ ilin rekte ligis sur sian dorson por suprenporti. Tra miloj kaj dekmiloj da fojoj ili fine transportis al montoj kelkcent mil ĝinojn da materialoj.

La malfaciloj estis venkitaj unu post alia kaj aperis nombro post nombro da avangardaj personoj.

Situante sub la krutaĵo kaj super la abismo la “Terura Abismo” estis unu el la plej danĝeraj

lokoj en la tuta konstruado. Sed, ĝi neniel timigis la heroojn armitajn per Maŭzedongpenso. Sur la krutaĵo alta je kelkcent metroj, sub gvido de komunisto Vang Ĝengfeng, ĉirkaŭliginte la talion per ŝnuro 25 malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj pendante en la aero kaj riskante atakon de rokeroj elhakis vojeton, sur kiu povis iri nur unu homo.

Post komenciĝo de la luktado ĉe la “Terura Abismo”, sur krutaĵo pli ol 30 metrojn super la laborloko krevis kolosa ŝtonego pro skuado de eksplodoj. Ĝi serioze minacis sekurecon de la laborantoj, ĉar ĉiumomente ĝi povis defali.

Kerna milicano Song Juven kuraĝe prenis sur sin la gloran taskon forigi la danĝeran ŝtonegon. Kroĉante ŝtonfendojn per la manoj kaj sin kramante sur la krutaĵo li grimpis al la danĝera ŝtonego. La haŭto de liaj piedoj estis frotvundita, liaj manoj sangadis pro gratado kaj en ĉiu lia antaŭenpaŝo la krutaĵo estis surverŝita de lia freŝa sango. Kiam li renkontis pli grandajn malfacilojn en lia antaŭenmarŝado, venis al li en la orelojn valskua ĥora deklamado de la konstruantoj: **“Faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilojn por akiri venkon.”** Ĝi donis al Song Juven neelĉerpeblan kuraĝon. Kun vigla spirito kaj alta batalvolo li paŝon post paŝo grimpis antaŭ la danĝeran ŝtonegon, enmetis la dinamitaĵon kaj eksplodigis la kolosan ŝtonegon.

Sur la konstruejo de la kanalo por konduki akvon de Kinŝuj-rivero al Manghe-rivero aperis nombro post nombro da herooj kia Song Juven, kiuj per siaj praktikaj agoj verkis unu post alia superbajn himnojn de Maŭzedongpenso kun senlima fideleco al Prezidanto Maŭ.

REALIĜIS LA IDEALO

La batalado en konduko de Kinŝuj-rivero al Manghe-rivero estis venke iranta.

La plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon ne volontis akcepti sian malvenkon. Vidante, ke la amasoj ne cedis antaŭ ilia subpremado, nek estis timigitaj de la malfaciloj, ili provis utiligi iom da regpotenco portempe restanta en la manoj por subfosi la konstruadon en ekonomio, materialo kaj tekniko. Iutage, ilia “specialisto de akvoutiligo” venis al la konstruejo kaj diris sinjore: “Mankas al vi unue specialisto, due materialo kaj trie meĥanikaj ekipaĵoj. Kiel vi povas entrepreni la tiel kolosan konstruan laboron? Vere estas malfacile!”

La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj revoluciaj kadroj armitaj per Maŭzedongpenso diris kun heroa volo: “Kiom ajn da malfaciloj estas, ni tamen ilin venkos per Maŭzedongpenso; kiom ajn da nesufiĉoj estas, ni tamen ilin konkeros per Maŭzedongpenso!” Sekvante la grandan instruon de Prezidanto Maŭ “**sinapogi sur propraj fortoj kaj strebi al potenciĝo**”, per siaj propraj manoj ili konstruis dinamitan fabrikan, cementan fabrikan, kalkan fabrikan, lignan fabrikan, riparan kaj produktan fabrikan de instrumentoj; apogante sin sur la saĝo de siaj lokaj memedukitaj specialistoj kaj vastaj amasoj ili kondukis la konstruojn farante projektojn.

La granda akvokondukujo “Ruĝas la Oriento” estas aorta konstruo de la tuta kanalo. La bataliono de konstruantoj de Ĉengguan-komunumo, elektita kiel progresema kolektivo de la konstruejo, glorie akceptis tiun ĉi malfacilan taskon.

Antaŭ la konstruado, politika direktanto de la bataliono Guo Gjun organizis la konstruantojn lerni la verkon *Montotranslokigo Fare de Malsaĝa Avo* kaj sur la konstruejo disvolviĝis arda revolucia amasa kritikado, en kiu oni forte kritikis la kontraŭrevoluciajn reviziismajn absurdaĵojn de Liu Ŝaŭki kiaj “gvidado de akvoutiligo per specialistoj”, “filozofio de sklaveco antaŭ fremduloj” k. a. Li ankaŭ mobilizis la konstruantojn doni proponojn, elmeti projektojn kaj fari profundan enketon kaj esploron.

Kiam iris fosado de kavoj por fundamentoj, ĝuste regis frosta vintro. Spite la frostan ventegon kaj neĝon ĉiuj strebis la unuaj rompi la glacieron kaj sinĵeti en la akvon por labori. Ju pli profundiĝis la fosadoj, des pli multiĝis la subtera akvo. Oni

elĉerpis akvon per lavpelvoĵoj aŭ svingĉerpiloj pro manko de pumpilo.

Kiam la fosadoj estis pretaj, la temperaturo falis ĝis 10 gradoj sub nulo. Laŭ la malnovaj konstruaj reguloj oni ne preparis betonon sub tia kondiĉo. Laŭ sia praktika sperto la konstruantoj decidis rompi la malnovan rutinon kaj laboris sube per la helpo de la tervarmo. Kiam la pilieroj levigis super la tero, la temperaturo fariĝis pli malalta. Ili do ekuzis varman akvon kaj konservis la varmon per pajloj. La konstrua laboro iris kaj rapide kaj bonkvalite, kaj la pilieroj pli kaj pli altiĝis.

Altiĝis la pilieroj kaj venis la problemo en altaera transportado de materialoj. Dank’ al plilongigo de la brako de la argano kaj plialtigo de la vojolito sub la levmaŝino ili sukcese plenumis la taskon de levado.

Sub la komuna penado de la grandnombraj konstruantoj, revoluciaj kadroj kaj revoluciaj teknikistoj, la granda akvokondukujo “Ruĝas la Oriento” estis konstruita en nur 9 monatoj, kiu bezonas du jarojn laŭ la kalkulo de tiuj “specialistoj de akvoutiligo”. Jen ĝi majeste staris sub Vangvumonto.

400,000 popolanoj de Gijuan-gubernio armitaj per Maŭzedongpenso ja meritas la nomon de novaj Malsaĝaj Avoj de nia epoko. Ili fine realigis sian idealon tra peniga luktado de tri vintroj kaj tri someroj. En la 27-a de decembro de la pasinta jaro, en Gijuan-regiono, la serpentumanta kanalego laŭ montoj pli ol 3 metrojn profunda, pli ol 7 metrojn larĝa kaj pli ol 70 kilometrojn longa estis sukcese finkonstruita. Ĝi trairis la mezan parton de Tajhang-monto, flugis trans la montpiedon de Vangvu-monto, ĉirkaŭpasis pli ol 300 montpintojn, transpasis pli ol 200 riveretojn, trairis 33 tunelojn kun totala longeco de 7.5 kilometroj, iris tra pli ol 200 akvokondukujoj, pontoj, kluzoj k.s. konstruaĵoj kaj kunligis pli ol 20 grandajn kaj malgrandajn kanalojn, 68 akvokonservujojn kaj ĉ. dek milojn da lagetoj de la baseno de Manghe-rivero. La de ĝi irigaciata areo estas pli ol 300,000 muoj.

Sukcese inaŭguriĝis la kanalo kondukanta Kinŝuj-riveron al Manghe-rivero! Ruliĝas la akvo de Kinŝuj-rivero laŭ la serpentumanta kanalo. Kun bolanta ĝojo ĝi torentas en ŝaŭmantaj ondetoj! Same kiel himno, kun plena pasio ĝi laŭdas la grandan venkon de Maŭzedongpenso kaj emociplene prikantas la neelĉerpeblan saĝon de la revoluciaj amasoj.

Iri la Vojon de Armita Batalo


VIGLE disvolviĝas la revolucia batalo de la revoluciaj popoloj de la mondo kontraŭ la usona imperiismo, sovetunia reviziismo kaj diverslandaj reakciuloj. El sia batalo, la veraj marksism-leninismaj partioj kaj organizoj kaj la vastaj revoluciaj popoloj de diversaj landoj pli kaj pli bone konis, ke Maŭzedongpenso estas potenca ideologia batalilo por gvidi ilian batalon. En sia batalo ili kombinas paŝon post paŝo, la universalan veron de Marksismo-Leninismo-Maŭzedong-

penso kun la revolucia praktiko de sia propra lando kaj senĉese akiras novajn venkojn.

MAŬZEDONGPENSO ESTAS BAZA KONDIĈO POR AKIRI VENKON

En multaj landoj de Azio ĉie flirtas la flagoj de revolucia armita batalo. La marksism-leninismaj partioj gvidantaj armitan batalon, alvokis siajn partion kaj armeon konscie studi Maŭzedongpenso, efektiviigi la grandan militan penson

Mozambikaj gerilanoj kolektive studas verkon de Prezidanto Maŭ.



de Prezidanto Maŭ en la agadoj de sia revolucia armita batalo kaj persisti kombini en sia batalo Marksismon-Leninismom-Maŭzedongpenson kun la konkreta revolucia praktiko de sia propra lando. La Komunista Partio de Tajlando publikigis alvokon, ke ĉiuj partianoj, kadroj, batalantoj de popolaj armitaj fortoj kaj revoluciaj popolanoj “pli vaste kaj profunde disvolu la movadon de viva studo kaj viva apliko de la verkoj de Maŭ Zedong por ĝisfunde transformi sian mondkoncepton, laboru kaj efike solvu diversajn demandojn per la starpunkto, vidpunkto kaj metodo de Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso kaj studu kun plena atento la verkojn de Prezidanto Maŭ Zedong pri militaj aferoj, por ke la brilo de la granda Maŭzedongpenso prilumu la teron de Tajlando”. En sia rezolucio la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Birmo alvokis la birman popolon studi kaj firme posedi Maŭzedongpenson kaj persisti ĉe la revolucia linio “gajni la militon kaj kapti la regpotencon”.

La hinda revolucia popolo, kiu estas iranta sur la vojon de armita batalo, studas verkojn de Prezidanto Maŭ kaj levis sian sperton el bataloj ĝis teorio kaj plifirmigis sian memfidon pri venko.

Iu hinda revoluciulo diris: “Ni troviĝas en la granda epoko de Maŭzedongpenso; por vidi la estontecon de armita batalo oni ne povas preterlasi la kondiĉojn de epoko. La popoloj de la mondo jam formis grandegan revolucian forton. En Hindio niaj fortoj certe grandiĝos dum batalo. Revoluciaj fortoj certe superos kontraŭrevoluciajn fortojn. Maŭzedongpenso estas posedata de la hinda popolo—jen la baza kondiĉo, dank’ al kiu ni certe gajnos la finan venkon.”

APLIKI MAŬZEDONGPENSON EN BATALO

Jam daŭris pli ol du jaroj la batalo de la kamparanoj de Sanrizuka en Ĉiba-gubernio de Japanio, kiuj organizis sin por persiste oponi la usonajn

La laosa popolo vaste disvolvas geriladon kaj donas fortajn batojn al la usona imperiismo kaj ĝiaj komplicoj. La bildo montras, ke milicaj gerilanoj pafas en arbaro.



kaj japanajn reakciulojn, kiuj klopodas konstrui novan Tokian Internacian Aerodromon.

La kamparanoj de Sanrizuka fervore studas la brilan penson de Prezidanto Maŭ kaj aplikas ĝin en sia batalo. Kontraŭ la usonaj kaj japanaj reakciuloj ili praktikas la principon “**oponi pinton kontraŭ pinto kaj batali pro ĉiu colo da tero**”. Ili prenis al si bastonojn kaj falĉilojn, konstruis turojn, starigis reton de alarmo, postenigis gardostarantojn kaj alte levis en sia vilaĝo ruĝan flagon kun vortoj “**Vivu Maŭzedongpenso**”. Ili uzas revolucionan perforton kontraŭ perforto kontraŭrevolucia kaj multfoje faris bravajn luktojn kontraŭ armitaj policianoj, kiuj venis por subpremi ilin.

Tomura Isaku, gvidanto de la kamparana movado de Sanrizuka, ofte legas la ruĝan libreton *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* kaj diversajn dokumentojn pri la Granda Proletara Kultura Revolucio de Ĉinio. Kun firma konvinko li alvokis ĉiujn: “Ni devas atente studi la sperton kaj teorion de la ĉina revolucio, kiu iras de venko al venko sub la gvido de Prezidanto Maŭ Zedong, por ke ni konduku la batalon de la japana popolo al venko.”

La kamparanoj de Sanrizuka firme kredas, ke la fina venko certe apartenos al la japana popolo, se ili kombinos Marksismen-Leninismen-Maŭzedongpenson kun la praktiko de la batalo de la japana popolo.

ARABA POPOLO AMAS STUDI VERKOJN DE PREZIDANTO MAŬ

La palestinaj gerilanoj, kiuj nun heroe faras armitan batalon, plej amas verkojn de Prezidanto Maŭ. Pro tio ke ili akiris nur malgrandan kvanton da verkoj de Prezidanto Maŭ, la batalantoj en kelkaj bazoj de palestinaj gerilaj taĉmentoj povas nur laŭvice studi tiujn verkojn en intertempoj de siaj bataloj. Iuj elekte studis koncernajn vortojn de Prezidanto Maŭ konforme al siaj konkretaj bataloj antaŭ ol ili faris atakon kontraŭ la izraelaj agresantoj. Maŭnir, heroa palestina batalanto, kiu glorie oferis sian vivon en batalo en februaro de la pasinta jaro, havis arablingvan eldonon de *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong* kaj ĉiam portis kun si kaj studis ĝin tuj kiam li trovis tempon. Omar, alia palestina batalanto, kiu heroe oferis sian vivon por protekti siajn kunbatalantojn, ofte diris dum sia vivo, al siaj kunbatalantoj: “Ne gravas, se ni oferos nian vivon en batalo. Nia ofero kondukos nian revolucion al venko, kaj ĝi nepre venkos. Ĝuste kiel Prezi-



Heroaj japanaj laboristoj kaj lernantoj partoprenas kunvenon por oponi kontraŭ la usonaj kaj japanaj reakciuloj, alte tenante la ruĝan flagon kun la surskribo “Vivu Maŭzedongpenso”.

danto Maŭ Zedong instruis al ni: ‘**La morto por la interesoj de la popolo estas pli peza ol la monto Tajŝan; la morto de tiu, kiu laboras por faŝismo kaj oferas sian vivon por ekspluatantoj kaj subpremantoj de la popolo, estas pli malpeza ol lanugero.**’

En la Unuiĝinta Araba Respubliko, Sirio, Irako, Alĝerio, Jemeno, Sudano kaj multaj aliaj arabaj landoj kaj en la areoj okupitaj de Izraelo, la vastaj arabaj popolamasoj levis fojon post fojo tajdojn de amasa manifestacio kaj protesto kontraŭ la agreso fare de la usona imperiismo kaj Izraelo. Ili studas kaj aplikas Maŭzedongpenson en sia batalo. Iu maljuna sudana laboristo diris kun emocio al raportisto de Hinhua-Novajagentejo: “Ni araboj ne havas rimedon por forigi la usonajn kaj izraelajn agresantojn krom iri la vojon de Maŭ Zedong.” Poste li elpoŝigis la ruĝan libreton *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* kaj laŭte legis:



Karaj kamaradoj:

Vivu! Longe, longe vivu la granda gvidanto Prezidanto Maŭ Zedong!

Hodiaŭ, la ĉina popolo, gvidata de la Komunista Partio de Ĉinio kun la provita marksisto-leninisto Prezidanto Maŭ ĉe la kapo, jam fariĝis nefleksebla kastelo ĉe la revolucio kaj socialismo, fariĝis

espero kaj defendanto de libero de la popoloj!

Karaj kamaradoj, profitante la okazon, ni volas diri al Prezidanto Maŭ, la granda gvidanto de la popoloj, la plej bona amiko de la albana popolo:

Senfine longan vivon al vi!

Vi estas la plej ruĝa suno en la koro de la tutmonda popolo!

G. M. kaj V. P., Albanio

Estimataj fratoj:

Ni esprimas el la batalanta Vjetnamio koran bondeziron al la estimata Prezidanto Maŭ Zedong, al la granda Komunista Partio

de Ĉinio, al la ĉina registaro kaj la frata ĉina popolo.

Ni esprimas varman dankon al la frata ĉina popolo, kiu firme subtenas la vjetnaman popolon konduki batalon ĝis kiam la usonaj agresantoj tute estos forpelitaj el Vjetnamio.

Prezidanto Maŭ diris: **“La septcentmiliono ĉina popolo estas potenca apogilo por la vjetnama popolo, kaj la vasta teritorio de Ĉinio estas fidinda postfronto de la vjetnama popolo.”**

Karaj kamaradoj, ni ankoraŭfoje elkore salutas vin kaj esperas intiman ligiĝon inter ni. Sinceran dankon.
K., Vjetnamio



“La revolucia milito estas milito de la amasoj; ĝi povas esti farata nur per mobilizo de la amasoj kaj dank’ al ilia apogo.”

El la agresa milito farita de Usono kaj Izraelo en 1967, pli kaj pli multe da arabaj popolanoj pli klare konis la kriman vizaĝon de la sovetunia reviziisma renegata kliko, kiu havas langon mielan, sed koron kruelan. En la komenco iu alĝeria studentino ne vidis la perfidon de la sovetuniaj reviziistoj, sed ŝi trovis klaran respondon post kiam ŝi atente studis *Vortojn de Prezidanto Maŭ Zedong*. Ŝi diris kun profunda sento: “Kiu estas niaj malamikoj? Kiu estas niaj amikoj? Tio estas demando kun primara graveco por la revolucio. La sovetuniaj reviziistoj supraĵe subtenas la araban popolon, sed sube donis grandan helpon al la usonaj kaj izraelaj agresantoj flirtante kun ili. Tio fakte estas enpuŝi glavon en la dorson al la araba popolo. La araba popolo pli kaj pli klare vidas ĝian malbelan vizaĝon de falsa subteno kaj vera perfido.”

POTENCA IDEOLOGIA ARMILO

Ĉiam pli kaj pli multe da latinamerikaj revoluciaj popolanoj konstatas, ke Maŭzedongpenso estas potenca ideologia armilo kontraŭ imperiismo, reviziismo kaj reakciuloj, kaj ili pene studas kaj aplikas Maŭzedongpenson en sia praktika revolucia batalo.

Multaj revoluciuloj en Kolombio, kie oni jam prenis pafilojn por fari revolucion armitan bata-

lon, diris: “Ni, veraj revoluciuloj kredas la vortojn de Prezidanto Maŭ, ke **‘El la pafilo venas ŝtatpotenco’**. Ni ne povos akiri venkon, sen armita batalo. Tio estas vero.” En sia striko kontraŭ la usona imperiismo kaj perforta subpremado, grupo da revoluciaj studentoj en Bogota, la ĉefurbo de Kolombio, laŭte legis la vortojn de Prezidanto Maŭ: **“Faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilojn por akiri venkon”**, kaj forpelis plenmanon da reviziistoj, kiuj kontraŭstaris strikon kaj pledis por kompromiso. En Lorika, miloj da studentoj okazigis kune kun laboristoj kaj urbanoj mitingon kontraŭ la usona imperiismo kaj la registaro. Malgraŭ la subpremado de la reakciaj policanoj, grupo da revoluciaj studentoj en sia batalo alte tenis sur la stratoj slogantabulojn kun la vortoj **“Vivu Prezidanto Maŭ Zedong!”** kaj laŭte kriis revoluciajn sloganojn kia: **“Vivu la venko de la popola milito!”**

La revoluciaj junuloj de Brazilo, kiuj staras sur la fronto de la batalo kontraŭ la usona imperiismo kaj diktaturo, persiste studas kaj aplikas verkojn de Prezidanto Maŭ en sia batalo. Ili diris, ke la instruo de Prezidanto Maŭ **“Pravas ribelo kontraŭ la reakciuloj”** armas ilin per sentima batalspirito. Ili aktive ĵetis sin en la batalon de la brazila popolo kontraŭ la usona imperiismo kaj perforta subpremado kaj brave skribis sur stratoj la sloganojn **“For la usonan imperiismon!”** kaj **“For la diktaturan reĝimon!”**

Frakasu la Teorion de "Limigita Suvereneco" de la Novaj Caroj

EN koluzio kun la usona imperiismo, la reviziisma renegata kliko de Sovetunio jam delonge faras ĉie agresojn kaj ekspansiojn, intervenas en internajn aferojn de aliaj landoj kaj eĉ entreprenas militajn aventurojn por furioze atenci la teritorion kaj suverenecon de aliaj landoj. Por kovri sian agresan naturon de social-imperiismo, tiu bando da renegatoj, kiu estas malkuraĝa kiel ŝtelisto, fabrikis serion da faŝismaj paradoksoj, inter kiuj la plej energie prikriata, estas la teorio de "limigita suvereneco".

La ĉefo de la reviziisma renegata kliko de Sovetunio Breĵnev kaj similaj tirane kriaĉas, ke la "intereso de la socialisma komuneco", kiun ili kontrolas, estas la "plej alta suvereneco" kaj devas esti "lokita sur la unuan lokon", dum la suvereneco de aparta lando estas limigita; ke ili havas la rajton "decidi" la "sorton" de la membroj de la "komuneco", "inkluzive la sorton de ilia suvereneco"; ke ilia "milita helpo al frataj landoj por forigi minacon al la socialisma sistemo" celas "protekti" "la komunajn interesojn de la socialisma tendaro" kaj la suverenecon de koncernaj landoj. Tio estas pura rabista logiko de la novaj caroj, ke "agreso estas prava".

Tiu plenmano da senhontaj renegatoj ripetadis pri "komuneco", sed efektive ili celas nur arbitre treti la suverenecon de aliaj landoj kaj kruele rabi la riĉaĵojn kreitajn de la laboranta popolo de aliaj landoj sub la preteksto de "komuneco". Ĝuste kiel Vicprezidanto Lin montris en sia politika raporto: "Senĉese babilante pri 'frataj partioj' kaj 'frataj landoj', la sovetunia reviziisma renegata kliko fakte rigardas sin mem kiel patriarkan partion

kaj novan caron, kiu povas laŭvole okupi teritorion de aliaj landoj." Ili kontrolas la internajn kaj eksterajn aferojn de iuj landoj pere de la pupoj, kiujn ili starigis en tiuj landoj de la "komuneco", kaj fariĝis novaj caroj en plena senco. Utiligante la "Varsovian Traktaton" kiel instrumenton, ili postenigis multe da trupoj en membrolandoj de la "komuneco" kaj laŭvole faras ordonojn pere de siaj grandnombraj oficiroj en tiuj landoj. Krome, ili firme tenas en siaj manoj la ekonomian arterion de tiuj landoj pere de la t. n. "Konsilantaro de Ekonomia Interhelpo", duflankaj interkonsentoj, komerco kaj pruntedonoj, kaj tiel transformas tiujn landojn en siajn bazojn de krudaj materialoj, merkatojn de siaj varoj kaj siajn dependajn prilaborajn fabrikojn por fari kruelan ekspluaton, kaŭzante tre grandajn katastrofojn al iliaj popoloj. Unuvorte, la sovetunia reviziismo plene tenas en siaj manoj la politikan, militan kaj ekonomian potencojn de tiu "komuneco".

La rilatoj de la sovetunia reviziismo kaj aliaj membroj de la t. n. "komuneco" estas rilatoj inter rabanta kaj sklaviganta metropolo kaj prirabataj kaj sklavigataj kolonioj kaj dependaj landoj. La "komunaj intereso de la komuneco" priparolataj de la sovetunia reviziismo estas, fakte, intereso de la reviziisma kaj social-imperiisma Sovetunio. Ili distrumpetas ke oni "loku sur la unuan lokon" "la interesojn de la komuneco". Tio signifas, ke oni loku iliajn koloniajn interesojn sur la unuan lokon, ke la aliaj forlasu sian suverenecon kaj lasu sin esti senopozicie prirabataj. La armita okupado de Ĉeĥoslovakio estas ekzemplo de la t. n. "intereso de la komuneco". La agresa

agado de la sovetunia reviziismo renkontas fortan oponon de la ĉeĥoslovaka popolo. Lastatempe la skalo de la rezisto fariĝas ĉiam pli granda. Tial, la sovetunia reviziismo ekaplikis perforton. Ĝia ministro de nacidefendo iris tien por persone direkti la ĉeĥoslovakajn reviziistojn subpremi la ĉeĥoslovakon popolon kaj reĝisoris farson de deviga “ĉevalŝanĝo”— eksigi la pupojn, kiuj ne bone subpremis la ĉeĥoslovakon popolon, kaj trudis al la ĉeĥoslovaka popolo pupojn, kiuj estas pli obeemaj al la sovetunia reviziismo. Estas tute evidente, ke la teorio de “limigita suvereneco” distrumpetata de la sovetunia reviziismo celas nenion alian ol laŭleĝigi ĝian perfortan okupadon de Ĉeĥoslovakio kaj ĝiajn diversajn privilegiojn uzurpitajn en la membrolandoj de la “komuneco”.

Kio estas teorio de “limigita suvereneco”? Tio signifas ke la suvereneco de social-imperiismo de la sovetunia reviziismo estas “senlima” kaj ĝi povas libere ekspansiigi sian suverenecon al aliaj landoj kaj al la tuta mondo, dum la suvereneco de aliaj landoj estas limigita kaj devas submetiĝi al la agresa ekspansio de la sovetunia reviziismo, al la bezonoj de starigo de social-imperiisma hegemonio kaj al ĝia libera invado kaj treto.

Tiu absurda teorio de la sovetunia reviziismo servas tute al ĝia intenco redividi la mondon en koluzio kun la usona imperiismo. La lasta inventis la t. n. “komunecon de libera mondo”, kaj imite la sovetunia reviziismo elfaris “socialisman komunekon”. Tio estas evidente imperiismo kaj koloniismo, sed la sovetunia reviziismo plenforte klopodas por kovri sian veran vizaĝon de imperiismo per bela mantelo, kia “internaciismo” kaj similaj. Ili ripetade minacas senhonte: Kiu ne “lokas sur la unuan lokon” la interesojn de la “komuneco”, tiu “devias de la principo de internaciismo de la proletaro”. Tio estas ekstreme granda kalumnio kontraŭ la internaciismo de la proletaro!

En sia politika raporto, Vicprezidanto Lin montris: “Ni ĉiam opinias, ke la internaj aferoj de ĉiuj landoj devas esti aranĝataj de iliaj propraj popoloj. Ĉiuj landoj kaj partioj, ĉu grandaj aŭ malgrandaj, devas starigi interrilatojn sur la principo de egaleco kaj reciproka neinterveno en internajn aferojn. Por defendi tiujn marksism-leninismajn principojn, la Komunista Partio de Ĉinio kondukis longdaŭran batalon kontraŭ la abomeninda grandregna ŝovinismo de la sovetunia reviziisma renegata kliko. Tio estas de ĉiuj konata fakto.” En sia “komuneco”, la sovetunia reviziismo tiel arbitre tiranas kaj laŭvole atencas la

suverenecon kaj intervenas en la internajn aferojn de aliaj landoj, ĝisfunde detruante la plej elementan kaj de ĉiuj rekonatan principon de ŝtata suvereneco, kaj ĝi ankoraŭ senĉese parolas pri “internaciismo de la proletaro”. Ĝi simple ne scias, kio estas hontindeco! Por diri rekte, la t. n. “internaciismo” de la sovetunia reviziismo estas nenio alia ol kosmopolitismo de imperiismo, estas grandregna ŝovinismo, kiu celas konkeri kaj sklavigi aliajn naciojn kaj starigi ĝian hegemonion en la mondo.

La teorio de “limigita suvereneco” propagandata de la sovetunia reviziisma renegata kliko precize estas tio, kion samtone kantas Usono, la imperiismo n-ro 1, kaj cetere estas plagiatita ĉe la lasta. Dulles, mortinta ĉefulo de la usona imperiismo, estis unu el la plej energiaj distrumpetantoj de la teorio de “limigita suvereneco”. En sia artikolo *Defioj Ricevitaj de la Usonaj Politikoj kaj Ties Reagoj*, tiu estinta ŝtata sekretario de Usono diris: “Sur internacia tereno”, “kio igas unuopajn landojn senti, ke ili povas loki tion, kion ili opinias siaj naciaj rajtoj kaj intereso, super la bezonoj de la tuta socio konsistanta el ĉiuj landoj”, “jam fariĝis arkaika ideo de suvereneco”. Li daŭrigis ambicie: “En la estonteco, povos kaj devos esti multe pli da volonteco ol nun submeti la naciajn interesojn al la interesoj de la monda komuneco.” Tiu aserto estas tute sama al la “teorio” de la sovetunia reviziisma renegata kliko! La usona imperiismo kriaĉis ke la ŝtata suvereneco “jam fariĝis arkaika” ideo; kaj la sovetunia reviziismo distrumpetas ke oni ne “traktu la enhavon de suvereneco kiel ion pure formalan”. La usona imperiismo kriaĉis ke oni devas “submeti la naciajn interesojn al la interesoj de la monda komuneco” sed ne devas loki siajn naciajn suverenecojn “super la bezonoj de la tuta socio konsistanta el ĉiuj landoj”; kaj la sovetunia reviziismo distrumpetas ke la ŝtata suvereneco “jam ne estas problemo de la popolo de unu lando”, kaj ke oni devas “loki sur la unuan lokon la komunajn interesojn” de la “komuneco”. La usona imperiismo kriaĉis ke necesas “limigi la nacian suverenecon kaj starigi internacian suverenecon”; kaj la sovetunia reviziismo distrumpetas ke la suvereneco de iu ajn lando estas limigita kaj la suvereneco de la “komuneco” estas “la plej alta suvereneco”. La du “hegemonioj” parolas en sama tono. Ĉu tio ne atestas ke la sovetunia reviziismo kaj la usona imperiismo estas de sama speco? Estas videble, ke Breĵnev tre fidele plenumas la testamenton de Dulles kaj tute indas la nomon de fidela disĉiplo de Dulles.

Hodiaŭ, la sovetunia reviziisma renegata kliko

Refuto al la Tiel Nomata Teorio de “Internacia Diktaturo”

ENTRUDIĜINTE en fremdan domon rabisto asertas, ke li venas por “protekti la sekurecon” de la dommastro. Tio ĉi estas rabista “teorio” de imperiismo kaj faŝismo, rabista “teorio”, kiun kutime uzas la usona imperiismo, kiam ĝi faras agre-san militon. La tiel nomata teorio de “internacia diktaturo”, kiun energie distrumpetas la sovetunia reviziisma renegata kliko, ĝuste estas nova “vario” de tiu rabista “teorio”.

En la 12-a de novembro de la pasinta jaro, en sia parolado al la “kvina kongreso” de la pola reviziisma partio, ĉefo de la sovetunia reviziisma renegata kliko Breĵnev senkaŝe kriaĉis, ke en okazo de minaco al la “sekureco de la socialisma komuneco”, kiel nomata de la sovetunia reviziismo (t.e., la koloniaj interesoj de la sovetunia reviziismo en kelkaj orienteŭropaj landoj kaj en la Mongola Popola Respubliko), “tio jam fariĝas ne nur problemo de la popolo de tiu ĉi lando”,

kaj la sovetunia reviziismo jam havas rajton alpreni militajn agojn al tiu membro de la “komuneco”. Ankaŭ alia ĉefo de la sovetunia reviziisma renegata kliko kriegis, ke la “disvolviĝo de historio” starigis la taskon transformi “nacion diktaturon” en “internacian diktaturon”. La sovetunia reviziisma gazetaro foje refoje energie distrumpetas, ke nun la “defendo” de la “komuneco” “ekhavis pli profundan internacian karakteron” kaj la defendo de la membroj de la “komuneco” estas “garantiata per kuna penado de la komuneco”, ktp. ktp.

Elmetante ĉi tiun teorion de “internacia diktaturo”, la sovetunia reviziismo celas unue pravigi siajn nudajn agresajn agojn de social-imperiismo kaj due fabriki “teorian” fundamenton por sia nesatigebla ekspansia ambicio. Ni devas ĝin senmaskigi kaj ekspozi ĝian ferocan fizionomion de social-imperiismo sub plena taglumo.

energie distrumpetas la teorion de “limigita suverenecon”. Ĝi celas ne nur plie atenci la suverenecon de la aliaj landoj kaj pli arogante antaŭenpuŝi koloniismajn politikojn en sia “komuneco”, sed ankaŭ ekspansiigi sian “suverenecon” ekster la “komuneco”. Lastatempe, ĝia armita invado al nia sankta teritorio Ĝenbaŭ-insulo estas plena malkovriĝo de tia aroganta agresiva ambicio de ĝi.

Prezidanto Maŭ instruis al ni: “**Kiam ni diras, ke ‘imperiismo estas feroca’, tio signifas, ke ĝia naturo estas neŝanĝebla, la imperiistoj neniam volos formeti siajn buĉistajn tranĉilojn, kaj ili neniam fariĝos budhoj antaŭ sia pereco.**” En la Granda Proletara Kultura Revolucio, ni malkaŝis ilian lakeon—la renegaton, internan spionon kaj laborist-perfidulon Liu Ŝaŭki—kaj rompintis ilian songon ŝanĝi Ĉinion en ilian kolonion per “pacaj” rimedoj.

Ili do intensigas sian militan aventuron kiel persekutata hundo provanta transsalti muron. Kontraŭ la usona imperiismo kaj la social-imperiismo de la sovetunia reviziismo, kiuj havas la naturon de lupoj, ni nepre devas teni altan revolucion singardemon. Ni sekvos la instruon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ **“Sinprepari kontraŭ milito, sinprepari kontraŭ naturaj katastrofoj kaj fari ĉion por la popolo”**, levos en la forta orienta vento de la 9-a Tutlanda Kongreso de la Partio novan altan tajdon de viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso, serioze resumos spertojn, rapide efektigos ĉiujn proletarajn politikojn de Prezidanto Maŭ, **tenos la revolucion, stimulos la produkton**, estos ĉiam pretaj por venki ĉiujn invadantojn, kiuj kuraĝus nin ataki, kaj defendos nian sanktan teritorion kaj suverenecon per niaj vivoj.

La sovetunia reviziisma renegata kliko brue parolas pri “nacia diktaturo” kaj “internacia diktaturo”. Ni volas demandi: kiu klaso praktikas la “diktaturon”, priparolatan de vi, kaj super kiu klaso?

La granda instruanto Prezidanto Maŭ montris: **“Protekti aŭ subpremi la vastajn popolamasojn—jen estas la baza diferenco inter la Komunista Partio kaj Kuomintango, inter la proletaro kaj la burĝaro, inter la diktaturo de la proletaro kaj la diktaturo de la burĝaro.”** La sovetunia reviziisma renegata kliko starigis en sia lando faŝisman reakcian regadon, ellaboris diversspecajn kontraŭrevoluciajn “leĝojn” kaj “regulojn”, senigis la laborantan popolon je demokratiaj rajtoj, praktikas sangan subpremadon, kaj tiel dronigis la vastan sovetunian laborantan popolon denove en mizeran abismon. Tio plene pruvas, ke la “diktaturo” praktikata de la sovetunia reviziisma renegata kliko en sia lando estas centprocenta burĝara diktaturo.

Ekstera politiko estas daŭrigo de interna politiko. Predikante la tiel nomatan transformadon de “nacia diktaturo” en “internacian diktaturon”, la sovetunia reviziismo celas disvastigi al eksterlando sian kontraŭrevolucian burĝaran diktaturon praktikatan en la propra lando kaj praktiki per rabaj kaj agresaj rimedoj kontraŭrevolucian “diktaturon” super la popoloj de aliaj landoj. Utiligante la “Konsilantaron de Ekonomia Interhelpo”, la sovetunia reviziisma renegata kliko antaŭenpuŝas siajn social-imperiismajn politikojn en kelkaj orienteŭropaj landoj kaj la Mongola Popola Respubliko, kruele ekspluatas kaj preme prirabas la popolojn de tiuj landoj, kaj arbitre tretas la suverenecon de tiuj landoj por turni ilin en siajn dependajn landojn kaj koloniojn. La “specialigo de produkto” kaj “internacia divido de laboro” distrumpetataj kaj antaŭenpuŝataj de la sovetunia reviziismo jam kondukis la ekonomion de tiuj orienteŭropaj landoj al kripla disvolviĝo, tiel ke la lastaj fariĝis fabrikoj de la sovetunia reviziismo por prilabori krudajn materialojn kaj merkatoj de sovetuniaj varoj; krome ĝi faras kruelan rabadon kaj kaptas al si terure grandajn profitojn pere de “kreditodono”. La rabado kaj ekspluatado fare de la sovetunia reviziisma renegata kliko renkontas ĉiam pli kreskantan reziston de la vastaj popolamasoj de tiuj landoj. Por subpremi tiujn popolojn, la sovetunia reviziismo ekspedis trupojn en nombro de centoj da miloj kaj faris armitan agreson kaj militan okupadon al Ĉeĥoslovakio. Prirabado, agresado, subpremadon al alilandaj popoloj kaj eĉ milita okupado—

jen estas la reakcia esenco de la tiel nomata teorio de “internacia diktaturo” de la sovetunia reviziismo.

Hodiaŭ, la sovetunia reviziisma renegata kliko povas ekspedi siajn trupojn en Ĉeĥoslovakion kaj praktiki “internacian diktaturon” super la ĉeĥoslovaka popolo sub la preteksto de “defendo de la socialismaj fruktoj”; morgaŭ, sub preteksto de “defendo” de io alia, ĝi povos ekspedi agresajn trupojn en aliajn t.n. “fratajn landojn” en la t.n. “socialisma komuneco” aŭ en aliajn landojn ekster ĝi por atenci la teritorion kaj suverenecon de tiuj landoj. Fabrikante tiun ĉi teorion de “internacia diktaturo”, teorion por faŝisma agresado, la sovetunia reviziisma renegata kliko havas en si ekstreme kriman celon.

La granda gvidanto Prezidanto Maŭ montris: **“Kvankam la registaroj de la imperiismaj landoj sin okupas pri kontraŭrevoluciaj aktivadoj ĉiutage, tamen ili neniam diras la veron en siaj paroloj kaj oficialaj dokumentoj, kiujn ili ĉiam plenigas aŭ almenaŭ spicas per deklaroj pri humaneco, justeco kaj virto.”** En tio ankaŭ la sovetunia reviziisma social-imperiismo ne estas escepto. Por trompi la publikon, la sovetunia reviziisma renegata kliko ŝmiris la t. n. teorion de “internacia diktaturo”, “teorion” centprocente faŝisman, per farbo de “internaciismo”. Tamen, la kontraŭrevoluciaj agadoj, kiujn ili entreprenas, pruvas, ke ili komplete perfidis la proletaran internacismon. Sub la slogano de “internacia diktaturo” vidiĝas malbela, feroce kontraŭrevolucia vizaĝo de agresanto.

Distrumpetante la t. n. teorion de “internacia diktaturo” la sovetunia reviziismo celas sen-skrupule efektiviĝi la ambicion de koluzio inter Usono kaj Sovetunio por redividi la mondon kaj kontentigi ankaŭ siajn bezonojn por komploti kaj samtempe konkuri kun la usona imperiismo. Tiu ĉi “teorio” povas, unuflanke, servi al la agresado farata de la usona imperiismo por laŭleĝigi ĝian militan okupadon, kaj, aliflanke, ankaŭ esti uzata de la sovetunia reviziismo por ĉasi influferojn konkure kun la usona imperiismo kaj laŭvole meti iun landon en la sferon de sia “internacia diktaturo”. La usona imperiismo subtenas la sovetunian reviziismon efektiviĝi “internacian diktaturon” en sia propra influfero, kaj la sovetunia reviziismo siavice ankaŭ subtenas la usonan imperiismon agresi aliajn landojn sub la senhonta mensogo de “defendo de la libera mondo”. Tio ĉi estas la malpura negoco inter la du kompanioj.

Tiu teorio de “internacia diktaturo” havas nenian

diferencon en komparo kun la agresa argumento de faŝismo. La germana faŝisma kliko iam levis la ĉifonan flagon de starigo de "nova ordo de Eŭropo" kaj freneze agredis aliajn landojn. Ankaŭ la japanaj rabistoj kriaĉis pri starigo de "kun-prospira sfero de la granda Orienta Azio", kiam ili agredis Ĉinion kaj diversajn aliajn landojn de sudorienta Azio. Post la Dua Mondmilito, ankaŭ la usona imperiismo distrumpetis starigon de la "internacia registaro". Ĉu ĉiuj ĉi tiuj ne estas precize samaj kun la teorio de "internacia diktaturo" de la sovetunia reviziismo? La sovetuniaj reviziismaj social-imperiistoj kaj ĉiuj imperiistoj kaj faŝistoj estas ŝakaloj el la sama nesto, kaj ankaŭ iliaj "teorioj" estas ringoj de la sama ĉeno.

La renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki estas lakeo de la usona imperiismo, sovetunia reviziismo kaj diverslandaj reakciularoj. Li freneze antaŭenpuŝis la kontraŭ-revolucian reviziisman linion, vane provante restaŭri kapitalismon en Ĉinio kaj efektiviĝi la lupan ambicion de la usona imperiismo kaj la sovetunia reviziismo renversi la socialisman Ĉinion. La Granda Proletara Kultura Revolucio forbalais Liu Ŝaŭki kaj lian bandon, tiel ke komplete bankrotis ilia intrigo. Kvazaŭ persekutata hundo provas transsalti muron, la sovetunia reviziisma renegata kliko senkaŝe faris lastatempe armitajn provokojn kontraŭ nia lando, invadis nian teritorion Ĝenbaŭ-insulo per armitaj fortoj, kaj ricevis meritatan punon. La sovetunia reviziisma renegata kliko krimis ne nur kontraŭ la ĉina popolo, sed ankaŭ kontraŭ la sovetunia popolo. Inter la popoloj de Ĉinio kaj Sovetunio estas profunda revolucia amikeco. Ni kredas, ke la vasta proletaro kaj la laboranta popolo de Sovetunio certe leviĝos kaj renversos la faŝisman regadon de la plenmano da sovetuniaj reviziismaj renegatoj kaj detranĉos iliajn agresajn ungegojn. Ĝuste kiel la granda gvidanto Prezidanto Maŭ montris, **"Sovetunio estas la unua socialisma ŝtato, kaj la Komunista Partio de Sovetunio estas partio kreita de Lenin. Kvankam la gvidanteco de la Partio kaj ŝtato de Sovetunio estas nun uzurpita de reviziistoj, tamen mi konsilas kamaradojn firme kredi, ke la vastaj amasoj de popolanoj, partiaj membroj kaj kadroj de Sovetunio estas bonaj kaj deziras revolucion, kaj ke la regado de reviziismo ne longe daŭros."**

La revoluciaj popoloj de la tuta mondo unuiĝu kaj komplete enterigu imperiismon, reviziismon kaj reakciularojn. **Forbalau ĉiujn malutilajn insektojn, nia forto estas senrivala!**

ĈINIO SUKCESIS ELFARI ANTIBIOTIKON DE UNIKA KURACEFIKO

En la ĝojplenaj tagoj de festado de la Naŭa Kongreso, nia lando sukcese elfaris antibiotikon de unika kuracefiko nomata ĝentamicino. Tiu ĉi speco de antibiotiko estas kune elfarita de 36 unuoj inkluzive de la Esploro de Mikroboj de la Instituto de Subtropikaj Kreskaĵoj de Orienta Ĉinio de la Ĉina Akademio de Sciencoj, la Kvara Medikamenta Fabriko de Ŝanhajo, la Medikamenta Fabriko de Siĉuan, la Siĉuan-a Instituto de Antibiotika Industrio, la Ĝenerala Hospitalo de la Fuĝoŭ-a Milita Regiono kaj la Siĉuan-a Medicina Kolegio, sub la brilo de la ĉiamvenka Maŭzedongpenso, kaj jam komenciĝis pogranda produktado de ĝi.

La naskiĝo de ĝentamicino en nia lando ŝtopis breĉon en la antibiotika industrio de nia lando; ĝi signifas, ke la antibiotika industrio de nia lando jam antaŭensaltegis al tute nova nivelo per pli granda rapideco kaj kun pli alta kvalito, kaj donis pli fortan frakan baton al la monopoligo kaj blokado pri diversaj gravaj antibiotikoj fare de la kapitalisma mondo kun la usona imperiismo ĉe la kapo.

Tiu ĉi speco de antibiotiko havas tre bonan kuracefikon kontraŭ infektaj malsanoj bakteriaj kaj diversaj malsanoj kaŭzitaj de bakterioj, kiuj povas elteni ordinarajn antibiotikojn, kiaj brulumoj de la spira sistemo, infektaj malsanoj de urina dukto, meningito, septicemo k. a. Kaj ĝi efikas aparte bone kontraŭ infekta malsano kaŭzita de piocianina bacilo (*bacillus pyocyaneus*). Nun nur malmultaj landoj en la mondo povas produkti tian medikamenton.

Ĉu en eksperimentado, produkta procedo aŭ en klinika provado ĝentamicino havas rimarkindan superecon. Ĝia dozo estas malpli granda, ĝia kuracefiko estas alta, ĝia malbona reakcio estas malgranda, ĝia produktokosto estas malalta kaj ĝia produkta procedo estas relative simpla.


Dokumenta Filmo "Kontraŭĉinaj Perfortaĵoj de la Novaj Caroĵ"

LA granda dokumenta filmo *Kontraŭĉinaj Perfortaĵoj de la Novaj Caroĵ* produktita de la Centra Studio de Novaĵaj kaj Dokumentaj Filmoj estas nun projekciata en diversaj lokoj de nia lando.

Per multe da nerefuteblaj faktoj la filmo ne nur malkovris la diablan vizaĝon de la sovetunia reviziisma renegata kliko, kiu heredis la robon de la carrusa imperiismo kaj antaŭenpuŝas agresan politikon de social-imperiismo, sed ankaŭ plene montras la feran volon de niaj armeo kaj popolo, kiuj estas armitaj per Maŭzedongpenso, harditaj en la Granda Proletara Kultura Revolucio kaj pretaj defendi la sanktan teritorion de la patrolando per sia vivo.

La riveroj Vusuli kaj Hejlong estis internaj riveroj de Ĉinio ĝis 1860. La carrusa imperiismo

perforte okupis niajn teritoriojn norde de Hejlong-rivero kaj oriente de Vusuli-rivero kun totala areo de pli ol miliono da kvadrataj kilometroj per altrudo de neegalaj traktatoj, nome la "Ĉina-Rusa Traktato de Ajgun" kaj "Ĉina-Rusa Traktato de Pekino". Nur tiel la riveroj Vusuli kaj Hejlong fariĝis landlimaj riveroj inter Ĉinio kaj Sovetunio. La menciitaj teritorioj, kiujn la cara Rusio forprenis de Ĉinio, egalas al kvin blankrusioj de Sovetunio aŭ dek Giangsu-provincoj de nia lando. La filmo citis la vortojn de Marks, Engels kaj Lenin, per kiuj ili kondamnis la agreŝajn krimojn de la cara Rusio kontraŭ Ĉinio, kaj la proletaran politikon proklamitan de la Soveta Registaro gvidata de Lenin en la 27-a de septembro 1920: "Senvalidigi ĉiujn traktatojn kontraktitajn de ĉiuj antaŭaj rusaj registaroj kun Ĉinio, rezigni la tutan kaptitan ĉinan teritorion kaj ĉiujn rusajn



koncesiojn en Ĉinio kaj redoni al Ĉinio senpage kaj por ĉiam ĉion, kion la cara registaro kaj la rusa burĝaro kruele rabis de ĝi.”

La filmo montras krome, ke kvankam inter Ĉinio kaj Sovetunio ekzistas landlimaj problemoj postlasitaj de la historio, sed nenia incidento okazis ĉe la landlimoj, kiam Sovetunio estis socialisma lando. La popoloj de Ĉinio kaj Sovetunio ligiĝis per profunda revolucia amikeco dum longa revolucia batalo, kaj sur la ekrano aperas kortuŝaj bildoj pri amikaj interrilatoj de la du popoloj sur la riveroj Vusuli kaj Hejlong.

Nia registaro ĉiam insistas ke oni solvu la landlimajn problemojn postlasitajn de la historio per intertraktado kaj tenu senŝanĝe la ekzistantan staton ĉe la landlimoj antaŭ ilia solviĝo. Sed, kiam la sovetunia reviziisma renegata kliko uzurpis la partian kaj ŝtatan gvidon de Sovetunio, ĝi restaŭras interne kapitalismon plenumplekse kaj internacie alianciĝas kun Usono por oponi kontraŭ Ĉinio. Ĝi ne nur detruis la prilandliman intertraktadon inter Ĉinio kaj Sovetunio en la jaro 1964, sed ankaŭ senĉese rompis la ekzistantan staton de la landlimoj inter Ĉinio kaj Sovetunio kaj fabrikis landlimajn incidentojn. La filmo prezentas la mapon, kiun la sovetunia reviziismo donis al la ĉina flanko dum la intertraktado pri landlimaj problemoj inter Ĉinio kaj Sovetunio en la jaro 1964. En tiu mapo, la sovetunia reviziismo ŝanĝis la landliman linion tute arbitre, enstrekante en sian teritorion pli ol 600 insulojn

el la pli ol 700 insuloj, kiuj dise situas ĉe la ĉina flanko de la centra linio de ĉefa naviga vojo de la riveroj Vusuli kaj Hejlong. Tiuj faktoj plene malkovris la rabemon de la sovetunia reviziisma renegata kliko, kiu intencas pli vaste okupi ĉinan teritorion.

En tiu filmo estas multaj scenoj prenitaj ĉeloke dum la okazo de la aferoj, montrantaj la furiozajn kontraŭĉinajn krimojn de la sovetunia reviziismo sur la riveroj Vusuli kaj Hejlong. La sovetuniaj reviziistoj elsendis kanonboatojn kaj motorboatojn, kaj tiuj provoke kuregis tien kaj reen inter ĉinaj fiŝboatoj kvazaŭ rabiaj hundoj; ili eĉ atakis niajn fiŝistojn sur fiŝboatoj per altpremaj akvoŝprucigiloj, batis niajn amasojn per remiloj kaj hokstangoj, forrabis niajn fiŝretojn kaj fiŝboaton, kaj kontraŭleĝe forkaptis niajn fiŝistojn; ili eĉ ekspedis plene armitan trupon por entrudiĝi en nian teritorion, la insulon Hejhiazi, multfoje invadis nian teritorion, la insulojn Vubalaŭ kaj Kilikin, por malhelpi kaj detruigi la produktajn laborojn de niaj landlimaj loĝantoj, freneze puŝis en Hejlong-riveron niajn popolanojn, kiuj sinokupis pri produktaj laboroj. Krome, kirasaŭtoj de ili senditaj premmortigis kaj puŝmortigis niajn fiŝistojn, kiuj havis nenian armilon en la manoj. Ĉio ĉi tio plene malkovris la diablan vizaĝon de la sovetunia reviziisma renegata kliko!



La filmo prezentis la heroecon de niaj fiŝistoj, kiuj ne timas perfortulojn nek sinoferojn. Por rebati la faŝismajn kaj rabistajn agojn de la novaj

(De maldekstre dekstren)

La 28-an de decembro 1967, la perfortuloj de la sovetunia armeo post sia invado en nian areon de Hinkajgiahingzi-insulo, kiu situas ĉe nia flanko en Vusuli-rivero, senbride batis niajn fiŝistojn per dikaj bastonoj kaj tiel mortigis kaj vundis tri el ili.

Sub plena taglumo, la sovetunia armeo elsendis kanonboatojn kaj fajrestingajn boatojn por ataki niajn fiŝistojn fiŝantajn sur Vusuli-rivero per altpremaj akvoŝprucigiloj.

Sub la komandado de oficiroj kun kolonela rango (alte sur la bordo) kaj leŭtenanta rango (meze sur la bordo), plene armitaj sovetuniaj armeanoj depuŝis niajn boatetojn kaj kruele batis per bastonoj kaj puŝis en la riveron la loĝantojn de nia Vubalaŭ-insulo, kiu situas en nia flanko de la centra linio de la ĉefa navigvojo de Hejlongo-rivero.



caroj, ili kuraĝe sturmis al sovetunia kanonboato per sia ligna boato kaj dehakis la bekon de la ŝprucigilo de la novaj caroj, manifestante la heroismon de nia popolo, kiu kuraĝas **“faligi ĉiujn malamikojn kaj neniam estos subigita de malamikoj”**.

La filmo montras ankaŭ la insulon Ĝenbaŭ, kiu de ĉiam estas parto de la teritorio de nia granda socialisma patrolando. Tie niaj fiŝistoj laboras kaj produktas de generacio al generacio kaj nia limgarda trupo patroladas regule. Dum la glaciaj sezonoj de la pli ol du jaroj, de la 23-a de januaro, 1967 ĝis la 2-a de marto, 1969, la sovetunia reviziismo 16 fojojn invadis la areon de nia Ĝenbaŭ-insulo. La filmo malkaŝis la krimojn de la sovetunia reviziismo, kiu en tre mallonga tempo de du monatoj, nome januaro kaj februaro, 1969, 8 fojojn invadis armite la areon de nia Ĝenbaŭ-insulo. La filmo ankaŭ malkaŝis la kondamnindajn krimojn, ke en la 2-a de marto, 1969, por sin liberigi el internaj kaj eksteraj embarasoj, la sovetunia reviziisma renegata kliko sendis siajn trupojn senkrupule invadi la areon de Ĝenbaŭ-insulo kaj surprizataki niajn limgardajn batalantojn, kiuj

estis plenumantaj tie patrolan taskon, kaj per tio fabrikis ekstreme seriozan sangan incidenton.

Nia limgarda trupo ne povis plu toleri, devigite faris rebaton por sin defendi, donis indan punon al la agresantaj provokantoj kaj venke defendis la sanktan teritorion de la granda socialisma patrolando. La filmo vive montris la komunan indignon kaj kondamnon de niaj centmilione nombraj popolo kaj armeo kontraŭ la agresaj krimoj de la sovetunia reviziismo per senprecedence grandaj manifestacioj kaj protestaj agadoj. Ili severe avertis la sovetunian reviziisman renegatan klikon: La sankta teritorio de Ĉinio toleras nenies agreson kaj ĉiu herbo aŭ arbo de Ĉinio toleras tretadon de neniu ajn agresanto! Se la sovetunia reviziismo ankoraŭ kuraĝus agresi nin, la 700-miliona ĉina popolo, armita per Maŭzedongpenso kaj hardita en la Granda Proletara Kultura Revolucio, nepre agos laŭ la instruo de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ: **“Se neniu atakos nin, ni atakos neniun; se iu atakos nin, ni certe kontraŭatakos lin”**, kaj **“ekstermos firme, ĝisfunde, tute kaj komplete”** la agresantojn, kiuj kuraĝus invadi nian landon!

“Se neniu atakos nin, ni atakos neniun; se iu atakos nin, ni certe kontraŭatakos lin.” Tiu tanko de sovetunia armeo, kiu invadis nian Ĝenbaŭ-insulon kaj faris armitan provokon en la 15-a de marto, fariĝis rubo sub la rebato de nia limgarda trupo.





Revolucia Moderna Pekina Opero

Ruĝa Signal-lanterno

Kolektive adaptita de la Ĉina Pekinopera Trupo

SCENO 8

LUKTO ĈE LA EKZEKUTEJO

Nokto.

La sidejo de la japanaj ĝendarmoj. Angulo de la karcerio.

Kiam la kurteno leviĝas, envenas Hatojama, Hoŭ Hianpu kaj la kaporalo.

Hatojama: Evidente, ni nenion povas akiri per publika esplordemando. Kiel estas la subaŭskultilo?

Hoŭ: Jam instalita.

Hatojama: Ni aŭskultu kion ili diros, kiam la patrino kaj filo renkontiĝos. Eble ni povos ion akiri.

Hoŭ kaj la kaporalo kapjesas.

Hatojama: Alportu la maljunulinaĉon!

Hoŭ: Jes! (*Foriras.*)

Hoŭ eneskortas la avinon.

Hoŭ: Iru!

Hatojama: Ĉu vi konas ĉi lokon, maljuna sinjorino?

Avino: La sidejo de ĝendarmoj!

Hatojama (montrante): Kaj tie?

Avino: (*Ekrigardas en la direkton*)

Hatojama (kun minaca rido): Tie estas paradiza pordo, tra kiu via filo baldaŭ leviĝos al la ĉielo.

Avino (ekskuiĝas). . . .

Hatojama: Se iu faris krimon, avino, kaj lia patrino rifuzas savi lian vivon, dum ŝi tion povas, ĉu tia patrino ne estas tro kruela?

Avino: Kian absurdaĵon vi diris, sinjoro Hatojama. Vi arestis mian filon pro nenio, ĵetis lin en karceron, kaj vi volas mortigi lin. Estas vi kiuj faris krimon, estas vi kiuj estas kruelaj. Ĉu mi maljunulino devas respondeci pri via hommortigo?

Hatojama: Vi pensu, maljunulino, kio venos pro tia parolo?

Avino: La vivoj de nia familio estas ja en viaj

manoj. Vi povas fari kion vi volas.

Hatojama (sindetemente): Bone, iru vidi vian filon! (*La avino ekpaŝas.*) Haltu, avino, tio ĉi estas la lasta ŝanco. Mi deziras al via familio pacon kaj reunuiĝon.

Hoŭ sekvas la avinon for.

Hatojama: Portu Li Juhe al la ekzekutejo!

Kaporalo: Alportu Li Juhe.

La sceno ŝanĝiĝas. Parto de sekreta ekzekutejo. Maldekstre estas vojo al la karcerio. Meze estas ŝtona benko. Malantaŭe en la maldekstra flanko estas deklivo kondukanta al la ekzekutejo, kaj pli malantaŭe estas alta muro kun pikildrata barilo. Estas malhele. Tintas feraj ĉenoj.

Li (Post la kuliso):

Je hurla voko de l' gardisto mi elpaŝas el la ĉelo.

Envenas Li Juhe. Sekvas du japanaj ĝendarmoj, kiuj puŝas Li Juhe. Li rigardas ilin kun fiero kaj malestimo. La du japanaj ĝendarmoj foriras.

*Kvankam mi estas en katen' kaj ĉen' el fero
Kaj miaj manoj kaj piedoj estas sen libero,
Sed neligeblas mia brava volo alta ĝis ĉielo.
Bandito Hatojama,*

*Por gajni l' ĉifrolibron, turmentadis min per
ĉia torturilo,*

Sed post la ostoromp' kaj karnoŝiro

Ankoraŭ pli firmiĝis mia vol' de viro.

*Irante al l' ekzekutej' kun brust' elstarigita,
Mi ekrigardas foren kaj ekvidas:*

Revoluciaj ruĝaj flagoj alte flirtas,

Kaj la kontraŭjapana militfajro ĉie disvastiĝas.

*Japanaj diabloj! Kiom da tagoj ankoraŭ povos
daŭri via tiranado!*

Cent floroj pompos post forpas' de l' fulmotondro.

*Kaj kvazaŭ la matena sun', Ĉinio nova brilos
tra la tuta mondo.*

*Kaj tiam, ruĝaj flagoj flirtos ĉie tra la lando.
Ĉe pens' pri tio, kreskas mia fid' kaj plifirmiĝas
mia batalvolo.*

*Mi kontribuis tre malmulte al mia Partio en
laboro,*

*La plej bruliga zorgo por mi estas, ke la ĉifrolibro
ne atingis la Nordan Monton.*

*Vang Lian-gju kontaktadis nur kun mi en solo,
Do, li perfidi aliulojn ja ne povos.*

*Miaj patrino kaj filino, same kiel mi mem, estas
homoj de fidelo,*

*Bandito Hatojama, serĉu tra la tero kaj l' ĉielo,
La ĉifrolibron tamen vi neniam trovos.*

La avino envenas kaj ĉirkaŭrigardas.

Avino (subite trovas Li kaj krias): Juhe!

Li (surpriziĝas): Panjo!

La avino sinĵetas al li kaj lin brakumas.

Avino: *En palpebrum', post deksep jaroj reaperas
antaŭ mi*

*Malnova scen'! Ekflamas la malam' de l'
klas' kaj de l' naci'.*

*La, la ... japan-banditoj tiel intrigemaj kaj
kruelaj*

*Vin batis ĝis vundiĝ' tutkorpa... ho ve, filo,
kara fil'!*

Li: Ne ĉagreniĝu, panjo!

Avino: *Mi ja ne ĉagreniĝas, ĉar mi havas tiel
bonan filon, kia vi!*

Li: *Mi estas, panjo, nefleksebla ŝtala homo,
Kaj luktas malcedeme kontraŭ la japan-demonoj.*

*Nenion mi ja timas, nek ostrompon nek ŝirvundon,
Kaj en karcer' mi pretas sidtruigi ĝian fundon.*

*Doloras mia kor', ĉar sangas la patrio.
Sen libereco ja ne rekuniĝos nia familio.*

*Kiel ajn danĝerplenas vojo la revolucia,
Antaŭen sturmos ni mortspite unuj post aliaj.*

*Eĉ se mi mortos mi bedaŭros pro nenio,
Escepte de l' nepago de la ŝuldo nia.*

*Kiel mi volas aĝle flugi en l' aero,
Kaj tuj alveni al la monto,*

*Por savi la popolon vastan el sufero!
Por la revolucio mi volonte vivoferos!*

Avino: *La ŝuldo restu provizore en la Pac-hotelo,
Mi nepre ĝin repagos spite al mil malfaciloj.*

Hoŭ Hianpu haste envenas kune kun japanaj ĝendarmoj.

Hoŭ: Parolu, parolu jam! Ho, vere malhastemaj vi estas! Bone! Iru kun mi, maljunulinaĉo, sinjoro Hatojama volas paroli kun vi.

Li: Panjo! ...

Avino: Ne maltrankviliĝu. Mi scias kion li volas diri. (Ŝi foriras kun levita kapo.)

Ŝin sekvas la japanaj ĝendarmoj.

Hoŭ: Alportu Li Tiemej!

Li (krias al la kuliso): **Tiemej!**

Tiemej enkuras kaj sinĵetas al Li.

Tiemej: Paĉjo! ...

Li: Tiemej!

Tiemej: Paĉjo!

*Sopiras mi tagnokte vidi paĉjon mian,
Ho, vin... sangmakulitan kaj vundplenan,*

*Mi jam apenaŭ konas la vizaĝon vian,
Mi volas rompi l' feran ĉenon.*

Li (Kun rideto): Jen stulta knabino.

Tiemej: *Ho... mia paĉjo ... (ŝi plorsingultas) Se
vi havas ion por diri al mi, paĉjo, diru tuj.*

Li: Infano!

*Jam dek sep jarojn mi sekreton kaŝi de vi penis,
Eldiri ĝin mi foj-refoje min detenis.*

Mi...

Tiemej (haste lin interrompas kaj krias): *Ne diru
plu, vi ja estas mia propra patro! ...*

*Mi ne bezonas, paĉjo, vian prirakonton,
La deksep-jara flu' amara konas jam la fonton.*

*Ja bonan homon kia paĉjo l' mond' bezonas;
Anstataŭ vi volonte mi la vivon donos!*

*Ho, mia kara paĉjo! ... (ŝi ĉirkaŭprenas Li
Juhe surgenuiĝinte kaj ploras.)*

Li: *Venĝemon tenu en la fundo de la koro.
"Plej karas sangparenco," diras la popolo;*

*Mi tamen opinias, ke klasamo estas pli valora
ol trezoro.*

Tiemej,

Vi scias ja, ke paĉjo estas malriĉul'.

*La tuta posedaĵo mia estas nur
Lanterno ruĝa, kiun mi kunportis ĉiam.*

Nun ĝin akceptu, gardu, perdu ĝin neniam.

Tiemej: *Ja paĉjo heredigis al mi netakseblan
lum-trezoron,*

*Do kial pri malriĉo faris vi parolon?
Ĉar noblajn virtojn paĉjo al mi heredigis,*

*Mi ĉiam staros firme kiel rok' solida;
Ĉar altan saĝon paĉjo al mi heredigis,*

*Neniam ja trompiĝos mi klarvida;
Ĉar sentimecon paĉjo al mi heredigis,*

*Kuraĝas mi batali kontraŭ tigroj kaj ŝakaloj,
Kaj la lanterno ruĝa ĉiam brilos en la famili',*

*Por la riĉaĵon porti ne sufiĉas eĉ mil ĉaroj,
— kaj ne sufiĉas, mia paĉjo, eĉ mil vagonaroj!*

Mi bone konservados ĝin ĉe mi.

Li: *Jangzi-river' senĉese ondas kaj torentas,
Jen heredanto de l' lanterno nia sin prezentas.*

Tiemej!

*Se vi bonŝance al la hejm' reiros,
Vin turnu al parencoj por vivten' kaj ŝuldopag'
kaj tiam mi trankvilos.*

Envenas Hoŭ Hianpu.

Hoŭ (al Tiemej): Nu, knabino, kredeble vi jam bone interkonsiliĝis? Do rapide donu al ni la ĉifrolibron!

Tiemej lin ignoras.

Hoŭ: Parolu!

Tiemej: Ĉion direndan miaj patro kaj avino jam diris! Nenion mi havas por diri!

Hoŭ: Ha! Ankaŭ vi etulinaĉo estas tiel obstina. Bone do, ni donu al vi ekzemplon. Venu! Alportu la maljunulinaĉon!

La du japanaj ĝendarmoj enpuŝas la avinon.

Hoŭ: Nun via tuta familio estas ĉi tie. Bone interkonsiliĝu. Se vi ne donos al ni la ĉifrolibron, neniun el vi povos eliri viva! Ĉu vi aŭdis? Do atendu. (*Li foriras.*)

Li (*kune kun Tiemej subapogas la avinon sidiĝi sur la ŝtona benko*): Suferojn vi ricevis, panjo. Tiuj bestoj!

Avino: Ne gravas ke nia korpo iom doloras, ja mia koro estas en trankvilo.

Tiemej ploras kun sia kapo sur la genuoj de la avino. Envenas la kaporalo, kaj Tiemej levas sian kapon.

Kaporalo: Estro Hatojama donas al vi la plej lastajn kvin minutojn por pripensi. Se vi ankoraŭ ne donos la ĉifrolibron, vi ĉiuj estos pafmortigitaj!

Avino (*kun indigno*): Vi bestaĉoj, eĉ infanon vi ne volas preterlasi.

Kaporalo: Neniun ni restigos.

Li Juhe kaj la avino fiksrigardas Tiemej, kaj tiu ĉi ekrigardas ilin kaj alprenas bravan sidmanieron kun levita kapo.

Kaporalo (*altiras Tiemej*): Nur lastaj kvin minutoj restas, knabino! Se vi donos la ĉifrolibron, via tuta familio povos resti viva! Ĉu vi komprenas? Diru tuj!

Tiemej liberigas sian brakon per eksvingo kaj revenas inter la patron kaj avinon.

Kaporalo: La ĉifrolibron!

Tiemej: Mi ne scias!

Kaporalo: Ĉiujn mortpafu!

Li: Ne tiom arogantu, ne! Tio ĉi estas...

Avino: Prave, filo, ni tri generacioj iru kune!

Li: Tiemej, tenu la avinon kaj iru kune!

Tiemej: Jes!

Eksonas la Internacio. La tri homoj iras paŝon post paŝo al la altejo kun forta malestimo. Tiam envenas Hatojama.

Hatojama: Atendu! Mi volas doni al vi ĉiun eblan ŝancon. Vi povas havi alian minuton por pripensi!

Li: Hatojama! Neniun ekstermeblajn estas la ĉina popolo kaj la ĉinaj komunistoj. Mi konsilas al vi pensi pri tio.



Hatojama (*mallaŭte kaj senkuraĝe*): Ho, kiel terure! Faru laŭplane! (*Li foriras.*)

Kaporalo: Mortpafu ilin!

En grandioza muziko, la ruĝa lumo akompanas la tri eliri. Ilin sekvas la japanaj ĝendarmoj. La kaporalo foriras en alia direkto. — Ĉesas la muziko.

Li (*krias interne*): For la japanan imperiismon! Vivu la Komunista Partio de Ĉinio!

Sonas du pafoj. La du japanaj ĝendarmoj revenas kuntrenante Tiemej, kaj ŝin puŝas surteren.

Tiemej (*en konfuziĝo stariĝas de sur la tero kaj krias returne*): Paĉjo! Avino!

Envenas Hatojama en mallumo kaj lin sekvas Hoŭ Hianpu kaj la kaporalo.

Hatojama: Kie estas la ĉifrolibro, Li Tiemej? Donu ĝin al mi!

Kun malamo Tiemej indigne rigardas Hatojama.

Hatojama: Lasu ŝin foriri!

Hoŭ: Kio? Lasu ŝin foriri? (*Li rigardas al Hatojama en surprizo.*)

Hatojama: Lasu ŝin foriri.

Hoŭ: Jes. Foriru! For! For! (*Li puŝas Tiemej for, kaj ŝin sekvas la kaporalo kaj japanaj ĝendarmoj.*)

Kial vi liberigis ŝin, estro?

Hatojama: Kiel mi povus akiri la ĉifrolibron, se mi mortigus ilin ĉiujn?

Hoŭ: Ja vere.

Hatojama: Tio ĉi estas la t. n. taktiko uzi longan fadenon por kapti grandan fiŝon!

Iom post iom mallumiĝas.

— La kurteno falas.

是 革命的 队伍。 我們 这个 队伍
 shì gémíngde duìwǔ. Wǒmen zhègè duìwǔ
 estas revoluciaj trupoj. Niaj tiuj trupoj

毛 主席 語录
 Máo Zhǔxǐ Yǔlù

完全 是 为着 解放 人民的 是
 wánquán shì wèizhe jiěfàng rénmín de, shì
 ekskluzive estas por liberigi popolon estas

Maŭ Prezidanto Vortoj

彻底地 为 人民的 利益 工作的
 chèdǐde wèi rénmínde lìyì gōngzuò de.
 senrezerve por populaj interesoj labori.

我們的 共产党 和 共产党
 Wǒmen de Gòngchǎndǎng hé Gòngchǎndǎng
 Nia Komunista Partio kaj Komunista Partio

TRADUKO

Vortoj de Prezidanto Maŭ

所 領導的 八路軍、 新四軍
 suǒ lǐngdǎo de Bālùjūn, Xīnsìjūn
 gvidi Oka-voja Armeo (kaj) Nova Kvara Armeo

Nia Komunista Partio kaj la de ĝi gvidataj Oka-voja kaj Nova Kvara Armeoj estas revoluciaj trupoj. Niaj tiuj trupoj ekzistas ekskluzive por la liberigo de la popolo kaj laboras senrezerve por la interesoj de la popolo.



Brava Knabo

EN marto de 1942, la japanaj invadantoj sendis 30,000 soldatojn por “balai” regionon de Juanĉaŭmonto — la centron de la revolucia bazloko de Vangiang. En tiu tempo ankaŭ la kuomintanga reakciularo sendis unu regimenton el la Blanka Lago por fari surprizan atakon. Estis nokto. Silento regis en la montaro kaj sur la kampoj. Paf! paf! Klare eksonis du pafoj de proksime. Subite vekite el sia dormo, la vilaĝanoj tuj komencis pretigi sin por translokiĝi. Sed, ekster la fenestroj ĉie videblis lamplumoj — la vilaĝo jam estas sieĝita de la malamikoj. La vilaĝanoj estis pelitaj al la draŝejo antaŭ la vilaĝo. La regiment-estro de la kuomintanga bandita trupo, kiu nomiĝis Ĝou Hiong kaj havis barelan ventron, saltis sur grandan ŝtonan muelilon kaj laŭte kriis: “Mi informiĝis, ke iu komunista trupo venis en vian vilaĝon ĉirkaŭ la vespero. Kie ĝi estas nun? Rapide respondu!”

Neniu respondis. Silento regis a tutan ejon. La regiment-estro malice rikanis, saltis de sur la muelilo, sovaĝe eltiris 8-9-jaran infanon el la amaso, turnis sian pistolon tuŝe kontraŭ lia frunto kaj diris:

“Kien iris la komunista trupo? Respondu rapide! Nu? Alie mi pafmortigos vin.”

La infano rekte staris tie kaj restis silenta kunpremante siajn dentojn. La regiment-estro piedbatis la infanon kaj puŝis lin malproksimen. Poste li levis sian pistolon kontraŭ la infanon, kaj ĉiuj ekkriis timigite.

“Haltu!” kun la krio 12-13-jara knabo Hiaŭhongzi — sinpafis el la amaso antaŭ la regiment-estro kaj levis lian manradikon: forflugis la kuglo kun siblo super la kapo de la infano. Tiam Hiaŭhongzi laŭte kriis: “Estro, li estas mutulo! La komunistoj ĉiuj forkuris al Bahian-

monto. Mi gvidos vin por postkuri.” Tio konfuzis la regiment-estron. Fikse rigardinte la malhele ruĝan vizaĝon de Hiaŭhongzi por momento, subite li manfrapetis la ŝultron de Hiaŭhongzi kaj ekridis strige: “Brave, bona knabo! Montru al ni la vojon!” Tion dirinte, li faris mansignon kaj gvidis siajn soldatojn marŝi orienten al Bahianmonto post Hiaŭhongzi.

Uzante la artifikon “forlogi tigran de monto”, Hiaŭhongzi kondukis la malamikojn sur la monton. Ili grimpadis, grimpadis kaj baldaŭ atingos kavernon. Tiam li per subita salto sin ĵetis en la kavernon. En la kaverno serpentumis koridoro, kaj ĉe ties fino troviĝas elirejo. Ĉiloke Hiaŭhongzi paŝtis ŝafojn de sia infanaĝo kaj bone konis la vojon, tial li tre baldaŭ jam forglitis el la kaverno. Fronte al tiu surpriza akcidento la malamikoj tute ne havis tempon por reagi. Trovante

sin superruzitaj, ili rondiris en konfuzo sur la monto kaj elpensis neniun rimedon.

Dume, forlasinte la kavernon, Hiaŭhongzi palpis sian kruron vunditan pro falo, faris du saltojn kaj diris al si mem: "Mi ankoraŭ povas kuri per miaj kruroj!" Malgraŭ sia doloro li kuris laŭ la montvojetoj rekte orienten kaj samtempe pensis en si: Kiel bone estos, se mi renkontos la revenantajjn onklojn de la Okavoja Armeo! Tiam ili certe povos "kapti la testudojn falintajn en vazon".

Subite li levis sian kapon kaj vidis ekbrilon sur la montvojetoj malproksime. Poste li aŭdis malklare senordajn paŝojn. Hiaŭhongzi tuj konstatis, ke tio estas trupo en rapida marŝo. Tiu brava knabo tuj kuris renkonte al ĝi. Ĉe renkontiĝo eklumis elektra torĉo kaj en la lumo vidiĝis plastro-flago de Japanio. Hiaŭhongzi subkonscie faris enspiron kaj volis forkuri, sed tio jam ne eblis. Tamen, subite venis al li sprito ĉe ekfulmo de saĝo. "Hej, bone! Lasu la lupon ataku la sovaĝan hundon! Tute prave, tiel fariĝu!"

Puŝate kaj pelate Hiaŭhongzi estis kondukita al Iŝii, estro de la japana trupo. Li diris anhelante: "Granda moŝto, mi portis leteron de regiment-estro Ĝoŭ Hiong. Ki-

am mi transpasis Bahian-monton, mi renkontis tie multajn soldatojn de la Okavoja Armeo, kaj mi estis preskaŭ kaptita de ili. Mi vundiĝis dum forkuro kaj perdis la leteron. Bonvolu rapide iri kaj ataki ilin."

"Ha! Ĉu estas multaj soldatoj de la Okavoja Armeo? Ni mortigos ilin ĉiujn! Vi montru al ni la vojon kaj mi donos al vi grandan premion." La aroganta Iŝii ekŝvingis sian japanan sabron, kaj la japanaj diabloj ĉiuj rapidis al Bahian-monto kaj dense sieĝis ĝin.

Hele brilis la torĉoj sur la montpinto. Paf! Iŝii faris la unuan pafon sub la monto. Paf, paf, paf! Bum, bum, bum! Tondre ekmuĝis pafiloj kaj kanonoj. Batalkrioj laŭte sonis sub la monto. De profunda nokto la japanaj diablaj soldatoj faris sub la komando de Iŝii tri sturmojn al la montpinto, sed ĉiufoje ili estis repuŝitaj de la banditaĉoj de Kuomintango. En la fino, la sovaĝa Iŝii ŝire malbutonis sian flavan lanan uniformon, nudigis sian bruston, kaj sturmis la unua al la pinto de la monto, levante sian brilantan japanan sabron.

Tagiĝis, la ŝiritaj japanaj flagoj renkontiĝis sur la montpinto kun la taŭzitaĵoj de Kuomintango, kaj nur tiam la du flankoj konstatis, kia eraro okazis. Sed la fera Iŝii jam estis kuŝanta sur brankardo,

dum unu brako de la regiment-estro de la kuomintanga bandita trupo estis bandaĝita. Kiam ili volis venigi Hiaŭhongzi post konfuza kriaĉo, li jam malaperis sen spure. Rigardante la multajn kadavrojn sternitajn antaŭ ili, la du vunditaj bestoj konsterniĝis pro teruro kaj staris tie senmove kvaŭzaŭ du ŝtipoj.

Hiaŭhongzi jam forglitis returne kaj kuris rekte orienten. Kia hazardo! Li renkontis nun la onklojn de la Okavoja Armeo. Li raportis ĉion al la regiment-estro de la Okavoja Armeo kaj senbrue kondukis ilin ĉirkaŭire al la alta Jinping-monto.

Paf, paf, paf! Bum, bum, bum! Subite aŭdiĝis surdiga tondrado de kanonoj kaj fusiloj sur la pinto de la alta Jinping-monto kaj ekremis Bahian-monto sub la bombardado, antaŭ ol la kuomintanga bandita trupo kaj la japanaj diabloj regajnis sian spiron. Tiam Hiaŭhongzi staris apud la regiment-estro de la Okavoja Armeo kaj saltis aplaudante de ĝojo: "Tre bone, tre bone! La reakciuloj kaj la japanaj diabloj nun trovas sian finon!" La regiment-estro demetis binoklon kaj karese brakumis la bravan kaj saĝan Hiaŭhongzi kaj kisis lin foje kaj refoje. Poste li levis lin alten gratule al la venko de la batalo.



Sur la

kovrilo:

Miloj kaj dekmiloj da ridantaj vizaĝoj sin direktas al la ruĝa suno.

En la celebra vespera kunveno de la Maja Festo, kiam nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj lia intima kunbatalanto Vicprezidanto Lin ascendas la pordegon Tian-anmen, la laboristinoj de la Dua Ŝtata Koton-teksa Fabriko de Pekino varme krias: “Vivu Prezidanto Maŭ!” “Eternan vivon al Prezidanto Maŭ!”

Sur la

dorskovrilo:

La venkaj artfajraĵoj ruĝe lumigas la ore brilantan Popolan Halon.

EL POPOLA ĈINIO

人民中國報道

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO

P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 8 (133) 1969

Ĉefa Enhavo

Brave Antaŭen sub la Favora Vento de la 9-a Kongreso de la Partio

Strikte Sekvi Prezidanton Maŭ por Akiri Ankoraŭ Pli Grandajn Venkojn

La “Ŝtala Ruĝa 2-a Roto” en Antaŭenmarŝo

Ju Ĉun — Bona Kadro de Prezidanto Maŭ

Vang Ĉaŭĝu — Laboristo-Inĝeniero

Dekjara Heroino Daj Bijong

Ruĝaj Koroj Speguliĝas en Blua Maro

Armea Papera Fabriko “7-a de Majo”

Nuntempaj Malsaĝaj Avoj sub Vangvu-monto

Iri la Vojon de Armita Batalo

Frakasu la Teorion de “Limigita Suvereneco” de la Novaj Caroj

Refuto al la Tiel Nomata Teorio de “Internacia Diktaturo”

Dokumenta Filmo “Kontraŭĉinaj Perfortaĵoj de la Novaj Caroj”

Ruĝa Signal-lanterno (*pekina opero*)

Lecionoj de Ĉina Lingvo

La Stilo de Jan-an (mozaiko el plumoj)

延安作風
碩九九
九八
九八
九八
九八
九八





En subtenado al agrikulturo la PLA-anoj kune kun komunumanoj transformas sablan teron.

Fari Novan Kontribuon por la Popolo

— La Ĉina Popola Liberiga Armeo estas solida apogilo de proletara diktaturo. En la Granda Proletara Kultura Revolucio, granda nombro da ĝiaj komandantoj kaj batalantoj partoprenis en la subteno al agrikulturo, industrio kaj maldekstruloj kaj en la milita kontrolo kaj milita trejnado. Dank' al tio ili ricevis hardadon de klasbatalo, strikte ligiĝis kun la amaso, akcelis la ideologian revoluciigon de la armeo kaj faris grandan historian kontribuon por la popolo.



Ju Zengliang (dekstre), aktivulo de viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso en Ŝenjang-a trupo, laboras kune kun ŝarĝistoj.

Giang Ĝigje (la unua en la fronto), vicestro de la revolucia komitato de Lejĉang-gubernio, Guangdong-provinco kaj reprezentanto de PLA, laboras kune kun laboristoj.





(supre) Kamaradoj de laborista kaj PLA-a propagandaj taĉmentoj de Maŭzedongpenso en Kinghua-universitato serioze resumas la spertojn pri perfekta efektivigado de politikoj.

(malsupre maldekstre) Medicina taĉmento de PLA profundigis en montregionon de Li-nacio, tie ili kaj propagandas Maŭzedongpenson kaj faras kuracadon por malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj.

(malsupre dekstre) Medicina taĉmento de hospitalo de iu trupo de PLA iras al kamparo por servi al armeanoj kaj komunumanoj.





Propaganda taĉmento de Maŭzedongpenso organizita de la trupo de ĈPLA garnizonanta en Tibeto propagandas Maŭzedongpenson al tibetanoj.

La trupano garnizonanta en Junnan propagandas la plej novajn instrukciojn de Prezidanto Maŭ al revoluciaj amasoj en montregiono kie loĝas Lisu-nacio.



